reedziniĝi kun iu — *tornar a se casar;* **eksedzigita virino —** *mulher divorciada***;** **eksedzigita viro —** *homem divorciado;* **edziniĝi kun li —** *casar-se com ele;* **novaj geedzoj —** *recém casados;* **edziĝinita virino** — *mulher casada;* **edziĝofesto —** *bodas;* **okupi sin pri** — *ocupar-se de;* **nuligi la geedziĝon —** *anular o casamento;* **senheredigi** — *deserdar;* **neplenaĝulo** — *menor (de idade);* **naskiĝtago** — *dia de nascimento;* **elmigranto** — *emigrante*; **komercisto —** *negociante;* **eksedzigo —** *divórcio;* **datreveno** — *aniversário;* **gefianĉoj** — *noivos;* **zorgatino** — tutelada; **disputaĉo** — *bate-boca;* **funebrigi** — enlutar; **kuratoro** — *curador, tutor (jur.)*; **enmigri** — *imigrar;* **forpeli** — *expulsar;* **enmigri** — *emigrar;* **geedzoj** — *esposos, casados;* **fraŭlo** — *solteiro;* **heredi** — *herdar;* **havaĵo** — *haveres, bens;* **diraĵo** — *boato;* **taksi** — *avaliar, estimar;* **neplenaĝa** — *menor de idade;* **plejaĝulo** — *primogênito;* **posteuloj** — *descendentes;* **plenaĝulo** — *adulto, maior (de idade);* **negocisto** — *comerciante;* **nomfesto** — *dia onomástico;* **tajpisto** — *datilógrafo;* **heredaĵo** — *herança;* **edziniĝi** — *casar-se (ela);* **aferisto** — *homem de negócios;* **funebro** — *luto;* **memfido** — *confiança em si;* **onidiro** — *boato;* **orfino** — *órfã;* **edziĝi** — *casar-se (ele);* **tajpi** — *datilografar;* **edzo** — *esposo;* **vivi** — *viver, existir;* **loĝi** — *habitar, morar;* **orfo** — *órfão*

9. Socia kunvivado — *Convivência social*

1. Ne ekzistas pordisto en la domo, mi ne povas ricevi ian sciigon —*Não há porteiro na casa, não posso ter nenhum esclarecimento*
2. Hieraŭ matene mi venis kun mia filo el Berlino, por viziti vin — *Ontem pela manhã vim com meu filho de Berlim, para fazer-lhe uma visita*
3. Permesu, ke mi prezentu al vi la fraŭlinon... — *Permita que lhe apresenta a senhorinha...*
4. Li estis kondamnita dek jarojn da karcero — *Ele foi condenado a dez anos de prisão*
5. Vi estas unu el miaj plej bonaj amikoj — *Você é um dos meus melhores amigos*

6. Vi nutras vian fianĉinon per promesoj — *Você a embala com belas promessas*
7. Mi venis vin sciigi (komuniki), ke... — *Vim para lhe participar que...*
8. Li estas tre kontraŭdirema — *Ele é muito argumentador*
9. Mi havas grandan plezuron vidi vin — *Tenho muito prazer em vê-lo*
10. Bonvolu prezenti min al sinjoro... — *Queira apresentar-me ao senhor...*

11. Vi transpasas la limojn, ĉu ne? — *Você está se exorbitando, não acha?*
12. Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon — *Não meta o bedelho em negócio alheio*
13. Mi faris tion konsultinte neniun — *Fiz isso de minha cabeça*
14. La edziĝo estas post du monatoj — *O casamento será dentro de dois meses*
15. Li perdis la kandelon el la kapo [23]— *Ele perdeu o juízo*

16. Hodiaŭ li estas en taŭga humoro — *Hoje ele está de boa maré*
17. Ŝi estas el distingita deveno — *Ela é de boa família*
18. Mi loĝas en eta pensiono — *Moro numa pequena pensão*
19. Mi plezuregas konatiĝi kun vi — *Muito prazer em conhecê-lo*
20. Ili estas surprizita en delikto — *Eles foram apanhados com a mão no saco*

[23] *Figurativo*

21. Ĉu ĉi tie loĝas sinjorino... ? — *Mora aqui a senhora... ?*
22. Jes, sed ŝi ĵus foriris — *Sim, mas ela acaba de sair*
23. Jes, ŝi estas hejme — *Sim, ela está em casa*
24. Vi vivas per okazaj rimedoj [24] — *Você vive de expedientes*
25. Hodiaŭ li estas kapklinita — *Hoje ele está cabisbaixo*

26. Mi ricevis ĉagrensurprizon — *Fiquei desapontado*
27. Vi faris tion senpripense — *Você fez isso sem refletir*
28. Vi plej zorge faris tion — *Você caprichou em fazer isso*
29. Mi tre dankas al vi se... — *Fico-lhe muito agradecido se...*
30. Ĉiu povas libere decidi — *Cada um pode decidir-se livremente*

31. Tio estas memevidenta! — *É claro como água!*
32. Ne agacu miajn nervojn — *Não me irrite os nervos*
33. Li verŝajne estas riĉa — *Ele deve estar rico*
34. Ŝi tiklas sian filinon — *Ela faz cócegas em sua filha*
35. Vi povas fari ideoĉenon — *Você pode fazer uma associação de ideias*

36. Vi estos ĉiam bonvena — *Você será sempre bem-vindo*
37. Mi ne ŝatas intimaĵon — *Não gosto de familiaridade*
38. Kiam vi estos hejme? — *Quando você está em casa?*
39. Mi sentis min ĝenita — *Fiquei embaraçado*
40. Kondutu ĉiam impone! — *Comporte-se sempre com imponência!*

41. Vi estas bonaspekta — *Você tem boa aparência*
42. Vi ne povas imagi! — *Você não pode imaginar!*
43. Kio okazis al vi? — *O que lhe aconteceu?*
44. Ĉio nepre finiĝos — *Tudo há de se acabar*
45. Irigu lin! — *Mande-o ir andando!*

[24] *Figurativo*

10. **Por viziti** — *Para visitar*

1. Ĉar estis jam malfrue, tial ni restis en la domo de nia amiko, por pasigi la nokton — *Como fosse já tarde, ficamos em casa do nosso amigo para passar a noite*
2. Mi prezentis min kelkajn fojojn ĉe vi, sed mi ne havis la feliĉon trovi vin hejme — *Vim várias vezes a sua casa, mas não tive o prazer de encontrá-lo*
3. Lasu min pretigi la kafon. Vi esperebleble ne rifuzos trinki tason kun mi — *Deixe-me fazer o café. Você na certa não se negará a tomar comigo uma xícara*
4. Efektive, kaj mi multe bedaŭras, ke mi ne estis hejme por akcepti vin — *Realmente, e sinto muito não ter estado em casa para recebê-lo*
5. Mi multe bedaŭras, sed mi ne povas resti pli longe en via societo — *Sinto muito, mas não posso demorar-me mais em sua companhia*

6. Mi ne deziras vidi mian bopatrinon, sed paroli al ŝi — *Não desejo ver a minha sogra, mas falar-lhe*
7. Se mi povus, mi irus en la proksima dimanĉo viziti mian amikon — *Se eu pudesse, iria no próximo domingo visitar o meu amigo*
8. Vi faros grandan plezuron al mi, mi ŝatas multe vian societon — *Você me dará muito prazer, gosto muito de sua companhia*
9. Kiom da enuigaj vizitoj oni devas elportadi ĉiutage! — *Quantas visitas enfadonhas deve-se aturar diariamente!*
10. Mi estas tie ĉi de hieraŭ vespere. Mia unua vizito estas al vi — *Estou aqui desde ontem à noite. A minha primeira visita é a você*

11. Faru al mi plezuron tagmanĝi (vespermanĝi) kun mi — *Tenha o prazer de almoçar (jantar) comigo*
12. Pardonu; vi havas vizitanton; mi revenos en alia okazo — *Perdão; você está com visita; voltarei em outra ocasião*
13. Dum via foresto iom maljuna sinjoro estis ĉi tie — *Durante a sua ausência um senhor de meia idade esteve aqui*
14. Neniu estis en via domo kiam mi alvenis tien — *Ninguém estava em sua casa quando cheguei lá*

15. Dezirante paroli al li, mi vizitis lian domon — *Desejando falar com ele, fiz-lhe uma visita.*
16. Do, je kio mi devas la honoron de via vizito? — *Então, a que devo a honra de sua visita?*
17. Se iu venos, sendu ĝin al mi, kiu ajn li estos — *Se vier alguém, mande-me, seja quem for*
18. Fermu la pordon, mi petas, ĉar estas malvarme — *Feche a porta, por favor, por que está frio*
19. Jes, samideano, mi venis tien ĉi paroli kun vi — *Sim, samideano, vim falar com você aqui*
20. Ĉar mi vidis la pordon malfermita, mi eniris — *Como vi a porta aberta, entrei*

21. Tiu, kiu venas, estas mia amiko antaŭ longe — *Quem vem aí é um velho amigo meu*
22. Ĉu oni transdonis mian vizitkarton al vi? — *Deram-lhe o meu cartão de visita?*
23. Ĉu vi volas jam forlasi min tiel rapide? — *Você já quer me deixar tão depressa?*
24. Mi bedaŭras, ke via vizito estis mallonga — *Sinto que a sua visita fosse tão curta*
25. Mi deziras ĵeti rigardon en la ĵurnalon — *Desejo passar as vistas no jornal*

26. Mi vizitos vin tiam, kiam vi invitos min — *Visita-lo-ei quando você me convidar*
27. Al kiu ajn venos, vi diru, ke mi ne estas — *A quem quer que venha, diga que não estou*
28. Ne ĝenu vin akompani min ĝis la pordo — *Não se dê ao trabalho de acompanhar-me até à porta*
29. Je kioma horo li estos hejme? — *A que horas ele estará em casa?*
30. Li devos esti hejme je la oka vespere — *Ele deverá estar em casa às oito da noite*

31. Mia patro estos tre kontenta vidi vin — *Meu pai terá muito prazer em vê-lo*
32. Prokrastu vian vojaĝon kelkajn tagojn — *Adie sua viagem por alguns dias*
33. Kraĉinte li fermis la pordon post mi — *Dando uma cuspida, ele bateu-me a porta*
34. Ĉu vi venos postmorgaŭ? — *Você virá depois de amanhã?*
35. Jes, mi venos je la kvara posttagmeze — *Sim, virei às quatro da tarde*

36. Mi ne venis tial, ke mi estis malsana — *Não vim por isso, porque estava doente*
37. Iru kaj alportu al mi glason da akvo — *Vá buscar um copo de água para mim*
38. Mi ne renkontis lin, nek lian edzinon — *Não o encontrei, nem a sua esposa*

39. Oni diris al mi, ke vi estis elirinta — *Disseram-me que você tinha saído*
40. Havu la bonecon rememorigi min al ŝi — *Tenha a bondade de me lembrar a ela*

41. Se mi ne timus esti maloportuna al vi... — *Se eu não receasse ser-lhe importuno...*
42. Kun kiu mi havas la honoron paroli? — *Com quem tenho a honra de falar?*
43. Mi ne scias, kial vi ne venis hieraŭ — *Não sei porque você não veio ontem*
44. Kiam mi ĵus foriris, mi memoris, ke... — *Quando eu ia sair, lembrei-me de que...*
45. De tempo al tempo mi pensas pri vi — *De vez em quando penso em você*

46. Ne tro oftigu viajn vizitojn al ŝi — *Não amiúde demasiado as suas visitas a ela*
47. Eniru! La ŝlosilo estas en la seruro — *Entre! A chave está na fechadura*
48. Vi estas nia gastino de la semajno — *Você é a nossa hóspeda da semana*
49. Kie estas la cindrujo? — *Onde está o cinzeiro?*
50. Rigardu, ĝi estas tie sur la tablo — *Olhe, está ali na mesa*

51. Ŝi estas ankoraŭ al via dispono — *Ela está ainda às suas ordens*
52. Mi faris al li surprizan viziton — *Fiz-lhe uma visita inesperada*
53. Ĉu pluvos, ĉu estos suno, mi venos — *Quer chova, quer faça sol, eu virei*
54. Ne frapu per la mano sur la pordo — *Não bata na porta com a mão*
55. Jen la plej nova ilustrita revuo — *Olhe aqui uma revista ilustrada mais recente*

56. Prenu vian jakon de sur la hoko — *Tire o seu paletó do cabide*
57. Ĉu vi volas akcepti sinjoron... ? — *Quer receber o senhor... ?*
58. Bonvolu sidiĝi en tiu brakseĝo — *Queira sentar-se nesta poltrona*
59. Bonvolu akcepti cigaredon! — *Queira aceitar um cigarro!*
60. Ne, dankon; mi ĉesigis la fumadon — *Não, obrigado; deixei de fumar*

61. Kiel fartas sinjoro via patro? — *Como vai o senhor seu pai?*
62. Li fartas bone, kaj vi? — *Ele vai bem, e você?*
63. Ĉu estas permesite prezenti... ? — *Se me permite apresentar... ?*
64. Antaŭhieraŭ mi sonĝis pri vi — *Sonhei com você ontem*

65. Mi ne volas ĝeni vin pli longe — *Não quero importuná-lo por mais tempo*

66. Enkonduku lin en la saloneton — *Conduze-o para a saleta*
67. En la domo estis neniu krom ŝi — *Na casa não havia ninguém a não ser ela*
68. Li vizitis min krom viziti vin — *Ele me visitou além de visitá-lo*
69. Kiam mi venis al lia domo, li dormis — *Quando cheguei à casa dele, ele dormia*
70. Mi devus jam esti ĉe mia amiko — *Já devia estar em casa de meu amigo*

71. Bonvolu eniri kaj sidigi vin — *Queira entrar e sentar-se*
72. Ĉu vi permesas, ke mi foriru? — *Permita que eu me retire?*
73. Ĉu vi jam iras? — *Você já se vai?*
74. Ĉu sinjoro... estas dome? — *O senhor... está em casa?*
75. Ne, sinjoro, li ne jam alvenis — *Não, senhor, ele não chegou ainda*

76. Ŝi revenis hejmen neatendite — *Ela chegou a casa inesperadamente*
77. Ĉe mia alveno la hundo bojis — *O cão latiu à minha chegada*
78. Ĉu vi volas tagmanĝi kun mi? — *Quer almoçar comigo?*
79. Per kio mi povas servi vin? — *Em que posso servi-lo?*
80. Mi estas hejme por neniu ajn — *Não estou em casa para ninguém*

81. Li atendas jam de du horoj — *Ele espera já há duas horas*
82. Demetu la jakon kaj ĉemizon — *Tire o paletó e a camisa*
83. Mi ne atendis vin tiel baldaŭ — *Não o esperava tão cedo*
84. Kies estas tiu ĉi portreto? — *De quem é este retrato?*
85. Vi ambaŭ faras bonegan paron — *Ambos formam um excelente casal*

86. Ĉu fraŭlino... loĝas tie ĉi? — *Mora aqui a senhorinha... ?*
87. Permesu, ke mi prezentu min — *Permita que eu me apresente*
88. Vespermanĝu, almenaŭ kun mi — *Jante, pelo menos, comigo*
89. Li fartas bone, dank'al Dio — *Ele vai bem, graças a Deus*

90. Unufoje mi vizitis lian hejmon — *Uma vez fiz-lhe uma visita*

91. Ĉu sinjoro... estas hejme? — *O senhor... está em casa?*
92. Bonvolu enveni, kara amiko — *Queira entrar, amigo*
93. Atentu, ĉar la hundo mordas — *Cuidado, que o cachorro morde*
94. Ni jam konas unu la alian — *Nós já nos conhecemos*
95. Mi estas hejme ĉiuvespere — *Estou em casa todas as tardes*

96. Vi, do, estas fraŭlino... ? — *Então, você é a senhorinha... ?*
97. Mi deziras paroli al li — *Desejo falar com ele*
98. Jen estas miaj gemastroj — *Eis aqui os meus patrões*
99. Kiun vi deziras paroli? — *A quem você deseja falar?*
100. Mi ĝojas konatiĝi kun vi — *Tenho muito prazer em conhecê-la*

101. Ĉu vi volas foriri? — *Você quer se retirar?*
102. Mi estas je via dispono — *Estou às suas ordens*
103. Fermu la pordon post vi — *Feche a porta atrás de você*
104. Mi venis por nelonge — *Vim de passagem*
105. Li estas hejme ĉiumatene — *Ele está em casa todas as manhãs*

106. Oni frapas. Oni sonorigas — *Batem. Tocam a campainha*
107. Kiun vi deziras paroli? — *A quem você quer falar?*
108. Li ĵus eliris el tie ĉi — *Ele saiu agora mesmo*
109. Li eliris antaŭ minuto — *Ele saiu há um minuto*
110. Vi neniam estas hejme — *Você nunca está em casa*

111. Oni sonoras, oni frapas — *Tocam, batem à porta*
112. Ĉu estas fraŭlino... ? — *É a senhorinha... ?*
113. Momenton, ŝi venos tuj — *Um momento, ela virá já*
114. Pardonu, ke mi ĝenas vin — *Perdão, por molestá-lo*
115. Restu ankoraŭ iomete — *Fique um pouquinho mais*

116. Kiu frapas la pordon? — *Quem bate à porta?*
117. Bonvolu eniri sinjoro — *Queira entrar, senhor*
118. Ne staru ĉe la pordo! — *Não fique na porta!*
119. Ili estas niaj gastoj — *Eles são nossos hóspedes*

120. Ĝis revido, venu ofte! — *Até logo, apareça!*

121. Iu frapas je la pordo — *Alguém bate à porta*
122. Mi vizitis vin hieraŭ — *Visitei-o ontem*
123. Mi ĝojas, ke vi ĉeestas — *Alegro-me que você está presente*
124. Aranĝu vin komforte! — *Acomode-se à vontade!*
125. Vi estas tre afabla — *Você é muito gentil*

126. Mi havas peton al vi — *Tenho um pedido a fazer-lhe*
127. Ne faru ceremoniojn — *Não faça cerimônias*
128. Sidigu vin, mi petas! — *Sente-se, por favor!*
129. Kiam vi vizitos min? — *Quando você me visitará?*
130. La proksiman semajnon — *Na próxima semana*

131. Bonvolu sidigi vin! — *Queira sentar-se!*
132. Bonan tagon, sinjoro! — *Bom dia, senhor!*
133. Estu kore bonvena! — *Seja bem-vindo cordialmente!*
134. Kiel vi nomiĝas? — *Como você se chama?*
135. Mia nomo estas... — *O meu nome é...*

136. Estas mi. Malfermu! — *Sou eu. Abra!*
137. Iru aperti la pordon — *Vá abrir a porta*
138. Ĉu li estas hejme? — *Ele está em casa?*
139. Jes, li estas hejme — *Sim, ele está em casa*
140. Dankon, ĝis revido! — *Obrigado, até logo!*

141. Kial li ne venis? — *Por que ele não veio?*
142. Ĉu li longe restis? — *Ele ficou até tarde?*
143. Enkonduku lin tuj — *Faça-o entrar logo*
144. Vi ĉiam bonvenas — *Você é sempre bem-vindo*
145. Mi tre dankas vin — *Agradeço-lhe muito*

146. Iru al la pordo! — *Vá à porta!*
147. Bonan matenon [25] — *Bom dia*
148. Kiel vi fartas? — *Como vai você?*
149. Bonvolu eniri! — *Queira entrar!*
150. Bonvolu sidiĝi! — *Queira sentar-se!*

151. Neniu respondas — *Ninguém responde*
152. Iru akcepti lin — *Vá recebê-lo*

[25] *Pela manhã, i.e., antes do meio-dia*

153. Bonan nokton! [26] — *Boa noite!*
154. Ĝis revido! — *Até a vista!*
155. Sidiĝu, mi petas — *Sente-se, por favor*

156. Oni sonorigas — *Tocam a campainha*
157. Envenu amiko! — *Entre amigo!*
158. Bonan tagon! — *Bom dia!*
159. Ĝis mia reveno! — *Até a volta!*
160. Same al vi! — *O mesmo para você!*

161. Vi venu rapide — *Venha depressa*
162. Prenu seĝon! — *Pegue uma cadeira!*
163. Ĝis baldaŭ! — *Até logo!*
164. Ĝis morgaŭ! — *Até manhã!*
165. Venu ofte! — *Venha amiúde!*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

pensi pri iu — *pensar em alguém;* **sonĝi pri iu** — *sonhar com alguém;* **vizitĉambro** — *sala de visitas;* **gasti ĉe** — *hospedar-se em casa de;* **gastigi** — *hospedar;* **stariĝi** — *levantar-se;* **sidiĝi** — *assentar-se;* **aperti** — *abrir;* **foresto** — *ausência;* **gasti** — *hospedar-se;* **stari** — *estar de pé;* **sidi** — *estar assentado*

[26] *Despedida, quando se vai embora*

11. **Okaza renkonto** — *Encontro ocasional*

1. Ĉe renkontiĝo de la amikoj, ili diris, ke tio estas nura trompo — *Ao encontro dos amigos, eles disseram que isso é um mero engano*
2. Du amikoj iris preter ni, kaj transiris la straton — *Dois amigos passaram por nós e atravessaram a rua*
3. Tuj kiam li vidis min, li etendis al mi sian manon — *Logo que ele me viu, estendeu-me a mão*
4. Bonan tagon, amiko, jam de longe mi ne vidas vin — *Bom dia, amigo, há quanto tempo não o vejo*
5. Hieraŭ mi vidis tiujn homojn en tiu ĉi strato — *Ontem vi aqueles homens nesta rua*

6. Tedita de vojaĝado, mi decidis reveni hejmen — *Chateado (cansado) da viagem, decidi regressar a casa*
7. Mi eliras malofte, ĉar mi estas tre okupita — *Saio raras vezes, porque estou muito ocupado*
8. Estas jam longe, ke mi ne havas la plezuron vidi vin — *Há muito tempo que não tenho o prazer de vê-lo*
9. Ni havas la honoron gastigi vin en nia domo — *Temos a honra de hospedá-lo em nossa casa*
10. Li preterpasis min, kvazaŭ ne rekonante min — *Ele passou por mim, como se não me reconhecesse*

11. Mi ne povas atendi, mi havas ion farotan — *Não posso esperar, tenho o que fazer*
12. Vi estas tre ĝentila, ke vi pensas pri mi — *Você é muito amável, por pensar em mim*
13. Mi esperas jam baldaŭ revidi vin! Ĝis revido! — *Espero revê-lo brevemente! Até à vista!*
14. Mi vin salutis, sed vi min ne resalutis — *Eu o cumprimentei, mas você não me retribuiu*
15. Ĉar estis jam malfrue, tial mi iris dormi — *Como já fosse tarde, fui dormir*

16. Mi pasis preter la virino sen ekrigardo — *Passei pela mulher sem dar uma olhada*
17. Kion vi faris de kiam mi forlasis vin? — *Que você fez desde quando o deixei?*
18. Bonan tagon, mi tre ĝojas renkonti vin — *Bom dia, alegro-me muito encontrá-lo*
19. Vi estis kaptita kun la mano en la sako — *Você foi apanhado com a boca na botija*
20. Mi estos tre feliĉa vidi vin morgaŭ — *Ficarei muito alegre em vê-lo amanhã*

21. Mi ĝojas vidi vin. Kia novaĵo estas? — *Alegro-me vê-lo. Que novidade há?*
22. Kian novaĵon vi havas por rakonti? — *O que há de novo para contar?*
23. Ĉe okazo mi petas vin paroli al li — *Se você tiver oportunidade, peço-lhe falar com ele*
24. Mi ilin vidis duope plurajn fojojn — *Eu os vi juntos várias vezes*
25. Jam de malproksime mi ekvidis vin — *Eu o avistara já de longe*

26. Li venis al mi tute ne atendite — *Ele veio falar comigo inesperadamente*
27. Ĉu vi fartas bone? Des pli bone — *Você vai bem? Tanto melhor*
28. Ne forgesu memorigi min pri tio — *Não se esqueça de lembrar-me disso*
29. Li lasis sian oficon pro malsano — *Ele deixou a sua função por causa da doença*
30. Venu morgaŭ viziti min, mi petas — *Venha ver-me amanhã, por favor*

31. Mi konsideras lin kiel fremdulo — *Considero-o como um estranho*
32. Mi tre ĝojos, se mi revidos vin — *Alegrar-me-ei se voltar a vê-lo*
33. Ĉiun matenon akurate je la naŭa — *Todas as manhãs às nove em ponto*
34. Mi ne havas la honoron vin koni — *Não tenho a honra de conhecê-lo*
35. Kiom da tempo mi ne vidas vin! — *Há quanto tempo que não o vejo!*

36. Ni iros viziti niajn geamikojn — *Iremos visitar nossos amigos*
37. Mi sidis iom kaj poste foriris — *Fiquei sentado certo tempo e depois retirei-me*
38. Ŝi estas sprite amuza fraŭlino — *Ela é uma garota divertida*
39. Mi estas en senelira situacio — *Estou num beco sem saída*
40. Ĉi-foje oni ne parolas pri vi — *Desta vez não se fala a seu respeito*

41. Estas strange, ke li ne venis — *É estranho que ele não tenha vindo*
42. Mi tre deziras paroli kun vi — *Desejo muito falar com você*
43. Mi esperas revidi vin baldaŭ — *Espero revê-lo brevemente*
44. Atendu, ĝis kiam mi revenos! — *Espere, até eu voltar*
45. Ĉe tiuj ĉi vortoj li foriris — *Com estas palavras ele se retirou*

46. Mi iam vidis ŝin en la kinejo — *Certo dia eu a vi no cinema*
47. Mi iris trifoje al via domo — *Fui três vezes a sua casa*
48. Mi revenos dimanĉon vespere — *Voltarei domingo à tardinha*
49. Kiun tagon ni havas hodiaŭ? — *Que dia é hoje?*
50. Ni revenu al la deirpunkto — *Voltemos ao ponto de partida*

51. Mi havas ion por diri al vi — *Tenho algo para dizer-lhe*
52. Viaj nervoj estas agacitaj — *Seus nervos estão irritados*
53. Li estas ĵaluzplena pri ŝi — *Ele está enciumado dela*
54. Kiu venis demandi pri mi? — *Quem veio perguntar por mim?*
55. Iele, iome, duone, malbone [27] — *Assim-como-assim, nem bem nem mal*

56. Ŝi estas logvizaĝa fraŭlino — *Ela é uma moça bem atraente*
57. Ĉu mi povas lasi mesaĝon? — *Posso deixar um recado?*
58. Mi ie aŭdis ĉi tiun nomon — *Ouvi este nome em algum lugar*
59. Mi renkontos vin kiam ajn — *Seja quando for, encontrá-lo-ei*
60. Mi ĵus vidis vian amikon — *Vi agora mesmo o seu amigo*

61. Kion fariĝis via edzino? — *O que é feito de sua esposa?*
62. Kioma tago estas hodiaŭ? — *Que dia é hoje do mês*
63. Ne forgesu skribi al mi! — *Não se esqueça de me escrever!*
64. Mi loĝis en la strato... — *Eu morava na rua...*
65. Jen estas mia vizitkarto — *Aqui tem o meu cartão de visitas*

66. Mi ja ĝojas renkonti vin — *Alegro-me deveras encontrá-lo*
67. De longe mi ne vidas vin — *Há muito tempo que não o vejo*
68. Mi loĝas ĉe la strato... — *Moro na rua...*
69. Mi bezonas paroli kun vi — *Preciso falar com você*
70. Memoru ĉiam pri tio, ĉu? — *Lembre-se sempre disso, sim?*

71. Ĉu vi volas jam foriri? — *Você já quer se retirar?*
72. Kion fariĝis via avino? — *O que é feito de sua avó?*
73. Ŝi estas mortinta — *Morreu*
74. Ŝi ŝajnas sufiĉe bona — *Ela tem boa aparência*
75. Ĝis revido, fartu bone! — *Até logo, passe bem!*

76. Mi tute ne pensas pri tio — *Estou longe de pensar nisso*
77. Li estas bonmiena viro — *É um homem de boa aparência*
78. Kia miraklo estis tio? — *Que milagre foi esse!*
79. Mi serĉis lin unufoje — *Procurei-o uma vez*
80. Mi gratulas vin pro... — *Dou-lhe meus parabéns por...*

81. Mi tre ĝojas vidi vin — *Estimo muito em vê-lo*
82. Li estas kvazaŭvirina — *Ele é afeminado*
83. Mi eliros post la oka — *Sairei depois das oito*
84. Revenu plej baldaŭ! — *Volte o mais breve possível!*
85. Salutu vian familion! — *Dê os cumprimentos à família!*

86. Mi ne estas ambicia — *Não sou ambicioso*
87. Bonan dormon al vi! — *Um bom sono para você!*
88. Li perdis la saĝon — *Ele perdeu o juízo*
89. Malfeliĉa knabino! — *Pobre garota!*
90. Mi parolis pri vi — *Falava a seu respeito*

91. Li nenial foriris — *Ele saiu sem motivo algum*
92. Kie vi loĝas? — *Onde você está morando?*
93. Mi loĝas tie — *Estou morando ali*
94. Kiel vi statas? — *Como vai você?*
95. Mi statas bone — *Vou indo bem*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

malŝpari la tempon — *perder tempo*; **malŝpari tempon —** *desperdiçar tempo;* **preterpasante —** *de passagem*; **ŝpari tempon —** *economizar tempo*; **telefoni al —** *telefonar para*; **legitimilo —** *carteira de identidade*; **viransero —** *otário, pateta;* **amikaĵo —** *prova de amizade*; **amikiĝi —** *travar amizade*; **preter —** *adiado de, além de*

[27] Idiotismo

GRAMATIKO – I

Alfabeto

1. O ALFABETO ESPERANTO CONSTA DE 28 LETRAS:

Aa	**Bb**	**Cc**	**ĈĈ**	**Dd**	**Ee**	**Ff**	**Gg**	**Ĝĝ**	**Hh**	**Ĥĥ**	**Ii**	**Jj**	**Ĵĵ**
Kk	**Ll**	**Mm**	**Nn**	**Oo**	**Pp**	**Rr**	**Ss**	**Ŝŝ**	**Tt**	**Uu**	**ŭ**	**Vv**	**Zz**

2. OS NOMES DAS LETRAS VISTAS ISOLADAS POR SI MESMAS SÃO:

A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H	Ĥ	I	J
a	**bô**	**tsô**	**tchô**	**dô**	**ê**	**fô**	**gô**	**djô**	**hô**	**ĥô**	**i**	**iô**
	Ĵ											
	jô											

K	L	M	N	O	P	R	S	Ŝ	T	U	ŭ	V
cô	**lô**	**mô**	**nô**	**ô**	**pô**	**rô**	**sô**	**chô**	**tô**	**u**	**uô**	**vô**
	Z											
	zô											

(daí temos a forma substantivada: **aboco** (abc) = a-bê-cê (abc) em português)

Continua na página 78

12. RENKONTO — *ENCONTRO*

1. Apud la butiko, bela fraŭlino kaj malgranda junulino renkontis lin — *Perto da loja, uma bela senhorita e uma pequena jovem o encontraram*
2. Ĉu vi pensas, ke tiel malfrue, ni trovos ankoraŭ bonajn sidlokojn? — *Você pensa que tão tarde assim, ainda acharemos bons lugares?*
3. Mi fiksis rendevuon kun mia karulino, ni iros al la teatro — *Marquei encontro com a minha querida; nós iremos ao teatro*
4. Hieraŭ mi venis por viziti vin, sed vi estis ĵus elirinta — *Ontem vim fazer-lhe uma visita, mas você acabava de sair*
5. Mi tiel malbone parolas, ke mi ne deziras altiri la atenton — *Falo tão mal, que não desejo chamar a atenção de ninguém*

6. Ŝajnas al mi, ke per la interparolado mi lernus tre rapide — *Parece-me que pela conversação aprenderei muito depressa*
7. Mi antaŭsciigas vin, ke mi demandos al vi multajn informojn — *Previno-o que lhe pedirei muitas informações*
8. Mi havas devigan viziton por fari, kiun mi ne povas prokrasti — *Tenho de fazer uma visita obrigatória, a qual não posso deixá-la de fazer*
9. Mi timis, ke mi ne havos la plezuron vin renkonti (vidi) — *Estava com receio de não ter o prazer de encontrá-lo (vê-lo)*
10. Mi estas fremdulo kaj venas en vian urbon por distri min — *Sou um estrangeiro e venho à sua cidade para me distrair*

11. Mi petas de vi forpermeson – Ĉu vi bezonas vere rapidi? — *Permita-me despedir-me de você – Você está mesmo apressado?*
12. Estas tre belaj vestaĵoj kaj luksaj privataj veturiloj — *Há roupas muito bonitas e veículos particulares luxuosos*
13. Estas tiel bele, ke domaĝe estus, enfermi sin en teatron — *Está tão bonito, que seria uma pena meter-se num teatro*
14. Ĉu vi, kara amiko, estas partiano de tiu absurda afero? — *Você, caro amigo, é partidário desse caso absurdo?*
15. Jen vi revenis el via vojaĝo. De kiam vi estas en... ? — *Ei-lo de volta de sua viagem. Desde quando está em... ?*

16. Ŝajnas al mi, ke la ĵurnalo enhavas gravajn anoncojn — *Parece-me que o jornal traz anúncios importantes*
17. La jaroj forflugas, ne lasante sur vi ian postsignon — *Os anos passam não lhe deixando os traços do tempo*
18. Ĉu ĉiutage estas tiom da personoj tie ĉi kiel hodiaŭ? — *Todos os dias há tanta gente aqui, assim como hoje?*
19. Kia homo estas tiu, kiun vi prezentis al mi hieraŭ? — *Que homem é aquele que você me apresentou ontem?*
20. Ĉu mi povas sen maldiskreteco prezenti min ĉe vin? [28] — *Posso sem indiscrição apresentar-me a você?*

21. Vere, mi estas konfuzita pro ĉiuj viaj afablaĵoj — *Na verdade, estou confuso com tantas amabilidades suas*
22. Mi ne povis veni hodiaŭ, tamen mi venos morgaŭ — *Não pude vir hoje, contudo virei amanhã*
23. Morgaŭ en tiu ĉi tempo ni estos jam alvenintaj — *Amanhã a estas horas já teremos chegado*
24. Ĉu vi estas tie ĉi pro negoco aŭ pro plezuro? — *Você está aqui a negócio ou por prazer?*
25. La plejmulto el la esperantistoj venos kun mi — *A maioria dos esperantistas virá comigo*

26. Ĉu eble eksplodos ia tria tut-monda milito? — *Será que eclodirá uma terceira guerra mundial?*
27. Ĉu vi lastatempe havis novaĵon pri via amiko? — *Você ultimamente teve notícias de seu amigo?*
28. Mi estas tre kontenta retrovi vin en bonfarto — *Folgo muito em encontrá-lo bem de saúde*
29. Vi ĝuste trafis, ĉar ni estas tre bone tie ĉi — *Você acertou exatamente, pois estamos muito bem aqui*
30. Ĉu mi diris eĉ unu vorton al iu el vi ambaŭ? — *Acaso disse eu sequer uma palavra a algum de vocês dois?*

31. Nu, kara amiko, salutu al ĉiuj je mia nomo! — *Bem, caro amigo, saudações a todos em meu nome!*
32. Apud vi, la tempo ŝajnas al mi tre mallonga — *O tempo, perto de você, parece-me muito curto*
33. Via familio plimultiĝis de mia vojaĝo — *Sua família cresceu muito desde a minha última viagem*

---

[28] Não está destituído de erro o uso de "**ĈE**" com acusativo de movimento, contudo o seu uso com o acusativo não tem encontrado boa receptividade entre os esperantistas, apesar de Bein ter usado (veja Plena Vortaro) como vemos: ***"Morgaŭ mi iros ĉe mian onklon (en la domo de mia onklo; venu ĉe min morgaŭ; mi rapidis ĉe lin"***, etc. Prefiro dizer: ***Mi iros en la hejmon de mia onklo; mi iras al lia hejmo***, etc.

34. Se vi gvidos min, tio iros multe pli rapide — *Se você me servir de guia, isso irá mais depressa*
35. Ni revidos nin; kie mi povos renkonti vin? — *Tornaremos a ver-nos; onde posso encontrá-lo?*

36. Mi devas foriri rapide, mi havas rendevuon — *Devo ir-me depressa, tenho um encontro*
37. Estas tre malagrable ne koni la lingvon — *É muito desagradável não conhecer a língua*
38. Mi ne diras "adiaŭ" al vi, sed "ĝis revido" — *Não lhe dou "adeus", mas "até à vista"*
39. Kiom da tempo vi intencas resti tie ĉi? — *Quanto tempo você pretende ficar aqui?*
40. Ĉu vi povus prunti al mi cent kruzerojn? — *Você poderia me emprestar cem cruzeiros?*

41. Mi havis multe da mono, sed elspezis ĉion — *Eu tinha muito dinheiro, mas gastei tudo*
42. Kion vi faris, de kiam mi forlasis vin? — *O que foi feito de você depois que o deixei?*
43. Mi loĝas en la numero tria de strato... — *Moro no número três da rua...*
44. Mi baldaŭ havos la plezuron revidi vin — *Breve terei o prazer de vê-lo novamente*
45. Ŝi sentis haston edziniĝi kaj liberiĝi — *Ela sentiu pressa em se casar e se libertar*

46. Bonan tagon, fraŭlino, kiel vi fartas? — *Bom dia, senhorinha, como vai você?*
47. Tre bone, mi dankas — *Muito bem, obrigada*
48. Hieraŭ mi dormis je la deka — *Ontem dormi às dez horas*
49. Kial vi deziras esti prezentata al ŝi? — *Por que você quer ser apresentado a ela?*
50. Ĉu mi eraras, vi estas sinjoro X... ? — *Se não me engano, você é o senhor X... ?*

51. Mi timas ŝajni tro ceremonie vestita — *Receio parecer vestido com muita cerimônia*
52. Ravita mi estas, renkonti vin tie ĉi — *Estou encantado de encontrá-lo aqui*
53. Mi neniam tiom bedaŭris mian nescion — *Nunca lamentei tanto a minha ignorância*
54. Rekomendu min al sinjorino via edzino — *Dê minhas recomendações à senhora sua esposa*
55. Morgaŭ vespere, mi volas viziti vin — *Amanhã à tardinha desejo visitá-lo*

56. Mi restis tie (dum) kvar semajnoj(n) — *Permaneci lá (durante) quatro semanas*
57. Mensoganto bezonas duoblan memoron — *Mentiroso precisa de boa memória*
58. Ŝi estas perfidulino kiel serpento — *Ela é pérfida como serpente*

59. Vere, pli aminda oni ne povas esti — *Deveras, não poderia ser melhor*
60. Kiel feliĉa mi estas renkonti vin? — *Como me sinto feliz de encontrá-lo!*

61. Mi multe bedaŭras, ke mi forestis — *Sinto muito que eu estivesse ausente*
62. Ĉu mi havos la plezuron vin revidi? — *Terei o prazer de revê-lo?*
63. Ĉu vi estos libera morgaŭ vespere? — *Você estará livre amanhã de tarde?*
64. Mi renkontis lin irante al la urbo — *Encontrei-o ao ir (eu) à cidade*
65. Kiam okazis la morto de via patro? — *Quando foi a morte de seu pai?*

66. Oni ne ricevas la perditan tempon — *Não se recupera o tempo perdido*
67. Horon post horo mi atendis por ŝi — *Eu a esperei horas após horas*
68. Mi vere ne scias, kiel danki vin — *Deveras não sei como agradecer-lhe*
69. Ni povus kune pasigi la vesperon — *Poderíamos passar a tarde juntos*
70. Kion oni diras ĉe via najbararo — *O que se diz pela sua vizinhança?*

71. Tiu ĉi informo bezonas konfirmon — *Esta notícia precisa de confirmação*
72. Mi tion nur scias laŭ la onidiro — *Sei disso só por ouvir dizer*
73. Li restis ĉe mi dum tri semajnoj — *Ele ficou comigo durante três semanas*
74. Mi loĝas en la strato... N-ro... — *Moro na rua... número...*
75. Ŝi estas malamema kiel leopardo — *Ela é odienta como um leopardo*

76. Tiu informo ne estis konfirmita — *Essa notícia não foi confirmada*
77. Kiom da jaroj havas la infanoj? — *Quantos anos têm as crianças?*
78. Ŝi mortis antaŭ tiom da jaroj! — *Ela morreu há tantos anos!*
79. Helpu lin tiom, kiom vi povas — *Ajude-o tanto quanto puder*
80. Inter amikoj tio estus ridinda — *Entre amigos seria ridículo*

81. Mi insistis ĉe li, ke li restu — *Insisti com ele para que ficasse*
82. Tiu ĉi novaĵo estas ne fidinda — *Esta notícia não é fidedigna*
83. Mi ricevis malagrablan sciigon — *Recebi notícia desagradável*

84. Mi ne speciale rimarkigas tion — *Não ponho isso em evidência*
85. Ni povos ĝui intiman babiladon — *Podemos ter um bate-papo íntimo*

86. Bedaŭrinde mi devas malakcepti — *Infelizmente devo recusar*
87. Li estas dudekkelkjara junulo— *Ele é um jovem de uns vinte anos*
88. Mi venos kun ŝi morgaŭ matene — *Virei com ela amanhã pela manhã*
89. Tio estas nia unua renkontiĝo — *Esse foi o nosso primeiro encontro*
90. Ĝis baldaŭa persona konatiĝo! — *Até breve conhecimento pessoal!*

91. De kiu vi aŭdis tiun novaĵon? — *De quem você teve essa notícia?*
92. Vi estas venĝema kiel pantero — *Você é vingativo como pantera*
93. Ŝi estas maliculino kiel kato — *Ela é maliciosa como gato*
94. Li ne havas groŝon en la poŝo — *Ele não tem eira nem beira*
95. Li estas mia plej bona amiko — *Ele é o meu melhor amigo*

96. Mia horloĝo ne iras korekte — *O meu relógio não vai bem*
97. Kiamaniere vi sciis pri tio? — *Como você soube disso?*
98. Ŝi estas vantulino kiel pavo — *Ela é vaidosa como pavão*
99. Pardonu amiko, ke mi malfruas — *Perdão amigo, por eu estar atrasado*
100. Mi intencas iri rekte hejmen — *Pretendo ir diretamente para casa*

101. Mi vizitis ŝin hodiaŭ matene — *Visitei-a hoje pela manhã*
102. Tio tre maltrankviligis min — *Isso inquietou-me muito*
103. Tiu ĉi novaĵo estas fidinda — *Esta notícia é boa*
104. Ĉu vi bone fartas? — *Você está passando bem?*
105. Ne, mia farto estas malbona — *Não, meu estado de saúde é ruim*

106. Nun, mi ne plu forlasas vin — *Agora, não vou mais deixá-lo...*
107. Permesu, ke mi akompanu vin — *Permita acompanhá-lo*
108. Mi estas (estos) malhelpita — *Estou (estarei) impedido*
109. Ĉu vi ne aŭdis pri novaĵo? — *Você não ouviu falar de nada?*
110. Ĉu sinjoro X... estas hejme? — *O senhor X... está em casa?*

111. Oni jam ne parolas pri tio — *Já não se fala nisso*
112. Ŝi estas mia ĉefa asistanto — *Ela é meu braço direito*
113. Vi estas kruela kiel tigro — *Você é cruel como tigre*
114. Faru ĝin pro komplezo al mi! — *Faça-o por fineza a mim!*
115. Kia vaganta judo vi estas! — *Que judeu errante você é!*

116. Estis ĉirkaŭ la deka horo — *Era por volta das dez horas*
117. Ĉu la horo konvenas al vi? — *A hora lhe convém?*
118. Kie mi povos renkonti vin? — *Onde poderei encontrá-lo?*
119. Pardonu, mi devas foriri — *Perdão, devo partir*
120. Prefere iom pli (mal)frue — *De preferência um pouco mais (tarde) cedo*

121. Sur kioma etaĝo vi loĝas? — *Em que andar você mora?*
122. Kion diras la gazetaro? — *O que dizem os jornais?*
123. Kion oni diras en la urbo? — *O que é que se diz na cidade?*
124. Mi estas iomete kortuŝita — *Estou um pouco comovido*
125. Kiam mi povos revidi vin? — *Quando poderei revê-lo?*

126. Ĝis kiam vi estos hejme? — *Até quando você estará em casa?*
127. Ili loĝas ekster la urbo — *Eles moram fora da cidade*
128. Bonvolu forgesi tion! — *Por favor, esqueça isso!*
129. Bonvolu ne forgesi tion! — *Queira não se esquecer*
130. Li pasis preter mia domo — *Ele passou ao lado de minha casa*

131. Ŝi estas kisenda fraŭlino — *Ela é uma garota de se beijar*
132. Ĉu vi atendis longtempe? — *Você esperou muito tempo?*
133. Mi scias nenion novan — *Não sei nada de novo*
134. Ĉu vi scias ian novaĵon? — *Você sabe de alguma novidade?*
135. Ŝi ja estas tre malsana — *Realmente ela está muito doente*

136. Vi volis plaĉe ridegigi [29] — *Você quis desopilar o fígado*
137. Tio estas nura elpensaĵo — *Isso é pura invenção*
138. Mi sincere gratulas vin — *Meus sinceros parabéns*
139. De pli ol dudek jaroj — *Há mais de vinte anos*
140. Atendu, ĝis mi revenos — *Espere, até eu voltar*

141. Ili faras interkisadon — *Eles fazem troca de beijos*
142. Ni iros renkonte al ili — *Iremos ao encontro deles*
143. Kiaj estas la novaĵoj? —*Quais são as novidades?*
144. Eĉ ne iomete — *Nem mesmo um pouquinho*
145. Vi do ne estis ĵaluza? — *Você então não ficou com ciúmes?*

146. Ĉu tio mirigas vin? — *Isso faz-lhe admirar?*
147. Mi nur pasas vojaĝante — *Estou apenas de passagem*
148. Mi prenos tion sur min — *Tomarei a meu cargo*
149. Estas malbonaj novaĵoj — *Há más notícias*
150. Ĉu vi memoras pri mi?— *Você se lembra de mim?*

151. Mi loĝas ĉe mia onklo — *Moro em casa de meu tio*
152. Mi neniel ĝin eksciis — *Não soube de nada*
153. Mi atendas vin ĉe la... — *Esperarei por você na...*
154. Mi estas enlandido — *Sou sertanejo*
155. Vi ja venos certe! — *Você virá com certeza!*

156. Mi nur ĵus alvenis — *Eu mal acabei de chegar*
157. Vi paliĝis de timo — *Você empalideceu de medo*
158. Vi estas graseta — *Você está gorducho*
159. Restu kun Dio! — *Fique com Deus!*
160. Revenu tuj! — *Volte logo!*

---

[29] Familiar

13. ĈIUTAGAJ FRAZOJ — *FRASES DE USO DIÁRIO*

1. Mi diskutis pri la por kaj la kontraŭ [30] — *Discuti os prós e os contras*
2. Mi jam scias, vi ja scias nenion plu — *Já sei, você não sabe mais nada*
3. Mi ĵus ne povis min deteni de rido — *Ainda agora não pude deixar de rir*
4. Mi rapide vestas min kaj venos tuj — *Visto-me com rapidez e virei logo*
5. Mi metis ĉion sur la lastan karton [31] — *Joguei a última cartada*

6. Vi parolos kontraŭe, kiam oportune — *Você há de dizer o contrário, quando for ocasião*
7. Li formetis ĝis la grekaj kalendoj — *Ele deixou para as calendas gregas*
8. Mi konsilis al li, ke li (iru) restu — *Eu o aconselhei que (fosse) ficasse*
9. Mi ĵus ricevis leteron el Brazilo — *Acabo de receber carta do Brasil*
10. Mi ne povas elporti lian rigardon — *Não posso encará-lo. Não suporto a cara dele*

11. Ŝi havas la dorson turnita al mi — *Ela está de costas para mim*
12. Mi ne scias, ĉu iri aŭ (ĉu) resti — *Não sei se vou ou (se) fico*
13. Ni nur supraĵe interkonatiĝis — *Nós apenas nos conhecemos*
14. Li estas malsaĝulo, nenion pli — *Ele é um tolo, nada mais*
15. Mi manĝis kun granda plezuro — *Comi com grande prazer*

16. La usonanoj estas altkreskaj [32] — *Os americanos são grandes*
17. Li estas bone konata al vi ĉiuj — *Ele é bem conhecido de todos vocês*
18. Ŝi estas mia plej bela amikino — *Ela é a minha amiga mais bonita*
19. Mi aĉetis iom da tiu ĉi fromaĝo — *Comprei um pouco deste queijo*
20. Li paŝis al la fundo kaj eliris— *Ele passou pelos fundos e saiu*

21. Mi pasigos kelkajn tagojn ĉe vi — *Passarei alguns dias em sua casa*
22. Mi dormis profunde ĝis la deka — *Dormi profundamente até as dez*

[30] Idiotismo

[31] Idiotismo

[32] Com relação à estatura

23. Li montris sin inda je honoro — *Ele se mostrou digno de honra*
24. Mi laboras dum la posttagmezo — *Trabalho depois do meio-dia*
25. Mi ne havas tempon por ludi — *Não tenho tempo para brincar*

26. Mi pensas, sekve mi ekzistas — *Penso, logo existo*
27. Mi ne parolas al vi, sed al ŝi — *Não me dirijo a você, mas a ela*
28. Mi atendos lin du semajnojn — *Esperarei por ele duas semanas*
29. Mi ne kalkulas je tia helpo — *Não conto com tal ajuda*
30. Li estas kvardek kelkjara homo —*É um homem de uns quarenta anos*

31. Mi atendos (semajnon) dum semajno — *Esperarei (uma semana) durante uma semana*
32. Ŝi ankoraŭ denove mokus vin — *Ela continuará zombando de você*
33. Mi skribos al vi postmorgaŭ — *Escrever-lhe-ei depois de amanhã*
34. Ni iros ien ajn por ripozi — *Vamos a algum lugar repousar*
35. Mi diris al li, ke li restu — *Eu lhe disse que ficasse*

36. Ŝi faras nenion krom klaĉi — *Ela não faz outra coisa a não ser fuxicar*
37. Ŝi faras nenion krom plori — *Ela não faz outra coisa senão chorar*
38. Vi faras nenion krom manĝi — *Você não faz outra coisa além de comer*
39. Ili estas treege bongustaj — *São extremamente saborosos*
40. Mi ne scias kiam li venos — *Não sei quando ele virá*

41. Mi aĉetis dekduon da ovoj — *Comprei uma dúzia de ovos*
42. Li havas malbonan mienon — *Ele tem cara de poucos amigos*
43. Mi serĉas amikojn tie ĉi — *Procuro amigos aqui*
44. Ŝi parolos al mi baldaŭ — *Breve ela falará comigo*
45. Mi ne estos maldiskreta — *Não serei indiscreto*

46. Vi babilas muele sencele [33] — *Você fala às tontas*
47. Li tro facile kolerigas — *Ele tem cabelos nas ventas*

[33] *Idiotismo*

48. Mi estas pli alta ol vi — *Sou mais alto do que você*
49. Mi kisis ŝin ĉe la buŝo — *Dei-lhe um beijo na boca*
50. Mi! Jen ne malbona aserto! — *Eu! Essa agora não é má*

51. Mi parolis al ŝi hieraŭ — *Falei com ela ontem*
52. Mi estas tre kontenta — *Estou muito contente*
53. Vi parolis tre prave — *Você disse muito bem*
54. Ŝi estas ventkapulino — *Ela é uma desmiolada*
55. Ni kisas unu la alian — *Nós nos beijamos*

56. Li agis tiel pro venĝo — *Ele agiu assim por vingança*
57. Vi estas do strangulo — *Você é então um extra-vagante*
58. Vi neniam ofendis min — *Você nunca me ofendeu*
59. Mi ne iros ĝis morgaŭ — *Não irei até amanhã*
60. Vi estas tre bonkora — *Você é muito bondosa*

61. Vi devas diri ne tion [34] — *Você deve dizer, mas não isso*
62. Ne vi devas diri tion [35] — *Não é você que deve dizer isso*
63. Vi ne devas diri tion 36 — *Você não deve dizer isso*
64. Mi obeas nur al saĝo — *Obedeço somente à razão*
65. Vi troigas ia aferon — *É exagero de sua parte*

66. Mi estas tre okupita — *Tenho muito que fazer*
67. Vi estas plenkreska — *Você está um homem feito*
68. Mi ŝatus iri ankaŭ — *Gostaria de ir também*
69. Si estas tre ĉarma — *Ela é muito cativante*
70. Li faris la malon — *Ele fez o contrário*

71. Mi konstante oscedas — *Bocejo constantemente*
72. Vi estas viransero — *Você é um pateta*
73. Mi bezonas nenion — *Não preciso de nada*
74. Mi venos dimanĉon — *Virei no domingo*
75. Mi mem faris ĝin — *Eu mesmo o fiz*

76. Mi estas senmona — *Estou sem dinheiro*
77. Li respektas min — *Ele me respeita*
78. Mi tuj vokos ŝin — *Vou chamá-la*
79. Mi vin tiel amas! — *Amo-te tanto!*
80. Mi tuj revenos — *Já volto*

81. Mi skribas fuŝe — *Escrevo porcamente*
82. Li parolas saĝe — *Ele fala com sabedoria*
83. Mi ne malfruos — *Não me demoro muito*
84. Mi tre dankas! — *Muito obrigado!*
85. Vi penas diri — *Você procura dizer*

---

[34] *Veja que o sentido não é o mesmo com o uso de "ne" em diferentes posições na frase*

[35] *Veja que o sentido não é o mesmo com o uso de "ne" em diferentes posições na frase*

[36] *Veja que o sentido não é o mesmo com o uso de "ne" em diferentes posições na frase*

ESPERANTO-PORTUGUÊS
(CONVERSAÇÃO)

Pandiá Pându

ĈAPITRO III		**CAPÍTULO III**
Demandaj frazoj	**14.**	Frases interrogativas
Ordonaj frazoj	**15.**	Frases imperativas
Ekkriaj frazoj	**16.**	Frases exclamativas
Jesaj frazoj	**17.**	Frases afirmativas
Neaj frazoj	**18.**	Frases negativas
Ĉiutagaj frazoj	**19.**	Frases de uso diário

Errare humanum est, sed in errore perseverare dementis.
Ĉiu homo povas erari, sed nur la malsaĝulo persistas en sia eraro.
Errar é próprio do homem, mas perseverar no erro é próprio dos loucos.

Non progredi est regredi — **Kiu ne progresas, tiu malprogresas** — Não progredir é regredir.

Nia libereco finiĝas tie, kie aliula libereco komenciĝas.
A nossa liberdade acaba onde a liberdade de outrem começa.

14. DEMANDAJ FRAZOJ — *FRASES INTERROGATIVAS*

1. Ĉu mi rajtas permesi al mi demandon? — *É-me permitido fazer uma pergunta?*
2. Kion mi devus fari por ŝpari tempon? — *Que deveria fazer para ganhar tempo?*
3. Ĉu vi komprenas, kion mi diros al vi? — *Compreende o que estou lhe dizendo?*
4. Ĉu mi povas fari ĝin je la momento? — *Posso fazê-lo no momento presente?*
5. Ĉu mi devas fari ĝin je la momento? — *Devo fazê-lo no momento presente?*

6. Ĉu vi estas en embarasa situacio? — *Você se acha em situação embaraçosa?*
7. Kial vi tiel strange rigardas min? — *Por que você me olha deste modo?*
8. Ĉu mi rajtas fari al vi proponon? — *Posso fazer-lhe uma proposta?*
9. Ĉu mi povas doni al vi informon? — *Posso dar-lhe uma informação?*
10. Ĉu mi rajtas atentigi vin pri tio? — *Posso chamar-lhe a atenção sobre isso*

11. Kion vi farus, se vi estus riĉa? — *O que você faria se fosse rico?*
12. Por kia celo vi venas tien ĉi? — *Com que fim você vem aqui?*
13. Ĉu vi povas havigi tion al mi? — *Você pode obter isso para mim?*
14. Ĉu vi havas momenton da tempo? — *Você dispõe de um momentinho?*
15. Ĉu vi permesas min demandi ĉu.... ? — *Posso perguntar-lhe se.... ?*

16. Ĉu vi, do, ne aperos plu tie ĉi? — *Então você não volta mais aqui?*
17. Kiel vi klarigas tion al mi? [37]— *Como você me explica isso?*
18. Kiel vi eksplikas tion al mi? [38]— *Como você me explica isso?*
19. Ĉu vi estas malsaĝa aŭ ruza? — *Você é tolo ou velhaco?*
20. Ĉu mi povas kalkuli sur vin? — *Posso contar com você?*

21. Ĉu vi farus al mi komplezon? — *Você me prestaria um favor?*
22. Hodiaŭ estas merkredo, ĉu ne? — *Hoje é quarta-feira, não é?*
23. Kion vi diras al mi pri tio? — *O que você me diz a isto?*
24. Kion vi volas diri per tio? — *O que você quer dizer com isso?*
25. Pardonon, ĉu vi celas min? — *Perdão, você se refere a mim?*

26. Ĉu vi havus la afablecon.... ? — *Você teria a amabilidade de.... ?*
27. Bonvolu diri al mi, kiel... ? — *Por favor, diga-me como... ?*
28. Ĉu ne estus pli bone, se..? — *Não seria melhor, se..?*
29. Ĉu vi kredas vere, ke... ? — *Você acredita realmente que... ?*
30. Ĉu vi eble scias, ĉu..? — *Você talvez sabe, se..?*

31. Kion vi volas diri pri tio? — *O que você quer dizer disso?*
32. Ĉu li estas ankoraŭ tie ĉi? — *Ele está ainda aqui?*
33. Kiajn interesojn vi havas? — *Quais os seus interesses?*
34. Ĉu vi aŭdas, kion mi diras? — *Você ouve o que eu digo?*
35. Kio estas tio en via mano? — *O que é isso em sua mão?*

36. Kiel vi pasigas la tempon? — *Como você passa o tempo?*
37. Ĉu vi estas certa pri tio? — *Você está seguro disso?*
38. Ĉu mi devas fari tion tuj? — *Devo fazer isso já?*
39. Ĉu vi konstatis la eraron? — *Você viu o erro?*
40. El kio vi tion konkludas? — *De onde você concluiu isso?*

41. Kion, do, mi kredu serioze? — *Em que devo crer seriamente?*
42. Kies estas tiuj ĉi infanoj? — *De quem são estas crianças?*
43. Kion mi povas prezenti? — *O que posso oferecer?*
44. Kion pritraktas ĉio tio? — *Que quer dizer tudo isso?*
45. Kioma tago estas hodiaŭ? — *Que dia é hoje?*

46. Kion vi opinias pri tio? — *O que lhe parece?*
47. Ĉu vi konas lin persone? — *Você o conhece pessoalmente?*

---

[37] *Usa-se "**klarigi**" no sentido de explicar, esclarecer (assunto, fato, etc.).*

[38] *Usa-se "**ekspliki**" no sentido de explicar, esclarecer (texto, leitura, etc.).*

48. Kio povus esti la kialo? — *Qual seria (a razão) o porquê?*
49. Ĉu vi venis antaŭhieraŭ? — *Você veio antes de ontem?*
50. Kion vi pensas pri tio? — *O que você pensa disso?*

51. Ĉu vi permesas, sinjoro? — *O senhor permite?*
52. Ĉu vi povas diri al mi? — *Você pode me dizer?*
53. Je kioma horo vi venos? — *A que hora você virá?*
54. Al kio tio estas utila? — *Para que serve isso?*
55. Pri kio estas la afero? — *De que se trata?*

56. Kun kiu vi korespondas? — *Com quem você corresponde?*
57. Kion vi konsilas al mi? — *O que você me aconselha?*
58. Por kio vi bezonas ĝin? — *Para que você precisa disto?*
59. Ĉu tio apartenas al vi? — *Isso lhe pertence?*
60. Ĉu tio interesas al vi? — *Isso lhe interessa?*

61. Ĉu ĝi estas via opinio? — *É esta a sua opinião?*
62. Kiel vi estas nomata? — *Como você se chama?*
63. Kiel tio estas nomata? — *Como se chama isso?*
64. Kion vi vidas interne? — *O que você vê dentro?*
65. Ĉu mi povus tion fari? — *Eu podia acaso fazê-lo?*

66. Kioman doton ŝi havas? — *Que dote tem ela?*
67. Kiu estis la gajninto? — *Quem ganhou?*
68. Kiun vojon ni elektos? — *Por onde iremos?*
69. Kiam vi aŭdis pri tio? — *Quando ouviu falar isso?*
70. Kion vi diras pri tio? — *O que você diz acerca disso?*

71. Ĉu vi povas helpi min? — *Você pode ser-me prestativo?*
72. Ĉu vi parolas serioze? — *Você está falando a sério?*
73. Ĉu mi multe ĝenas vin? — *Estou perturbando-o muito?*
74. Ĉu vi estas kontenta? —*Você está contente?*

75. Kiu sidas sur la seĝo? — *Quem está sentado na cadeira?*

76. Kion mi faros el tio? —*O que vou fazer com isso?*
77. En kia urbo vi loĝas? — *Em que cidade você mora?*
78. Kiel ĝi ŝajnas al vi? — *Que lhe parece?*
79. Kiu diris tion al vi? — *Quem lhe disse isso?*
80. Kiun vi volas paroli? — *A quem você quer falar?*

81. Kiom el vi povas iri? — *Quantos de vocês podem ir?*
82. Kien vi metis mian... ? — *Onde você colocou minha... ?*
83. Ĉu vi jam aŭdis, ke... ? — *Você já ouviu dizer que... ?*
84. Ĉu vi ŝatus ricevi... ? — *Você gostaria de receber... ?*
85. Kiel plaĉas al vi... ? — *Como lhe agrada... ?*

86. Kiom mi ŝuldas al vi? — *Quanto estou lhe devendo?*
87. Kial vi ne respondas? — *Por que você não responde?*
88. Ĉu vi parolas kun mi? — *É comigo que você fala?*
89. De kiu vi sciis tion? — *De quem você soube isso?*
90. Kiel vi estas nomata? — *Como você se chama?*

91. Ĉu vi komprenis min? — *Você me entendeu?*
92. Ĉu vi bone amuziĝis? — *Você se divertiu bem?*
93. Ĉu li diris ja tion? [39] — *Ele disse isso mesmo?*
94. Ĉu vi komprenas ŝin? — *Você está compreendendo-a?*
95. Ĉu ja li diris tion? [39] — *Será que foi mesmo ele quem teria dito isso?*

96. Kia estas la vetero? — *Como está o tempo?*
97. Kiu el ni ne eraras? — *Quem de nós não erra?*
98. Kiu povas antaŭvidi? — *Quem pode prever?*
99. Ĉu vi metis ĝin ien? — *Você o pôs em algum lugar?*
100. Ĉu vi ne freneziĝos? — *Você não vai se enlouquecer?*

101. Kion ni faru per ĝi? — *O que faremos com isso?*
102. Kiam ĝi estos preta? — *Quando ficará pronto?*
103. Kio rezultis el tio? — *Qual o resultado disso?*
104. Ĉu vi komprenas min? — *Você está me entendendo?*
105. Ĉu li ja diris tion? [39] — *Será mesmo que ele tenha dito isso?*

106. Kien vi deziras iri? — *Aonde você quer ir?*
107. Kion oni devas fari? — *O que se deve fazer?*
108. Pri kiu vi demandas? — *Por quem você pergunta?*
109. Kio estas la kaŭzo? — *Qual é a causa?*
110. Kion vi volis diri? — *O que você quis dizer?*

111. Ĉu vi ŝatus havi... ? — *Você gostaria de ter..?*
112. Ĉu vi havas emon... ? — *Você tem vocação para..?*

---

[39] *Observe que a tradução não tem o mesmo sentido na frase com o uso de "**ja**" colocado em diferentes posições na frase.*

113. Kiam vi ekiros al.... ? — *Quando você partirá para..?*
114. Kiam vi venos el..? — *Quando você virá de..?*
115. Kiam vi iros al..? — *Quando você irá para..?*

116. Ĉu ja min vi vokis? [39] — *Foi a mim que você chamou?*
117. Ĉu tio estas fakto? — *É de fato?*
118. Pri kio li parolos? — *Sobre o que ele falará?*
119. Kiel vi faris tion? — *Como você fez isso?*
120. Ĉu iu povus diveni? — *Acaso alguém poderia adivinhar?*

121. Kiel vi nomas tion? — *Como você chama a isso?*
122. Ĉu vi permesas min? — *Você me permite?*
123. Ĉu li jam foriris? — *Ele já foi?*
124. Ĉu vi estas preta? — *Você está pronto?*
125. Kion li diris plu? — *O que mais disse ele?*

126. Pri kio vi pensas? — *Em que você está pensando?*
127. Kio signifas tion? — *O que significa isso?*
128. Kiom longe vi iros? — *Até aonde você vai?*
129. Kiomjara vi estas? — *Quantos anos você tem?*
130. Ĉu (estas) io nova? — *(Há) algo de novo?*

131. Ĉu iu povas helpi? — *Pode alguém ajudar?*
132. Ĉu vi venos kun mi? — *Você virá comigo?*
133. Ĉu vi iras hejmen? — *Você vai para casa?*
134. Kiel plaĉas al vi? — *Como lhe agrada?*
135. Al kio ĝi servas? — *Para que serve?*

136. Kion vi postulas? — *O que você está pedindo?*
137. Kio estas ĉi tio? — *O que é isto?*
138. Kion vi deziras? — *O que você deseja?*
139. Kiun vi atendas? — *Quem você está esperando?*
140. Kion vi serĉas? — *O que você está procurando?*

141. El kie vi venas? — *De onde você vem?*
142. Ĉu vi iros tien? — *Você irá lá?*
143. Kio fariĝis el vi? — *O que foi feito de você*
144. Ĉu vi estas surda? — *Você é surdo?*
145. Kiel vi faras ĝin? — *Como você o faz?*

146. Ĉu estas novaĵo? — *Há notícias?*
147. Ĉu vi jam finis? — *Você já concluiu?*
148. Kiam okazos tio? — *Quando se realizará isso?*
149. Ĉu vi konas min? — *Você me conhece?*
150. Ĉu iu faris tion? — *Alguém fez isso?*

151. Kiam vi naskiĝis? — *Quando você nasceu?*
152. Kiomaĝa vi estas? — *Que idade você tem?*
153. Kioma horo estas? — *Quantas horas são?*
154. Kiomope vi estas? — *Quantos são ao todo?*
155. Ĉu li estas tie? — *Ele está lá?*
156. Ĉu tie li estas? — *É lá que ele está?*
157. Kio estas al vi? — *O que há com você?*
158. Je kio sin teni? — *A que ater-se?*
159. Ĉu li ja venos? — *Será que ele vem mesmo?*
160. Kion vi trovis? — *O que você encontrou?*

161. Kion vi kaŝis? — *O que você escondeu?*
162. Ĉu sammaniere? — *Do mesmo modo?*
163. Kiuj vi estas? — *Quem são vocês?*
164. Kiu estas tie? — *Quem está lá?*
165. En kiu strato? — *Em que rua?*

166. Kion vi farus? — *O que você faria?*
167. Kion vi volas? — *O que você quer?*
168. Kion vi diris? — *O que você disse?*
169. Pri kio temas? — *Qual é a questão?*
170. Kiu estas tiu? — *Quem é aquele?*

171. Kiu estas tie? — *Quem está lá?*
172. Kiom vi volas? — *Quanto você quer?*
173. Al kio utilas? — *Que adianta?*
174. Kio estas tio? — *O que é isso?*
175. Kie vi loĝas? — *Onde você mora?*

176. Kion mi faru? — *O que vou fazer?*
177. Kio mankas? — *O que está faltando?*
178. Kio okazas? — *O que se passa?*
179. Ĉu vi finis? — *Você acabou?*
180. Kion fari? — *Que fazer?*

181. Kio estas? — *O que é?*
182. Ĝis kiam? — *Até quando?*
183. Ĉu vere? — *Deveras?*
184. Ĉu jes? — *É? — Verdade?*
185. Ĉu ne? — *Não é? — Não?*

15. ORDONAJ FRAZOJ — *FRASES IMPERATIVAS*

1. Ne ekpepi! Ne movi la buŝon! — *Nem um pio! Bico calado!*
2. En bona ordo tra la pordo!* — *Dê o fora! Vai-te daqui!*
3. For de tie ĉi, kanajlo! — *Fora daqui, canalha!*
4. For de tie ĉi, fripono! — *Fora daqui, patife!*
5. Venigu lin tien ĉi, tuj! — *Mande-o vir aqui já!*

6. Enpakiĝu kaj foriĝu!* — *Caia fora! Suma-se!*
7. Laboru kaj ne parolu! — *Trabalhe e não fale!*
8. Studu kaj ne ŝercu! — *Estude e não graceje!*
9. Plenumiĝu mia volo! — *Cumpra-se a minha vontade!*
10. Studu kaj ne ludu! — *Estude e não brinque!*

11. Gardu vi! Atentu! — *Cuidado! Atenção!*
12. Ne estu hastema! — *Não seja apressado!*
13. Fermu la buŝon! — *Cale a boca!*
14. Ne plu rigardu! — *Não olhe mais!*
15. Ne kraĉu teren! — *Não cuspa no chão!*

16. Iru al infero! — *Vá para o inferno!*
17. Forprenu tion! — *Remova isso!*
18. Vivu la morto! — *Viva a morte!*
19. For de tie ĉi! — *Fora daqui!*
20. Ne balbutu! — *Não gagueje! Não balbucie!*

21. Faru aŭ mortu! — *Faça ou morra!*
22. Respondu iel! — *Responda de algum modo!*
23. Ne tiom kriu! — *Não grite tanto!*
24. Aŭskultu min! — *Ouça-me!*
25. Pensu denove! — *Pense novamente!*

26. Vivu la vivo! — *Viva a vida!*
27. Ni foriru! — *Vamos!*
28. Starigu vin! — *Levante(m)-se!*
29. Ne tiklu min! — *Não me faça cócegas!*
30. Estu kuraĝa! — *Seja corajoso*

31. Tuj! Rapidu! — *Ande! Avie-se!*
32. Foriru tuj! — *Dê o fora!*
33. Sidigu vin! — *Sente-se!*
34. Silentu! — *Silêncio!*
35. Ne rigardu! — *Não olhe!*

36. Kapitulacu! — *Renda-se!*
37. Ne forgesu! — *Não esqueça!*
38. Ne grumblu! — *Não resmungue!*
39. Ne disputu! — *Não dispute!*
40. Iru for! — *Retire-se!*

41. For de tie! — *Dê o fora daí!*
42. Ne flustru! — *Não segrede!*
43. Sekvu min! — *Siga-me!*
44. Ne parolu! — *Não fale!*
45. Gardu vin! — *Cuidado!*

46. Restu tie! — *Fique aí!*
47. Ne plendu! — *Não se queixe!*
48. Ne babilu! — *Não tagarele!*
49. Ne hezitu! — *Não vacile!*
50. Ĵetu enen! — *Jogue aí dentro!*

51. Ne atendu! — *Não espere!*
52. Kvietiĝu! — *Fique quieto!*
53. Aŭskultu! — *Dê atenção! Ouça!*
54. Li atendu! — *Que ele espere!*
55. Perforte! — *Com violência!*

56. Momenton! — *Um momento!*
57. Ne flatu! — *Não elogie!*
58. Ne lantu! — *Não seja vagaroso!*
59. Ne pluen! — *Basta!*
60. Komencu! — *Ande! Ânimo!*

61. Kliniĝu! — *Curve-se! Incline-se!*
62. Subtenu! — *Sustente! Escore!*
63. Stariĝu! — *Levante-se!*
64. Daurigu! — *Vamos! Continue!*
65. Ne diru! — *Não diga!*

66. Iru for! — *Ponha-se lá fora!*
67. Miraklo! — *Milagre!*
68. Kuraĝe! — *Eia! Coragem!*
69. Atentu! — *Atenção! Cuidado!*
70. Kviete! — *Silêncio!*

71. Eltenu! — *Aguente! Suporte!*
72. Sidiĝu! — *Sente-se!*
73. Kuraĝon! — *Coragem!*
74. Foriru! — *Fora!*
75. Elfaru! — *Acabe!*

76. Ni iru — *Vamos!*
77. Ripozu! — *Repouse!*
78. Parolu! — *Fale!*
79. Atendu! — *Espere!*
80. Ne boju! — *Não late!*

81. Rapide! — *Depressa!*
82. Lante! — *Lentamente!*
83. Eniru! — *Entre!*
84. Eliru — *Saia!*
85. Pensu! — *Pense!*

86. Restu! — *Fique!*
87. Pruvu! — *Demonstre! Prove!*
88. Provu! — *Experimente!*
89. Haltu! — *Pare! Alto!*
90. Sidu! — *Fique sentado!*
91. Ekiru! — *Ande!*
92. Diru! — *Diga!*
93. Pafu! — *Dê um tiro!*
94. Legu! — *Leia!*
95. Aŭdu! — *Ouça dizer! Ouça*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

balbuti — gaguejar, balbuciar; **babili** — parolar, tagarelar; **provo** — prova, ensaio; **pruvo** — prova, demonstração; **grumbli** — resmungar, rosnar; **plendi** — queixar-se, deplorar; **provi** — ensaiar, experimentar; **pruvi** — demonstrar, fazer fé

* Modismo

16. EKKRIAJ FRAZOJ — *FRASES EXCLAMATIVAS*

1. Kiel zorgema vi estas por mi! — *Como você é zeloso de mim!*
2. Per kio mi povas servi vin? — *Em que lhe posso ser útil?*
3. Kia mallaborema vi estas! — *Como você é preguiçoso!*
4. Nenio alia estas farebla! — *Que remédio!*
5. Kia sensenculo vi estas! — *Que insensato você é!*

6. Kiel vulgarulo vi estas! — *Como você é vulgar!*
7. Kia balbutulo vi estas! — *Como você é gago!*
8. Kia sentaŭgulo vi estas! — *Que malandro você é!*
9. Kia grumblulo vi estas! — *Como você é resmungão!*
10. Kiel li estas ĉifonulo! — *Como ele está maltrapilho!*

11. Kia trudemulo vi estas! — *Como você é intruso!*
12. Kia mokitulo li estas! — *Como ele é zombador!*
13. Kia fripono vi estas! — *Que trapalhão você é!*
14. Kia vantulo vi estas! — *Como você é vaidoso!*
15. Kia stultulo vi estas! — *Que imbecil você é!*

16. Kia ŝtormo en tetaso! — *Que tempestade em copo d'água!*
17. Kia idioto li estas! — *Que idiota ele é!*
18. Kia fuŝulo vi estas! — *Que porcalhão você é!*
19. Kia ruzulo vi estas! — *Que espertalhão você é!*
20. Kia vagulo vi estas! — *Que vagabundo você é!*

21. Kiaj belaj gamboj! — *Que pernas bonitas!*
22. Ve al la venkitoj! — *Ai dos vencidos!*
23. Kia patro, tia filo! — *Tal pai, tal filho!*
24. Kia malgaja viro! — *Que homem triste!*
25. Kia terura okazo! — *Que momento terrível!*

26. Jen la ĉiofarulo! — *Eis aqui o faz-tudo!*
27. Estas tute egale! — *Que me importa!*
28. Kia infera domo! — *Que casa infernal!*
29. Kia feliĉa ideo! — *Que idéia feliz!*
30. Mi opinias tiel! — *Acho assim!*

31. Kia bela nokto! — *Que bela noite!*
32. Kia sensencaĵo! — *Que disparate!*
33. Kia malfeliĉo! — *Que desastre!*
34. Kia ŝercemulo! — *Que brincalhão!*
35. Kia frenezulo! — *Que maluco!*

36. Kia malfruiĝo! — *Que demora!*
37. Kia voĉbruado! — *Que algazarra!*
38. Kia popolaĉo! — *Que ralé!*
39. Kia infanaĉo! — *Que pirralho!*
40. Kia anĝeleto! — *Que amor de criança!*

41. Dio min gardu! — *Deus me livre!*
42. Kia kerubeto! — *Que amor de criança!*
43. Kia demando! — *Que pergunta!*
44. Kia enviulo! — *Que invejoso!*
45. Admireginde! — *Formidável!*

46. Kia bagatelo! — *Que ninharia!*
47. Kia belulino! — *Que garota bonita!*
48. Kia surprizo! — *Que surpresa!*
49. Plena iluzio! — *Puro engano!*
50. Ha, kiel bele! — *Ah, como é belo!*

51. Kia fivorto! — *Que palavra feia!*
52. Prave, prave! — *Apoiado, apoiado!*
53. Konsentite! — *Está combinado!*
54. Kiamaniere? — *De que modo?*
55. Kia mizero! — *Que miséria!*

56. Kia muziko! — *Que música!*
57. Kia belaĵo! — *Que coisa bonita!*
58. Kia vizaĝo! — *Que cara!*
59. Kia edzino! — *Que mulher!*
60. Kia knabo! — *Que menino!*

61. Mi trovis! — *Eureca! Achei!*
62. Tiel estu! — *Assim seja! Amém!*
63. Kia voĉo! — *Que voz!*
64. Kia tago! — *Que dia!*
65. Kia enuo! — *Que aborrecimento!*

66. Kia tedo! — *Que amolação!*
67. Fi al vi! — *Que vergonha!*
68. Babilaĵo! — *Conversa! História!*
69. Interese! — *Interessante!*
70. Komencu! — *Ânimo! Ande!*

71. Silentu! — *Calada!*
72. Saluton! — *Ave! Salve!*
73. Dio volu! — *Queira Deus!*
74. Ve al mi! — *Ai de mim!*
75. Per Dio! — *Arre! Apre! Irra!*

76. Dio mia! — *Meu Deus!*
77. Pro Dio! — *Por Deus!*
78. Vantulo! — *Presumido!*
79. Trafite! — *Acertado! Certo!*
80. Kviete! — *Suavemente!*

81. Domaĝe! — *Bonito! Ora bolas!*
82. Kuraĝe! — *Coragem!*
83. Kuraĝon! — *Coragem!*
84. Klare! — *É claro!*
85. Ĉielo! — *Jesus!*

86. Prave! — *Apoiado!*
87. Brave! — *Bravo!*
88. Certe! — *Com certeza!*
89. Ho, ve! — *Ai de mim! Ai de nós!*
90. Nu, nu! — *Ora, ora!*

91. Nu do! — *Pois então!*
92. Bone! — *Bem!*
93. Bele! — *Bonito!*
94. Halo! — *Alô! Olá!*
95. Vivu! — *Viva!*

96. For! — *Fora!*
97. Hop! — *Upa!*
98. Bis! — *Outra vez! Bis!*
99. Zit! — *Zás-trás!*
100. Bum! — *Upa!*

101. Jen! — *Eis aqui!*
102. Ve! — *Que desgraça!*
103. Nu! — *Pois bem!*
104. Ba! — *Ora essa!*
105. Fi! — *Cruzes! Xi!*

17. JESAJ FRAZOJ — *FRASES AFIRMATIVAS*

1. Mi ĉeestis dum la fariĝo, kaj mi povas certigi ĝin al vi — *Fui testemunha do fato, por isso posso afirmá-lo*
2. Homo, diranta la veron, ne estas riproĉinda — *Uma pessoa que diz a verdade, não é censurável*
3. Mi eksciis ĝin de sinjoro..., kiu ĉeestis — *Tomei conhecimento disso pelo senhor..., que esteve presente*
4. Mi povas doni al vi pruvojn (pri tio) — *Posso fornecer-lhe provas (disso)*
5. Mi donas al vi mian vorton de honoro — *Dou-lhe minha palavra de honra*

6. Ekzistas nenia ombro da dubo pri tio — *Não existe nenhuma sombra de dúvida a este respeito*
7. Mi ĵuras al vi, ke tio estas la vero — *Juro-lhe que isso é verdade*
8. Mi estas volonte preta (inklina)... — *Estou disposto de bom grado...*
9. Mi donas mian honoran vorton al vi — *Dou-lhe a minha palavra de honra*
10. Certe, kiel unuoble unu estas unu* — *Certo, como dois e dois são quatro*

11. Mi diras al vi, ke ĝi estas vera — *Digo-lhe que isso é verdade*
12. Tio ĉi estis miaj lastaj vortoj — *Estas foram as minhas últimas palavras*
13. "Jes" diris ŝi, "vi estas prava" — *"Sim", disse ela, "você tem razão"*
14. Tio estas facile komprenebla — *Compreende-se isso facilmente*
15. Vi povas esti tute trankvila — *Você pode ficar tranquilo completamente*

16. Mi garantias la fakton al vi — *Garanto-lhe o fato*
17. Mi estas certa, mi lin vidis — *Estou certo de que o vi*
18. Tiu via opinio estas ĝusta — *Essa sua opinião é justa*
19. Mi diris tion al vi dekfoje — *Já lhe disse isso dez vezes*
20. Tio estas al mi indiferenta — *Não me importo. É-me indiferente*

21. Mi kredas, ke vi faros bone — *Creio que você fará bem*
22. Mi estas kompetenta pri tio — *Entendo disso*
23. Iu jam diris tion ĉi al mi — *Alguém já me disse isto*
24. Pri tio oni povas diskuti — *Pode-se argumentar sobre isso*
25. Se vi nepre deziras tion. — *Se você deseja isso impreterivelmente...*
26. Estas nediskutebla fakto — *É um fato indiscutível*
27. Ĝuste tion mi volis diri — *Eu quis dizer exatamente isso*
28. Mi (eksciis) sciiĝis, ke — *Eu soube que...*
29. Certe! (Mem)komprenēble! — *Certamente! Naturalmente!*
30. Mi havas klarigajn pruvojn — *Tenho provas evidentes*

31. Ĝuste tion mi volis diri — *Quis dizer exatamente isso*
32. Li ĉiam diradis la veron. — *Ele sempre disse a verdade*
33. Vi povas kalkuli je tio — *Você pode confiar nisso*
34. Tion mi volonte kredas! — *Creio nisso de bom grado*
35. Mi donos pruvojn al vi — *Eu lhe darei provas*

36. Oni ne povas nei tion — *Isto não se pode contestar*
37. Vi povas kredi al mi — *Você pode acreditar em mim*
38. Iu diris tion al mi — *Alguém me disse isso*
39. Tio ne estas grava — *Isso não é importante*
40. Ha! Komprenēble! — *Ah! É claro! De fato!*

41. Mi estas certa pri tio — *Estou certo disso*
42. Mi diris al li, ke jes — *Disse-lhe que sim*
43. Al kiu vi ĝin diras! — *A quem você o diz!*
44. Vi estas tute prava — *Você está cheio de razões*
45. Mi certe faros ĝin — *Certamente que o farei*

46. Mi vin certigas, ke jes! — *Asseguro-lhe que sim*
47. Mi vin certigas, ke ne — *Asseguro-lhe que não*
48. Nenio pli vera ol tio — *Nada mais verdadeiro*
49. Mi faros ĉion eblan — *Farei todo o possível*
50. Mi kredas, ke jes! — *Creio que sim*

51. Mi kredas tion volonte — *Não duvido disso*
52. Jen kio plaĉas al mi! — *Eis o que me agrada*
53. Memkomprenēble! — *Evidentemente!*
54. Se vi ne kontraŭas! — *Se você não se opõe!*

55. Sen ia ombro da dubo — *Sem qualquer sombra de dúvida*

56. Tio estas la pura vero — *Isso é a pura verdade*
57. Tion oni ne povas nei — *Não se pode negar isso*
58. Vi povas kredi al mi — *Pode acreditar-me*
59. Tute certe ĝi estas — *Com certeza é*
60. Ĝi estas realaĵo! — *É realidade!*

61. Mi certigas vin, ke jes — *Asseguro-lhe que sim*
62. Tiom pli bone (malbone) — *Tanto melhor (pior)*
63. Espereble! Verŝajne! — *Oxalá! Provavelmente!*
64. Tion mi ĵus volis — *Agora mesmo quis isso*
65. Tio estas la afero — *Isso é a questão*

66. Perfekte kaj sen komo** — *Perfeito e escorreito*
67. Tion mi ĵus volis diri — *Agora mesmo quis dizer isso*
68. Tio estas la ĉefafero — *Isso é a questão principal*
69. Mi ĵuras je l' honoro — *Dou-lhe minha palavra*
70. Tute laŭ via deziro — *Inteiramente como você deseja*

71. Per mia honoro! — *Por minha honra!*
72. Nenio pli vera — *Nada mais verdadeiro*
73. Kompreneble! — *Naturalmente! Claro!*
74. Sen ia dubo — *Sem nenhuma dúvida*

75. Estas vere — *É verdade*

76. Tio estas certa — *Isso está (é) certo*
77. Kia malkaŝemo! — *Que franqueza a sua!*
78. Kompreneble! — *Está claro! Seguramente!*
79. Ĉu ne vere! — *Não é assim!*
80. Jes, certe! — *Sim, com certeza!*

81. Ekster ĉia dubo — *Fora de qualquer dúvida*
82. Bone dirite! — *Muito bem!*
83. Trafite!** — *Isso mesmo! Exatamente!*
84. Jes, vere! — *Sim, é verdade!*
85. Nu jes! — *De acordo!!*

86. Prave! — *Apoiado!*
87. Klare! — *Claro!*
88. Certe! — *Com certeza!*
89. Jes! — *Sim!*
90. Ja! — *Deveras!*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

elteni sekreton — *guardar segredo;* **kontraŭpropono** — *contraproposta;* **esti devigita** — *ser forçado, obrigado;* **esti deviga** — *ser obrigatório;* **esti malprava** — *não ter razão;* **paroli malkaŝe** — *falar abertamente;* **esti tre lerta** — *ser jeitoso;* **esti malgrava** — *ser sem importância;* **esti prava** — *ter razão;* **gesti konsente** — *fazer um gesto de assentimento;* **fari decidon** — *tomar uma decisão;* **miskompreni** — *equivocar-se;* **esti grava** — *ser importante, relevante;* **decidiĝi** — *decidir-se;* **miskompreno** — *equívoco, malentendido;* **esti inklina** — *estar disposto, inclinado;* **miskompreni** — *equivocar-se;* **malparoli kaŝe** — *falar às escondidas;* **esti grava** — *ser importante, grave;* **esti preta** — *estar disposto, inclinado;* **kalkuli sur** — *contar com, confiar em;* **kalkuli je** — *contar com, confiar em;* **malpermesi** — *vedar, proibir;* **malvolonte** — *contra a vontade;* **trankvila** — *calmo, quedo, sereno;* **kontraŭvole** — *contra a vontade;* **preferinda** — *preferível;* **neĉefafero** — *questão secundária;* **recertigi** — *confirmar;* **gardi sin** — *acautelar-se;* **ekzakta** — *exato, certo, rigoroso;* **preciza** — *exato, certo, justo, preciso;* **ĝusta** — *exato, justo, preciso;* **justa** — *exato, reto, justo, equitativo;* **fariĝo** — *acontecimento, fato;* **ĝoji** — *estar contente;* **ĝui** — *gozar, apreciar;* **ĵusa** — *de agora, recente;* **jesi** — *afirmar, dar o "sim";* **ĵus** — *agora mesmo, neste instante (passado);* **ĉefafero** — *essencial, principal;* **aŭskulti** — *ouvir, dar atenção a;* **prefere** — *antes, de preferência;* **permesi** — *autorizar, dar licença;* **kvieta** — *calmo, quieto, sossegado;* **kontraŭ** — *opor-se, contrariar;* **singarda** — *cauteloso, cuidadoso;* **certigi** — *afirmar, assegurar;* **proponi** — *oferecer, propor;* **volonte** — *por bem, de boa vontade*

kalkuli sur + ac. = kalkuli je; fari decidon = decidiĝi; indiferenta = tutegala; esti prava = pravi; esti malprava = malpravi

* Corresponde ao nosso português: "Dois e dois são quatro"
** Modismo

18. NEAJ FRAZOJ — *FRASES NEGATIVAS*

1. Mi pretendas, ke vi eraras, ĉar mi ne volas diri ion pli — *Digo-lhe que você está errado para não dizer-lhe mais nada*
2. Vi ne devas diri tion, ĉar tio ne estas kredebla — *Você não deve dizer isso, por que isso não é crível*
3. Permesu, sinjorino, ke mi diru al vi, vi eraras — *Com licença, senhora, que eu lhe diga que você está errada*
4. Mi ne povas kredi, ke tio iam okazis — *Não posso crer que isso tenha acontecido*
5. Vi estas en la plej granda eraro — *Você está completamente errado*

6. Fraŭlino, vi estas en plena eraro — *Senhorinha, você está enganadíssima*
7. Ne bezone estas paroli pri tio — *Não vale a pena falar nisso*
8. Vi eraras, mi neniam tion diris — *Você está errado, eu nunca disse isso*
9. Tion mi ne povas permesi al mi — *Não posso tomar a liberdade para isso*
10. Tion sciis nek mi, nek iu alia — *Isso não sabia eu, nem ninguém*

11. Mi estis malprava, mi konfesas — *Não tinha razão, confesso-lhe*
12. Mi neniam vidis tian virinon — *Nunca vi tal mulher*
13. Mi ne povas konsenti pri tio — *Não posso consentir nisso*
14. Tio bedaŭrinde ne estas ebla — *Infelizmente não é possível*
15. Tion mi ne permesas. Absolute — *Não permito isso. Absolutamente*

16. Tio bedaŭrinde ne estas ebla — *Isso, infelizmente, não é possível*
17. Vi provas kredigi tion al mi — *Você tenta fazer-me crer nisso*
18. Nenio malpli malvera ol tio — *Nada menos mentiroso do que isso*
19. Mi ne povis antaŭscii tion — *Não me foi possível pressenti-lo*
20. Mi ne vidas kaŭzon por tio — *Não vejo razão para isso*

21. Mi estas tro multe okupita — *Estou demasiado ocupado*
22. Mi ne vidas kaŭzon por tio — *Não vejo motivo para isso*
23. Tion mi ne povis antaŭscii — *Não pude pressentir isso*
24. Tio ne estas grava por mi — *Isso não é importante para mim*
25. Permesu, sinjoro, vi eraras — *Perdão, senhor, você está enganado*

26. Mi konas nenion super tio — *Nada sei além disso*
27. Ne penindas paroli pri ĝi — *Não vale a pena falar nisso*
28. Ni bezonas nenian helpon — *Não precisamos de nenhuma ajuda*
29. Mi neniel povas fari ĝin — *Não posso fazê-lo de modo nenhum*
30. Nenio pli malvera ol tio — *Nada mais mentiroso do que isso*

31. Nek pikite, nek hakite [40] — *Nem uma coisa nem outra*
32. Mi bezonas nenian helpon — *Não preciso de nenhum auxílio*
33. Tio ne valoras la penon — *Isso não vale a pena*
34. Tion mi ne povas imagi — *Não posso fazer ideia disso*
35. Vi trovas vin en eraro — *Você está (errado) enganado*

36. Nenial mi akceptos tion — *Por nenhum motivo aceitarei isso*
37. Tio ŝajnas al mi neebla — *Isso me parece impossível*
38. Bedaŭrinde ne; kontraŭe — *Infelizmente não; ao contrário*
39. Mi vin certigas, ke ne — *Asseguro-lhe que não*
40. Mi ne povas scii tion — *Não estou à altura de sabê-lo*

41. Ne metu vian nazon [41] — *Não se meta*
42. Vi devas ne diri tion — *Você não deve dizer isso*
43. Mi ne povas helpi vin — *Não posso ajudá-lo*
44. Tio ne estas evitebla — *É inevitável*
45. Mi neniam tion kredos — *Jamais acreditarei nisso*

46. Mi ne havas tempon — *Não tenho tempo*
47. Tio ne koncernas nin — *Isso não nos diz respeito*
48. Mi ne parolas al vi — *Não falo a você*
49. Tio ne estas necesa — *Não é necessário isso*
50. Tio neniel estas vera — *Isso de nenhum modo é verdade*

---

[40] *Modismo*

[41] *Figurativo*

51. Mi ne eksciis tion — *Eu não soube disso*
52. Mi ne opinias same — *Não sou da mesma opinião*
53. Mi rezignas je tio — *Desisto disso*
54. Ne estis mia kulpo — *Não foi por minha culpa*
55. Oni mensogis al vi — *Alguém pregou-lhe uma mentira*

56. Mi ne kredas tion — *Não creio nisso*
57. Mi nepre neas ĝin — *Nego-o formalmente*
58. Nei estus mensogi — *Negar seria mentir*
59. Tion vi devas nei — *Você deve negar isso*
60. Tio ne estas vera — *Isso não é verdade*

61. Tiu iu mensogis — *Esse alguém mentiu*
62. Mi ne diris tion — *Eu não disse isso*
63. Ne, ne estas eble — *Não, não é possível*
64. Estas senutile! — *Não vale a pena!*
65. Tute ne! Neniel! — *De nenhum modo! Nem por sombra!*

66. Nek io nek alio — *Nem uma coisa nem outra*
67. Mi neas formale — *Nego formalmente*
68. Nun momente, ne — *Por ora não*
69. Ne tre volonte — *Não de bom grado*
70. Ne diru tion! — *Não diga isso!*

71. Ne povas esti — *Não pode ser*
72. Tute ne urĝas — *Não é urgente absolutamemente*
73. Estas malvere — *É falso*
74. Bedaŭrinde ne — *Infelizmente não*
75. Mi ankaŭ ne! — *Nem eu!*

76. Vi trompiĝas — *Você se engana*
77. Estas neeble — *É impossível*
78. Estas nevere — *Não é verdade*
79. Neniu el ni — *Nenhum de nós*
80. Mi ne timas — *Não tenho medo*

81. Ne, ne vera — *Não, não é verdade*
82. Vi eraras — *Você está errado*
83. Kontraŭe! — *Pelo contrário!*
84. Eĉ ne mi! — *Nem eu mesmo!*
85. Tute ne! — *Nada disso!*

86. Ne eble! — *Não é possível!*
87. Ne neu! — *Não negue!*
88. Tute ne! — *De modo algum!*
89. Neniel! — *De nenhum modo!*
90. Neeble! — *Impossível!*

19. ĈIUTAGAJ FRAZOJ — *FRASES DE USO DIÁRIO*

1. Morgaŭ mi donos kalkulan raporton pri tiu afero — *Amanhã prestarei contas dessa questão*
2. Antaŭ tri horoj mi estis en la restoracio [42] — *Há três horas estive no restaurante*
3. Post du horoj mi estos en Parizo [43] — *Dentro de duas horas estarei em Paris*
4. Hodiaŭ vi estas en maltaŭga humoro — *Hoje você está de mau humor*
5. Hodiaŭ mi estas en taŭga humoro — *Hoje estou de boa maré*

6. Havante bonan cerbon, li venkis ĉion — *Tendo boa cabeça, ele venceu tudo*
7. Mi ne cerbumis pri la afero — *Não matutei sobre o assunto*
8. Kiam ajn li venos, li estos bonvena — *Seja quando for, ele será bem-vindo*
9. Hodiaŭ, kara amiko, mi estas senmona — *Hoje, meu amigo, estou sem dinheiro*
10. Li sidas kie ajn li volas — *Ele fica sentado seja onde for que ele queira*

11. Nek proksima, nek malproksima — *Nem perto, nem longe*
12. Vi estas nek bona nek malbona — *Você nem é bom nem mau*
13. Mi ne scias, ĉu iri aŭ resti — *Não sei se vou ou (se) fico*
14. Jen li kuras, jen li marŝas — *Ora ele corre, ora ele anda*
15. Vi povas elekti aŭ unu aŭ la alian — *Você pode escolher um ou outro*

16. Bedaŭrinde, vi estas iom tro juna — *Infelizmente, você está um tanto jovem*
17. Tiu kiu volas venki, tiu devas strebi — *Aquele que quer vencer, deve esforçar-se*
18. Ŝi preskaŭ diskrevas pro ĝojo — *Ela não cabe em si de contente*
19. Li preskaŭ diskrevas pro grasego — *Ele não cabe na pele de gordo*
20. Ĉu vi diris, ke li estas fimensa? — *Você disse que ele é de mentalidade sórdida?*

21. Li estas homo sperta kaj lerta — *Ele é um homem experiente e hábil*
22. Mi ne afektas la kompetentecon — *Não me finjo entendido*
23. Ŝi konstruis kastelon en aero — *Ela fez castelos no ar*
24. Ŝi ungoklakas sur mia kapo — *Ela me faz cafunés*
25. Ili faras nenion krom promeni — *Eles não fazem outra coisa senão passear*

26. Mi ne povas preterlasi skribi — *Não posso deixar de escrever*
27. Mi ne povas preterlasi paroli — *Não posso deixar de falar*
28. Ŝi venis al mi en la ideon — *Ela me veio à idéia*
29. Ne faru al vi la klopodon — *Não se dê ao trabalho*
30. Li donis al mi evitkialon — *Ele me respondeu com evasivas*

31. Mi faris komplezon al ŝi — *Eu lhe prestei um serviço*
32. Vi pagas por la festeno * — *Você é quem paga o pato*
33. Ne diru, sed montru! — *Não diga, mas mostre!*
34. Ne montru, sed diru! — *Não aponte, mas diga!*
35. Neniu venis hodiaŭ — *Ninguém veio hoje*

36. Vi estas senfamulo — *Você é um joão-ninguém*
37. Mi eksciis pri tio — *Inteirei-me disso*
38. Tio estas por mi — *Isso é para mim*
39. Ho! estas nenio — *Oh! Não é nada*
40. Tio mirigis min — *Isso me surpreendeu*

41. La mano jukas min — *Sinto comichão nas mãos*
42. Ĉio sur sia loko! — *Cada coisa em seu lugar!*
43. Ĉio estas finita — *Tudo está terminado*
44. Pendigu la bildon — *Pendure o quadro*
45. Nenio estas preta — *Nada está pronto*

46. Nu ni daŭrigu! — *Bem, continuemos!*
47. Morte kondamnita — *Condenado à morte*
48. Poste mi revenos — *Voltarei mais tarde*
49. Jen vi havas! — *Ora aí está!*
50. Ne tuj foriru! — *Não vá embora logo!*

---

[42] ***antaŭ*** — *há, faz (indicando tempo passado)*

[43] ***post*** — *dentro de (indicando tempo), depois de*

preskaŭ diskrevi pro grasego — *não caber na pele de gordo*; **doni kalkulan raporton pri —** *prestar contas de;* **esti en maltaŭga humoro —** *não estar de boa maré*; **doni al iu evitkialon —** *responder a alguém com evasivas*; **ne povi preterlasi —** *não poder deixar de*; **fari nenion krom —** *não fazer outra coisa senão*; **havi ne bonan cerbon —** *não ter boa cabeça (para aprender);* **cerbumi pri io —** *quebrar a cabeça, matutar sobre alguma coisa;* **ekscii pri io —** *inteirar-se de algo*; **konstrui kastelon en aero —** *construir castelos no ar*; **preskaŭ diskrevi pro ĝojo —** *não caber em si de contente*; **pagi por fremda festeno —** *pagar o pato*; **esti en taŭga humoro —** *estar de boa maré*; **ungokla-ki sur ies kapo —** *fazer cafunés em alguém*; **afekti la kompetentecon —** *fingir-se de entendido*; **veni al iu en la ideon —** *vir à ideia de alguém*; **havi bonan cerbon —** *ter boa cabeça (para aprender)*; **fari klopodon al iu —** *dar trabalho a alguém*; **esti fimensa —** *ser de mentalidade sórdida;* **fari komplezon al** — *fazer um favor a;* **urĝa de-mando** — *pergunta urgente;* **flata vorto** — *palavra de elogio;* **senfamulo** — *joão-ninguém;* **onidiro** — *boato;* **kiu ajn** — *seja quem for;* **kien ajn** — *seja para onde for;* **kie ajn** — *seja onde for;* **kia ajn** — *seja de que espécie for;* **kio ajn** — *seja o que for;* **kiu ajn** — *seja quem for;* **kiom ajn** — *seja quanto for;* **treege** — *excessivamente;* **troa** — *exces-sivo, exagerado;* **tro** — *demais, demasiado;* **tre** — *muito, bem;* **juki** — *sentir coceiras;* **esti senmona** — *estar sem dinheiro;* **nek... nek...** — *nem ... nem;* **jen... jen...** —*ora ... ora ...;* **aŭ ... aŭ ...** — *ou ... ou;* **... ĉu ... ĉu ...** — *se ... ou ...;* **klopodi** — *esforçar-se, empenhar-se;* **peni** — *esforçar-se, dar-se ao trabalho;* **strebi** — *esforçar-se, procurar atingir;* **montri** — *mostrar, apontar;* **sperta** — *perito, experiente;* **lerta** — *ágil, hábil, capaz;* **iomete** — *um pouquinho;* **iom** — *um pouco, algo, um tanto;* **sed** — *mas, porém;* **nur** — *só, somente;* **eĉ** — *mesmo;* **pri** — *sobre, a respeito de*

* Idiotismo

3. Os sons (e com eles as letras) podem ser:

a) Consoantes
bcĉdfgĝhĥĵklmnprsŝtvz

b) Vogais
a e i o u

c) Semi-vogais
j ŭ

d) Ditongos

aj,	**ej,**	**oj,**	**uj,**	**ja,**	**je,**	**jo,**	**ju,**	**aŭ,**	**eŭ**
ái,	**êi,**	**ôi,**	**úi,**	**iá,**	**iê,**	**iô,**	**iú,**	**áu,**	**êu**

ACENTO

4. Em esperanto, em cada palavra de duas ou mais sílabas, o acento recai sem exceção sobre a penúltima sílaba:

LEIA EM VOZ ALTA

a-**e**-ro — a-**be**-lo — a-vi-a-**di**-lo — a-**mu**-zi — **deks**-tra — ba-la-**i**-lo — **paj**-lo — **ga**-ja — **vej**-no — **ler**-ne-jo — re-**i**-ro — pi-**e**-do — so-**i**-fo — **soj**-lo — **vo**-jo — **tu**-ja — mi-li-**o**-no — **haŭ**-to — he-**ro**-o — de-**man**-di — du-**u**-lo — ba-**la**-u — ek-**kri**-i — re-**i**-ri — **ne**-vo — **pra**-a-vo — vi-**an**-do.

Continua na página 82

ESPERANTO PORTUGUÊS
(CONVERSAÇÃO)

Lo scopo supremo di tutti gli uomi dovrebbe essere: creare un'umanitá armoniosa.
Le but de tous les hommes devrait être de créer une humanité harmonieuse.
O propósito de todos os homens devia ser: criar uma humanidade harmoniosa,
The aim of all people ought to be the creation of a harmonious mankind,
La celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron.
Zamenhof

Amor vincit omnia — **Amo venkas ĉion** — O amor vence tudo

ĈAPITRO IV — CAPÍTULO IV

De gustibus et coloribus non est disputandum.
Pri gustoj kaj koloroj oni ne povas diskuti.
Gostos e cores não se discutem

---------------------oOo---------------------

Pli bona amiko intima ol parenco malproksima.
Mais vale um amigo próximo que um parente afastado.

20. Por Konsenti — *Para consentir*

1. Vi povas esti certa, ke mi faros ĉion, kio dependos de mi — *Pode estar certo, de que farei tudo o que depender de mim*
2. Ni bedaŭras ilin, sed gardu nin, ke ni ilin ne sekvu — *Lamentemo-los e evitemos de imitá-los*
3. Mi ĝojas, ke vi havas tian saman opinion kiel mi — *Alegro-me que você tenha a mesma opinião que eu*
4. Mi estas feliĉa trovi okazon esti agrabla al vi — *Estou feliz de ter a sorte de ser-lhe agradável*
5. Mi faros por vi, kion mi ne farus por alia — *Farei por você o que não faria para outrem*

6. Kial vi ne parolis al mi pli frue? — *Por que você não me falou mais cedo?*
7. Mi efektive timas trouzi vian... — *Receio realmente abusar de sua...*
8. Mi dezirus fari pli grandan servon — *Gostaria de prestar-lhe um serviço*
9. Nenio pli facile kompreneble — *Nada mais natural*
10. Mi do povas unu fojon utili al vi — *Posso então ser-lhe útil uma vez*

11. Mi efektive timas trouzi vian ĝentilecon — *Receio realmente abusar de sua amabilidade*
12. Mi dezirus fari al vi pli grandan servon — *Gostaria de prestar-lhe um melhor serviço*
13. Ĉion novan li tuj senpripense akceptas — *Tudo o que seja novo ele aceita imediatamente sem refletir*
14. Nun vi estas tute prava, kara fraŭlino — *Agora você tem toda razão, cara senhorinha*
15. Mi neniam povas malkonsenti kun vi — *Nunca posso discordar de você*

16. Mi esperas, ke vi konsentos pri tio — *Espero que você concorde com isso*
17. Vi bone faris turnante vin al mi — *V. agiu bem em se dirigir a mim*
18. Mi estas tute preta servi al vi — *Estou ao seu inteiro dispor*
19. Mi certe iros, vi povas konfidi — *Irei com certeza, pode confiar*
20. Uzu miajn servojn, kiom vi volos — *Disponha sempre quando quiser*

21. Mi akceptas kun granda plezuro — *Aceito com grande prazer*
22. Mi tute akceptas vian opinion — *Eu aceito completamente a tua opinião*
23. Ŝajnas al mi, ke li estas prava — *Parece-me que ele tem razão*
24. Mi prenas sur min vian aferon — *Eu me encarrego do seu caso*

25. Saĝa kapo duonvorton komprenas — *A bom entendedor meia palavra basta*
26. Mi ne povas konsenti pri tio — *Não posso consentir isso*
27. Mi tute dividas vian opinion — *Sou da sua opinião*
28. Sciigu min, se vi min bezonos — *Avise-me, se precisar de mim*
29. Mi povas nenion rifuzi al vi — *Não lhe posso recusar nada*

30. Ĉu vi ne ankaŭ opinias tion? — *Você não concorda também com isso?*
31. Mi kredas, ke vi estas prava — *Creio que você tem razão*
32. Nu, mi imitos vian ekzemplon — *Bem, seguirei seu exemplo*
33. Mi tuj estos je via dispono — *Estou às suas ordens agora mesmo*
34. Tio estas vera, sed ne ĉio — *É verdade, mas não tudo*

35. Mi estas volonte inklina... — *Com muito gosto estou disposto a...*
36. Mi atendas viajn ordonojn — *Espero suas ordens*
37. Se vi nepre tion deziras! — *Se você deseja isso mesmo!*
38. Vi estas prava pri tio — *Você tem razão sobre isso*
39. Mi pensas laŭ via opinio — *Sou de sua opinião*

40. Mi estas volonte preta... — *Com muito gosto estou prestes a...*
41. Mi pensas same kiel vi — *Penso igualmente como você*
42. Ni konsentu pri tio! — *Vamos fazer uma coisa!*
43. Jes, min vi pravas — *Sim, agora você está certo*
44. Ĝi estas bona ideo — *É uma boa ideia*
45. Tute laŭ via deziro — *Inteiramente conforme o seu desejo*

46. Mi pensas, ke vi pravas — *Penso que você tem razão*
47. Ĉu vi (ne) konsentas? — *Você (não) concorda?*
48. Alprenu ĝin plezure! — *Aceite-o com prazer!*
49. Se vi ne kontraŭas! — *Se você não se opõe!*
50. Mi faros la eblon — *Farei o possível*

51. Mi ne pensas same kiel vi — *Não penso tal como você*
52. Mi konsentas pri tio — *Consinto isso*
53. Vi estas tute prava — *Você tem inteira razão*
54. Kredu al mi tute! — *Creia-me inteiramente!*
55. Kalkulu sur min! — *Conte comigo!*

56. Mi faros ĉion eblan — *Farei todo o possível*
57. Mi faris la eblon — *Fiz o possível*
58. Se plaĉas al vi! — *Se lhe agrada!*
59. Tiom pli bone! — *Tanto melhor!*
60. Kiam vi volos — *Quando você quiser*

61. Mi farus la eblon — *Faria o possível*
62. Mi estas por vi — *Sou a seu favor*
63. Vi estas prava — *Você tem razão*
64. Konsentite? — *Combinado?*
65. Estas eble — *É possível*

66. Trafa respondo! — *Bem respondido!*
67. Konsentite? — *De acordo?*
68. Verŝajne! — *Provavelmente!*
69. Nu, bone! — *Está bem!*
70. Nu, jes! — *De acordo!*

71. Ni estas kvitaj — *Estamos quites*
72. Kun plezuro — *Com prazer*
73. Jes, certe — *Com certeza, sim*
74. Jes, jes — *Sim, sim*
75. Vere! — *Verdade!*

GRAMATIKO – III

Nota 1. Semivogais são os fonemas **j** e **ŭ** átonos que se juntam à vogal vizinha, formando com esta uma só sílaba, logo, ditongo é a combinação de uma vogal + uma semivogal, ou vice-versa na mesma sílaba, portanto não se esqueça de que somente as letras **j** e **i** formam ditongos em esperanto. Vejamos: **aj ej oj uj ja je jo ju aŭ eŭ**.

> ILUSTRAÇÃO: Observe que em esperanto **ai**, **ei**, **oi**, **ui**, **ia**, **ie**, **io**, **iu**, **au**, **eu**, constituem 2 sílabas, visto conterem 2 vogais.

LEIA EM VOZ ALTA

reŭmatismo — neŭralgio — bajoneto — fraŭlino — najbaro — neŭtrala — salajro — lernejo — bojkoto — almenaŭ — tajloro — bedaŭri — kajero — eŭnuko — aŭguri — prujno — pejzaĝo — monujo — inkujo — akvujo — salujo — vojaĝi — lojala — fajro — hejmo — plej — ankaŭ — ambaŭ — pajlo — tajdo — mejlo — vejno — kejlo — adiaŭ — ajlo — alaŭdo — antaŭ — aŭdi — aŭtuno — baldaŭ — vojo — tuja — jodo — ujo — tuja — fajfi — frajo.

Continua na página 85

21. POR PROPONI — *PARA OFERECER*

1. Tutkore, mi proponas ĝin al vi, akceptu ĝin same — *Ofereço-lhe de bom coração, aceite-o também*
2. Se mi povas utili al vi, disponu pri mi laŭ via volo — *Se posso ser-lhe útil, disponha à vontade*
3. Mi estas tre kontenta, ke mi povas esti utila al vi — *Folgo muito em poder ser-lhe útil*
4. Mi bedaŭras, ke nur tion, mi povas proponi al vi — *Sinto muito em poder oferecer-lhe apenas isso*
5. Mi esperas, ke iam mi povos plenumi miajn devojn kun vi— *Espero que algum dia eu possa cumprir meus deveres para com você*

6. Mi dezirus proponi al vi ion multe pli belan — *Gostaria de poder oferecer-lhe coisa muito melhor*
7. Ĉion, kion mi posedas, estas je via dispono — *Tudo o que tenho está à sua disposição*
8. Estas bagatelo, kion mi petas vin akcepti — *É uma ninharia o que lhe peço para aceitar*
9. Super ĉio kion mi havas, vi povas ordoni — *Tudo o que tenho está a seu dispor*
10. Ĉu mi povas fidi sur vian bonvolon? — *Posso contar com a sua boa vontade?*

11. Se vi bezonas min, bonvolu sciigi min — *Se você precisar de mim, queira me avisar*
12. Akceptu ĝin por fari al mi plezuron — *Dê-me o prazer de aceitá-lo*
13. Ĉar vi estas tiel bona, mi iros al... — *Como você é bondoso, eu irei a...*
14. Per kio mi povas esti utila al vi? — *Em que posso ser-lhe útil?*
15. Ĉu vi povas konsenti pri mia peto? — *Você pode concordar com o meu pedido?*

16. Ĉu vi volas fari komplezon al mi? — *Você quer fazer-me um (favor) obséquio?*
17. Permesu, ke mi proponu tion al vi — *Permita que lhe ofereça isso*
18. Per kio mi povas servi al vi? — *Em que posso servi-lo?*
19. Ĉu mi povas kalkuli sur vin? — *Posso contar com você?*
20. Ĉu vi volas fari servon al mi? — *Você quer prestar-me um serviço?*

21. Kion mi povas proponi al vi? — *O que lhe posso oferecer?*
22. Ĉu vi povas rekomendi min? — *Você pode recomendar-me?*
23. Ĉu tio estas agrabla al vi? — *Isso lhe agrada?*
24. Bonvolu havi la bonecon... — *Queira ter a bondade de...*
25. Tre volonte; sed nur, se... — *Com muito gosto; mas somente se...*

26. Mi esperas reservi al vi — *Espero tornar a servi-lo*
27. Ĉu vi havus la bonecon? — *Você teria a bondade?*
28. Kion pli mi povus fari? — *O que mais eu poderia fazer?*
29. Mi estas je via dispono — *Estou às suas ordens*
30. Mi proponas al vi jenon — *Proponho-lhe o seguinte*

31. Ne malkonsentu, mi petas! — *Não discorde, por favor!*
32. Ĉu mi povas proponi al vi? — *Posso oferecer-lhe?*
33. Tio estas troa honoro — *É demasiada honra*
34. Vi estus tiel bona!.. — *Você seria tão bom!..*
35. Ĉu vi deziras ion? — *Você deseja alguma coisa?*

36. Mi estas al via dispono — *Estou às suas ordens*
37. Faru la plezuron al mi — *Dê-me (o prazer) a satisfação*
38. Mi povas fari ion — *Posso fazer alguma coisa*
39. Kion vi deziras? — *O que você deseja?*
40. Kion vi volas? — *O que você quer?*

41. Kion do vi volas? — *O que você exige?*
42. Kion vi postulas? — *O que você quer então?*
43. Kion vi elektas? — *O que você prefere?*
44. Kiom vi bezonas? — *Quanto você precisa?*
45. Kion vi petas? — *O que você está pedindo?*

22. POR DECIDI — *PARA DECIDIR*

1. Tio estas la sola afero, kiun ni povas fari — *É a única coisa que nos resta a fazer*
2. Ĉu esti aŭ ne esti jen la demando! — *Ser ou não ser eis a questão!*
3. Estas la plej bone, kiun ni povas fari — *É o melhor que podemos fazer*
4. Se vi ne decidas, tiam mi mem decidos — *Se você não decidir, então eu mesmo decidirei*
5. Ĉu esti aŭ ne esti, tiel staras la demando! — *Ser ou não ser, eis a questão!*

6. Mi ne permesos al iu ajn fari tion — *Não permitirei a ninguém fazer isso*
7. Cetere vi jam konas mian opinion — *De resto você já conhece minha opinião*
8. Metu ĉion sur la lastan karton! — *Dê a última cartada!*
9. Mi ne havas alian intencon ol... — *Não tenho outro objetivo do que...*
10. Mi estas firme konvinkita, ke... — *Estou firmemente convencido que...*

11. Tio estas la plej bona ideo — *É a melhor ideia*
12. Tio estas kontraŭ miaj ideoj — *Isso é contra as minhas idéias*
13. Mi estas decidita fari tion — *Estou resolvido a fazer isso*
14. Ĝi estas la plej bona rimedo — *É o melhor meio*
15. Oni devas tamen preni decidon — *Deve-se, contudo, tomar uma decisão*

16. Mi volas per tio diri, ke... — *Eu quis dizer com isso que...*
17. Ne timu, dirante la veron! — *Não tema, dizendo a verdade!*
18. Mi ne scias kion fari — *Não sei o que fazer*
19. Mi ne havis la intencon... — *Não tive a intenção de...*
20. Faru tiel, mi diras al vi — *Faça assim, como lhe digo*

21. Li obeos vole-nevole — *Ele obedecerá queira ou não*
22. Vi povas kalkuli je tio — *Você pode confiar nisso*
23. Kion vi diras pri tio? — *O que você diz disso?*
24. Mi devas konfesi, ke... — *Devo confessar que...*
25. Ni bezonas nenian helpon — *Não precisamos de nenhuma ajuda*

26. Tio ĉi ne dependas de mi — *Isto não depende de mim*
27. Ne li, sed mi tiel volis — *Não ele, mas eu assim o quis*
28. Mi estas al via dispono — *Estou às suas ordens*
29. Mi ne dirus tion al li — *Eu não diria isso a ele*
30. Mi certigas al vi, ke... — *Afirmo-lhe que...*

31. Vi povas konfidi je tio — *Você pode confiar nisso*
32. Mi havis la intencon... — *Tive o propósito de...*
33. Mi estas devigata... — *Sou (obrigado) forçado a...*
34. Ĉiu laŭ sia gusto — *Cada qual com o seu gosto*
35. Estu ĉiam verema! — *Seja sempre verdadeiro!*

36. Ni bezonas decidigi — *Precisamos tomar uma decisão*
37. Mi faris decidon — *Mudei de ideia*
38. Ne estu stulta! — *Não seja tolo!*
39. Estu certigita! — *Esteja certo!*
40. Mi decidiĝis... — *Eu me decidi...*

41. Estis vi, ne mi! — *Foi você, não eu!*
42. Nun, ni decidu! — *Agora vamos decidir!*
43. Decidu! — *Decida! — Resolva!*
44. Ne oponu! — *Não oponha!*
45. Cedu! — *Transija!*

GRAMATIKO – IV

PRONÚNCIA

Nota 2. As vogais **e** e **o** têm o som fechado como nas palavras m**e**sa, p**o**vo, b**o**ca, v**ê**, r**o**lo, t**o**lo, e nunca com som aberto como em sap**é**, caf**é**, s**ó**, b**o**de, her**ó**i. Note-se que a vogal **e** nunca soa como **i**, e que **o** nunca soa como **u**.

LEMBRETE: **e = ê o = ô**

LEIA EM VOZ ALTA

telegramo — telefono — plezuro — ombrelo — kandelo — irado — idealo — butero — kremo — fakto — poemo — boato — tablo — lampo — nesto

OBSERVAÇÃO 1. — O leitor não deve se admirar de ouvir o som dessas vogais um tanto menos fechado. O próprio Zamenhof recomendou que o som dessas letras deve ser MÉDIO, i. é, nem muito ABERTO nem muito FECHADO.

Continua na página 96

23. POR PETI — *PARA SOLICITAR*

1. Ĉu vi havus la bonecon doni al mi cigaredon? — *Teria a bondade de dar-me um cigarro?*
2. Tio estas la sola favoro, kiun mi petas de vi — *Esse é o único favor que lhe peço*
3. Se vi iam faris tion, neniam plu ĝin refaru — *Se você alguma vez fez isso, nunca mais o repita*
4. Mi ne povis trovi tion, kion vi petis — *Não pude encontrar aquilo que você pediu*
5. Senkulpigu min, mi petas, mi faris la eblon — *Desculpe-me, por favor, fiz o possível*

6. Mi multe bedaŭras, ke mi devas malkonsenti — *Sinto muito, que eu tenha de recusar*
7. Ĉu vi ne povus meti ĉion en ĝia loko? — *Você não poderia por tudo em seu lugar?*
8. En liaj paroloj estas ia kaŝita afero — *Nas palavras dele há alguma coisa oculta*
9. Ne devigu min al senutilaj klarigoj — *Não me obrigue a explicações inúteis*
10. Tio farus al mi tre grandan servon — *Isso me serviria muitíssimo*

11. Ne faru ceremoniojn, mi petas! — *Peço que não faça cerimônias!*
12. Senkulpigu min, mi agis sensence — *Desculpe-me, procedi impensadamente*
13. Mi ne scias kies kulpo ĝi estas — *Não sei de quem é a culpa*
14. Mi ne kuraĝas peti tion al vi — *Não me atrevo a pedir-lhe*
15. Jen plian komplezon mi petas de vi — *Eis mais um favor que lhe peço*

16. Mi petis al li, ke li restu — *Pedi que ele ficasse*
17. Ne malpaciencigu vin pri tio — *Não se impaciente por isso*
18. Ho! eĉ ŝercate ne diru tion! [44]— *Oh! nem por brincadeira!*
19. Mi permesas al mi diri tion — *Tomo a liberdade de dizer isso*
20. Li sin turnis al mi kun peto — *Ele se dirigiu a mim com um pedido*

21. Bonvolu silenti, mi petas! — *Tenha a bondade de calar-se!*
22. Mi petas, ke vi ĉion diru! — *Peço que diga tudo!*
23. Bonvolu diri al mi, kiel... — *Queira dizer-me, como...*
24. Atendu, ĝis mi revenos — *Espere, até eu voltar*

25. Estu sinceraj kontraŭ mi — *Sejam sinceros comigo*

26. Bonvolu ne forgesi tion! — *Queira não se esquecer!*
27. Atentu kaj pripensu! — *Preste atenção e reflita!*
28. Atentu! Estu singarda! — *Cuidado! Tenha cautela!*
29. Memorigu min pri tio! — *Lembre-me disso!*
30. Neniam faru ion poduone — *Nunca faça as coisas pela metade*

31. Amiko mia, ne faru tion! — *Meu amigo, não faça isso!*
32. Momenton, mi petas! — *Um instante, por favor!*
33. Prefere ne faru tion! — *É preferível que não faça isso*
34. Ne ekkoleru je tio! — *Não me queira mal!*
35. Ne fuŝkomprenu vin! — *Não fique atarantado!*

36. Faru al mi la plezuron! — *Faça-me o favor!*
37. Eltenu la sekreton! — *Mantenha o segredo!*
38. Bonvolu alproksimiĝi*!*— *Queira aproximar-se!*
39. Mi petas! Englutu! — *Por favor! — Engula!*
40. Ne diru vorton pri tio — *Não diga uma palavra sobre isso*

41. Ne fordormu la okazon [45] — *Não deixe escapar a ocasião*
42. Atentu! Estu singarda! — *Cuidado! Seja cauteloso!*
43. Ne faru al vi penon! — *Não se dê ao trabalho!*
44. Diru al mi senkaŝe! — *Diga-me sem rodeios!*
45. Mi petas pardonon! — *Perdoe-me! – Peço perdão!*

46. Tio estas la ĉefafero — *Isto é o essencial*
47. Pardonu min, mi petas — *Perdoe-me, por favor*
48. Mi petas! – Bonvolu! — *Por favor! – Tenha a bondade!*
49. Ne koleru, se (ke)... — *Não se zangue, se (que)...*

50. Ne demandu al mi! — *Não me pergunte!*
51. Restu ankoraŭ iomete! — *Fique um pouquinho mais!*
52. Ne igu min peti vin! — *Não permita que lhe suplique!*
53. Mi petas tion al vi! — *Peço-lhe isso!*
54. Bonvolu aŭskulti! — *Queira dar atenção!*
55. Tute ne, bonvolu! — *De maneira nenhuma, aceite!*

56. Tio ne dependas de mi — *Isso não depende de mim*

---

[44] *É igual: "Oh! não diga isso nem de brincadeira!"*

[45] ***Fordormi la okazon**, deixar escapar a ocasião por estar "dormindo". Idiotismo*

57. Mi havas peton al vi — *Tenho um pedido a fazer-lhe*
58. Ne miskomprenu min! — *Não me compreenda mal!*
59. Mi petas vin, iru! — *Peço-lhe, vá!*
60. Bonvolu akcepti! — *Queira aceitar!*

61. Ne faru tion sencele! — *Não faça isso às cegas!*
62. Bonvolu aŭskulti min — *Queira ouvir-me*
63. Faru tion pro mi! — *Faça isso por mim!*
64. Bonvolu permesi! — *Queira dar-me licença!*
65. Faru vian eblon — *Faça o que for possível*

66. Bonvolu ne fari tion! — *Por favor, não faça isso!*
67. Parolu tute malkaŝe! [46] — *Fale com franqueza!*
68. Bonvolu trankviliĝi! — *Queira tranquilizar-se!*
69. Bonvolu informi min! — *Queira informar-me!*
70. Tio ne tuŝas min! — *Isso não me (compete) toca!*

71. Mi ne scias ĝuste! — *Não sei ao certo!*
72. Bonvolu doni al.. — *Queira dar a...*
73. Ne perfidu min! — *Não me atraiçoe!*
74. Bonvolu atendi! — *Queira esperar!*
75. Pardonu, sed... — *Perdoe-me, mas...*

76. Ne, ne estas eble — *Não, não é possível*
77. Ne kontraŭdiru! — *Não conteste!*
78. Ne plu parolu! — *Não fale mais!*
79. Ne estu honta — *Não tenha vergonha*
80. Mi ĝojus, se... — *Alegrar-me-á, se...*

81. Mi devas fari ion — *Devo fazer alguma coisa*
82. Bonvolu rapidi! — *Queira apressar-se!*
83. Ne ĵuru false! — *Não jure falso!*
84. Ne, estas eble — *Não, é possível*
85. Estu kuraĝe! — *Tenha ânimo!*

86. Ne koleru je tio — *Não se zangue por isso*
87. Bonvolu preni! — *Queira apanhar!*
88. Parolu sincere — *Fale com sinceridade*
89. Favoru al mi! — *Favoreça-me!*
90. Timu nenion! — *Não tenha medo de nada!*

91. Ne malkaŝu tion! — *Não diga nada!*
92. Forgesu tion! —*Esqueça isso!*
93. Trankviliĝu! — *Tranquilize-se!*
94. Ne ĝenu vin! — *Não se incomode!*
95. Estu bona! —*Seja bom!*

96. Jes, bonvolu! — *Sim, tenha a bondade!*
97. Pardonu min! — *Perdoe-me!*
98. Ne gravas! — *Não importa!*
99. Perforte! — *Pela força!*
100. Forgesu! — *Esqueça!*

---

46 *Fale sem rodeios! Fale abertamente!*

24. ĈIUTAGAJ FRAZOJ — *FRASES DE USO DIÁRIO*

1. Mi forte miras, ke vi parolas al mi en tia maniero —*Estranho muito que você me fale deste modo*
2. Mi cedas al vi en ĉi tiu punkto, en ĉio cetera ne — *Neste ponto cedo a você, em tudo o mais, não*
3. Mi volus, ke tiu laboro estu finita hodiaŭ vespere — *Gostaria que esse trabalho fosse terminado hoje de tarde*
4. Li havis distingiĝan econ: li estis sincera — *Ele tinha uma qualidade distinta: era sincero*
5. Mi ne estis tute malprava pri tio, kion mi diris — *Eu não estava totalmente errado no que disse*

6. Li estas tre fiera, kaj ja trofiera por cedi — *Ele é muito orgulhoso e deveras muito orgulhoso para ceder*
7. Mi gratas la kapon, ĉar mi nescias kion fari — *Coço a cabeça, porque não sei o que fazer*
8. Mi volas klarigi la aferon en ĉies atesto — *Quero esclarecer o assunto na presença de todos*
9. Li komunikis tion al mi parole kaj skribe — *Ele comunicou-me isso verbalmente e por escrito*
10. Mi devas vin forlasi, ĉar oni atendas min — *Devo deixá-lo, porque alguém espera por mim*

11. Mi eliras, sed mi revenos post unu horo — *Vou sair, mas voltarei daqui a uma hora*
12. Mi zorgas pri vi tiel kiel pri mi mem — *Cuido de você como de mim próprio*
13. Vi venas ĉiam, kiam oni ne bezonas vin — *Você vem sempre quando a gente não precisa*
14. Mi restigos ĉe vi iujn el miaj libroj — *Deixarei com você alguns dos meus livros*
15. Mi fermis la pordon tuj kiam li eliris — *Fechei a porta logo que ele saiu*

16. Li faris ĉion, petante nenies helpon — *Ele fez tudo sem pedir auxílio de ninguém*
17. Vi estas malpli ruza ol inteligenta — *Você é menos esperto que inteligente*
18. Mi loĝadis tie dek monatojn — *Residi ali dez meses*
19. Vi konfuziĝis ĉe tiu senkulpa ŝerco — *Você perturbou-se com esse gracejo inocente*
20. Mi vestis la jakon antaŭ ol eliri — *Vesti o paletó antes de sair*

21. Mi jam ne esperas vidi ŝin denove — *Já não espero vê-la novamente*
22. Ili ĉiuj laboras dum la tuta tago — *Todos eles trabalham o dia todo*
23. Li eliris sen permeso de iu el ni — *Saiu sem licença de nenhum de nós*
24. Mi demandas vin pro kio vi ploras — *Pergunto-lhe porque você está chorando*
25. Li batis min, sed tio ne doloris min — *Ele me bateu, mas não doeu*

26. Mi havas pli freŝan panon ol vi — *Tenho pão mais fresco que você*
27. Mi havas la rajton kontraŭdiri — *Tenho o direito de contradizer*
28. Li estas bona, kaj krom tio, riĉa — *Ele é bom, e além disso é rico*
29. Mi ne povas vidi nuntempe lin — *Não posso vê-lo presentemente*
30. Mia frato estas de meza kresko — *Meu irmão é de altura média*

31. Mi demandis, ĉu li estas preta — *Perguntei se ele está pronto*
32. Li havas nek rajton nek forton — *Ele não tem direito nem força*
33. Mi eliros la proksiman lundon — *Sairei na próxima segunda-feira*
34. Li prenis ŝin ĉirkaŭ la talio — *Ele segurou-a pela cintura*
35. Mi devus tute ne aŭskulti ŝin — *Eu não devia ouvi-la absolutamente*

36. Vi parolas laŭ saĝa maniero — *Você fala de um modo sensato*
37. Mi estas tiel forta kiel vi — *Sou tão forte quanto você*
38. Li plenigis al si la poŝojn — *Ele encheu-lhe os bolsos*
39. Ili estis unu post la alia — *Eles estavam um após o outro*
40. Mi petas, elektu iun alian — *Por favor, escolham outra pessoa*

41. Mi venos pli aŭ malpli frue — *Virei mais cedo ou mais tarde*
42. Li instruis min, kiel fari — *Ele ensinou-me como fazer*
43. Mi faros uzon el la okazo — *Terei a oportunidade*
44. Mi amas vin pli ol ĉiun — *Amo a ti mais do que ninguém*
45. Mi tute forgesis pri tio — *Esqueci-me completamente disso*

46. Mi estas tuj elironta — *Vou sair agora mesmo*

47. Mi dezirus nenion alian — *Não desejaria outra coisa*
48. Ni estas tre malfruaj — *Estamos muito atrasados*
49. Mi bezonas, ke li venu — *Quero que ele venha*
50. Li estas iom freneza, ĉu ne? — *Ele está um pouco louco, não está?*

51. Vi parolas tro multe — *Você fala demasiado*
52. Li eniras la ĉambron — *Ele entra na sala*
53. Mi voĉdonis por li — *Votei a favor dele*
54. Mi vidas ŝin ĉie — *Eu a vejo em toda parte*
55. Mi vidas lin ĉie — *Vejo-o em toda parte*

ESPERANTO PORTUGUÊS
(CONVERSAÇÃO)

Homo proponit, sed Deus disponit
Homo proponas, Dio disponas
O homem propõe, Deus dispõe

Ju pli da babilado, des pli da pekado
Falar sem pensar é atirar sem apontar

ĈAPITRO V | CAPÍTULO V

Malkontenteco	**25.**	*Descontentamento*
Por esprimi riproĉon	**26.**	*Para exprimir censura*
Por esprimi koleron	**27.**	*Para exprimir cólera*
Ĉiutagaj frazoj	**28.**	*Frases de uso diário*

Antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon.
Não vendas a pele de urso antes de matá-lo.
Não faça a cama sem ver o noivo.

Ludo aparte kaj afero aparte
Dois proveitos não cabem num saco

O tempora! O mores!
Aliaj tempoj, aliaj moroj!
Outros tempos, outros costumes!
Ó tempos! Ó costumes!

25. MALKONTENTECO — *DESCONTENTAMENTO*

1. Ĉar vi ne volas fari, kion mi diras (al vi), vi povas foriri — *Já que você não quer fazer o que lhe digo, pode dar o fora*
2. Ĉu tio estas via maniero fari, kion oni postulas de vi? — *Essa é a maneira de você proceder o que se exige de você?*
3. Eĉ se ŝi venus genufleksi antaŭ mi, mi ne pardonos ŝin — *Mesmo que ela viesse de joelhos diante de mim, eu não a perdoaria*
4. Vi meritas, ke mi forĵetus vin eksteren — *Você merecia que eu o pusesse porta a fora*
5. Vi estas tiel senhonta, kiel sentaŭga — *Você é tão sem vergonha como inútil*

6. Lia sintenado estis senŝanĝe fripona — *Sua atitude era invariavelmente de patife*
7. Iru al la diablo! Lasu min en paco! — *Vá pro diabo! Deixe-me em paz!*
8. Mi diras tion ĉi je la lasta fojo! — *Digo isto pela última vez*
9. Zorgu pri vi mem, kaj nenion pli! — *Cuide de você e de nada mais!*
10. Li estas hodiaŭ en kolera humoro — *Ele está hoje de mau humor*

11. Via konduto estas netolerebla — *A sua conduta é intolerável*
12. Mi ne permesas al vi fari tion — *Proíbo-lhe que faça isso*
13. Ne neas li, ke estas li freneza — *Ele não nega que esteja louco*
14. Mi havas kialon por diri tion — *Tenho razão para dizer isso*
15. Mi ne volas ĝeni vin pli longe — *Não quero importuná-lo por mais tempo*

16. Tio ne povos daŭri tiamaniere — *Isso não poderá continuar dessa maneira*
17. Tio estas ago nur de infano — *Isso é uma ação somente de criança*
18. Vi montras nenian bonvolon — *Você não mostra nenhuma boa vontade*
19. Memoru pri tio alian fojon — *Lembre-se disso de outra vez*
20. Ŝi estas sendanka junulino — *Ela é uma ingrata*

21. Mi ne estas kontenta pri vi — *Não estou satisfeito com você*
22. Iru for, lasu min trankvile — *Dê o fora, deixe-me sossegado*
23. Mi pensas, ke vi malpravas — *Creio que você está errado*
24. Mi pensas, ke vi ne pravas — *Creio que você não tem razão*
25. Mi ne povas plendi je li — *Não posso queixar-me dele*

26. Mi volas nenian honoron — *Não quero nenhuma homenagem*
27. Tiel neniel povas esti — *Assim absolutamente não pode ser*
28. Vi estas maldankema — *Você é ingrato*
29. Silentu, tio sufiĉas — *Cale-se, isso é o bastante*
30. Atentu alian fojon — *Preste atenção de outra vez*

31. Tio maltrankviligas min — *Isso me inquieta*
32. Ha, kia besto estas vi! — *Ah, que animal você é!*
33. Ne tiom da rezonadoj! — *Nem tanto raciocínio!*
34. Vi estas tro mallerta — *Você é muito lerdo*
35. Ĉu vi ĉesos babiladi? — *Você vai parar de falar?*

36. Sensprita kaprico! — *Capricho sem graça!*
37. Vi multe ĝenas min — *Você me aborrece muito*
38. Estas meritite! — *É bem feito!*
39. Oni plendas je vi — *Queixam-se de você*
40. Ĉu vi ne hontas? — *Você não se envergonha?*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

rigidigi — *entorpecer, retesar;* **ĉe la telefono —** *ao telefone;* **forpuŝanta —** *repelente, asqueroso;* **malestimi —** *desprezar, querer mal***; havi malbonan mienon —** *ter cara de poucos amigos;* **forpuŝi —** *repelir;* **malŝati —** *aborrecer***; opinii —** *achar, pensar, opinar;* **enuiga —** *cacete, aborrecido;* **laciga —** *cansativo, fatigante;* **trovi —** *achar, encontrar, deparar;* **ĉe lia veno —** *à chegada dele;* **malagrabla —** *enjoado, desagradável;* **personaĉo —** *indivíduo, sujeito;* **malplaĉi —** *desgostar, enfadar;* **malbone konduti —** *comportar-se mal, conduzir-se mal*

26. Por esprimi riproĉon — *Para exprimir censura*

1. Kiaj homoj tio estas, kies plezuro estis venĝado? — *Que pessoas eram essas, cujo prazer era a vingança?*
2. Ĉu vi estus tion farinta, se mi estus tie? — *Você teria feito isso se eu estivesse lá?*
3. Vi klarigas, sed ne pravigas la aferon — *Você explica, mas não justifica*
4. Via konduto kreigis al mi suspektojn — *O seu procedimento fez-me criar suspeitas*
5. Kritiki estas facile, fari malfacile — *Fácil é criticar, mas difícil é fazer*

6. Vi estas en la plej granda eraro — *Você está no maior dos erros*
7. Mi suspektas tion, kion vi faris — *Suspeito do que você fez*
8. Li ricevis muson en la cerbon — *Deu-lhe a "louca" (doideira)* [47]
9. Estus ja ridiga tia kontesto! — *Havia de ser engraçada a contestação*
10. Vi timas vian propran ombron — *Você tem medo de sua própria sombra*

11. Tion fari estas agi malsaĝe — *Fazer isso é agir às tontas*
12. Mi ne dubas pri via amikeco — *Não duvido da sua amizade*
13. Ĉe ni, oni tion ne faras [48] — *Cá entre nós, não se faz isso*
14. Vi babilas muele sencele [49] — *Você tagarela sem objetivo*
15. Mi opinias malsame ol vi — *Sou de opinião contrária à sua*

16. Ne tiom da disrezonado — *Nem tanta divagação*
17. Kiel vi estas senkora! — *Como você é cruel!*
18. Oni faris lin ridinda — *Fizeram-no ridículo*
19. Tio estas malagrabla — *Isso é desagradável*
20. Ŝi obstinas respondi — *Ela teima em responder*

21. La kulpo ne estas mia — *A culpa não é minha*
22. Ne montru vin idioto — *Não se faça de idiota*
23. Mensogi estas honte — *Mentir é vergonhoso*
24. Honte estas mensogi — *É vergonhoso mentir*

25. Vi agas senpripense — *Você procede a torto e a direito*

26. Kiu estas kulpa? — *Quem é o culpado*
27. Vi agis malbone — *Você fez mal*
28. Kia mensogulo! — *Que mentiroso!*
29. Vere ridiga! — *Muito engraçado!*
30. Kia misuzo! — *Que desperdício!*

---

[47] *Modismo*

[48] ***Ĉe ni****, cá entre nós, pelos nossos lados, em nossa terra, em nossa casa, em nosso meio, cá em nossas bandas, etc.*

[49] *Modismo. Significa também: Você fala a torto e a direito*

27. POR ESPRIMI KOLERON — *PARA EXPRIMIR CÓLERA*

1. Se vi ekkoleros, ni ne povos plu interkonsenti — *Se você se zangar, não poderemos mais chegar a um acordo*
2. Se vi rekomencos, vi devos batali kun mi mem — *Se você recomeçar, você vai se indispor comigo*
3. Ni iru ambaŭ tuj, ĉar mi sidas sur pingloj [50] — *Vamos juntos, estou sobre brasas*
4. Li estas malbonhumora, sed tio forpasos — *Ele está de mau humor, há de passar*
5. Li nur estas fripono, sentaŭgulo, vagulo — *Ele não passa de um patife, imprestável, vagabundo*

6. Ni fumu, mia pacienco estas elĉerpita — *Fumemos, minha paciência está esgotada*
7. Li minacis, ke li faros tion kaj tion — *Ele ameaçou de fazer isso e aquilo*
8. Vi estas malsaĝulino kaj troigulino — *Você é uma tola e uma descomedida*
9. Ne koleretiĝu, mi malsaĝe parolis — *Não se zangue comigo, falei insensatamente*
10. Vi povas fari tion, kion vi volas — *Você pode fazer o que quiser*

11. Li akceptis min per piedbatoj — *Ele me recebeu aos pontapés*
12. Ĉu li volos aŭ ne, li malgajnos — *Quer ele queira ou não, perderá*
13. Vi meritas, ke oni pendigu vin — *Você merece que o enforquem*
14. Pardonu min, mi diris sencele! — *Desculpe-me, disse ao acaso!*
15. Mi estos en tre malbona humoro — *Estou de muito mau humor*

16. Vi pentos pro via malbela ago — *Você se arrependerá dessa ação feia*
17. Per kolero vi neniel sukcesos — *Você não chegará a nada, irritando-se*
18. Tiu virinaĉo nenion taŭgas! — *Aquela megera não presta para nada*
19. Ŝajnas, ke vi estas kolera — *Parece que você está zangado*
20. Ŝi estas perfida persono — *Ela é uma pessoa perversa*

21. Mi estas tre malkontenta — *Estou muito desgostoso*
22. Vi ne estas alparolebla! — *Você não é comunicativo!*
23. Vi vidas min tre kolera — *Você vê que estou com muita raiva*
24. Ne tro facile koleriĝu! — *Não fique zangado à toa!*

[50] *Modismo*

25. Lia kolero longe daŭris — *A cólera dele durou muito tempo*

26. Atentu viajn parolojn — *Cuidado com as suas palavras*
27. Tio estis frenezaĵo — *Isso foi loucura*
28. Ne koleru kontraŭ mi — *Não fique zangado comigo*
29. Nu, kvietiĝu, sufiĉas — *Bem, fique quieto, é o bastante*
30. Mi venĝos plej terure — *Vingar-me-ei do modo mais terrível*

31. La diablo lin prenu — *O diabo que o leve*
32. Kio estis inter vi? — *Que houve entre vocês?*
33. Ne miskomprenu min! — *Não me interprete mal!*
34. Kia teda junulino! — *Que garota aborrecida!*
35. Mi ridas pri mi mem — *Estou rindo de mim mesmo*

36. Diabloj vin prenu! — *Diabos o levem!*
37. Pri kiu vi ridas? — *De quem você está rindo?*
38. Ŝparu la vortojn! — *Seja comedido no que diz!*
39. Kia malnobla ago! — *Que ação vil!*
40. Ni restu amikoj! — *Fiquemos amigos!*

41. Kia fanfaronulo! — *Que fanfarrão!*
42. Mi estas furioza — *Estou furioso*
43. Mi ridas pri vi — *Estou rindo de você*
44. Tenu la buŝaĉon [51] — *Cale essa boca*
45. Al la diablo! — *Com os diabos!*

46. Kia mizerulo! — *Que miserável!*
47. Kia ŝtelisto! — *Que ladrão!*
48. Kiel abomene! — *Que detestável!*
49. Ne ĝenu min! — *Não me amole!*
50. Kia fripono! — *Que patife!*

51. Ni repacigu! — *Vamos fazer as pazes!*
52. Senkoleriĝu! — *Acalme-se!*
53. Ne koleriĝu! — *Não se zangue!*
54. Estas terure! — *É terrível!*
55. Estas domaĝe! — *É uma pena!*

56. Kia homaĉo! — *Que desgraçado!*
57. Kia tedulo! — *Que chato!*
58. Ne koleru! — *Não se zangue!*
59. Silentu! — *Cale-se!*
60. Peston! — *Maldição!*

[51] *Modismo*

28. **ĈIUTAGAJ FRAZOJ** — *FRASES DE USO DIÁRIO*

1. Ju pli oni posedas, des pli oni avidas — *Quanto mais se tem, tanto mais se cobiça*
2. Kie regas la forto, tie rajto silentas — *Onde reina a força, (aí) silencia o direito*
3. Via temperamento povus esti pli bona — *Seu temperamento poderia ser melhor*
4. Multe da viroj kaj malmulte da virinoj — *Muitos homens e poucas mulheres*
5. Se estas tiel, mi konfesas mian eraron — *Se é assim, confesso meu engano*

6. Iu plej senhonta fripono vin trompis — *Um velhaco dos mais sem vergonhas o enganou*
7. Tiu estas ĉiel la plej bona sidloko — *Esse é, de qualquer modo, o melhor assento*
8. Oni bone vidas, ke vi estas sensperta — *Bem se vê que você é inexperiente*
9. Oni vokis lin, sed li ne sin returnis — *Chamaram-no, mas ele não se volveu*
10. Jen la fraŭlino, kiun vi volis vidi — *Eis a garota que você quis ver*

11. Ĉial vi estas la plej ĉarma fraŭlino — *Por todos os motivos você é a senhorinha mais encantadora*
12. Faru tion, kaj ne plu diskutu pri ĝi — *Faça isso e não mais discuta sobre o assunto*
13. Nur post serĉado mi trovis la monon — *Somente após longa procura encontrei o dinheiro*
14. Du larmoj ekruliĝis sur ŝiaj vangoj — *Duas lágrimas rolaram-lhe nas faces*
15. Tiu voĉo estas nenio simila al lia — *Essa voz não é nada parecida com a dele*

16. Jen staras la bovoj antaŭ la montoj! — *Aí é que são elas! Aí é que está o busílis*
17. Kial ni nun perdu vortojn pri tio! — *Por que havemos agora de perder palavras com isso!*
18. Tiu gesto jam fariĝis kutimo ĉe li — *Esse gesto já se lhe tornara um hábito*
19. Via pano estas malpli freŝa ol mia — *O seu pão está menos fresco do que o meu*
20. Oni ne scias, ĉu ŝi ploras aŭ ridas — *Não se sabe se ela chora ou ri*

21. Kompreneble vi treege ĉagreniĝis — *Você ficou desconsolado, naturalmente*
22. Jen li kuras rapide, jen li haltas — *Ora ele corre depressa, ora pára*
23. Kelkaj ekzemploj klarigos la aferon — *Alguns exemplos esclarecerão o assunto*
24. Tio estas senfundamenta suspekto — *É suspeita sem fundamento*
25. Oni diras, ke vi estas malfeliĉa — *Diz-se que você é infeliz*

26. Mia amindumantino venis post mi — *Minha namorada veio depois de mim*
27. Jen la plej bona el miaj libroj — *Eis aqui o melhor dos meus livros*
28. Hodiaŭ mi faris duoblan laboron — *Hoje fiz um trabalho duplo*
29. Nun mi klopodos por ŝin forgesi — *Vou tratar de esquecê-la*
30. Pri tio mi havas nenion por diri — *Nada tenho a dizer sobre isso*

31. Nenie estas pli ĉarme ol hejme — *Em nenhuma parte há mais encanto do que no lar*
32. Tia agado estas danĝera por ni — *Tal modo de proceder é perigoso para nós*
33. Saĝa kapo duonvorton komprenas — *A bom entendedor meia palavra basta*
34. Mia amiko sendos leteron al vi — *O meu amigo lhe enviará uma carta*
35. Kisu min, se ne, mi vin forlasos — *Beije-me, senão, abandona-la-ei*

36. Agadu vi frate, amate, amante — *Proceda como irmão, sendo amado, amando*
37. Venkinte ĉion, li fine alvenis — *Tendo vencido tudo, finalmente chegou*
38. Unuj faris tion ĉi, aliaj tion — *Alguns fizeram isto, outros aquilo*
39. Ne prokrastu tion ĝis morgaŭ — *Não adie isso para amanhã*
40. Nun vi rememoras vian eraron — *Agora você cai em si*

41. Tio ŝajnas al mi senkonfuza — *Isso me parece claro*
42. Ties opinio ne multe valoras — *A opinião desse não vale muito*
43. Se mi scius tion, mi ne venis — *Se eu soubesse disso, não viria*
44. Post kelkaj minutoj mi venos — *Virei daqui a pouco*
45. Ĉies okuloj sin turnis al li — *Os olhos de todos voltaram-se para ele*

46. Venigu min ĉiam, kiam necese — *Mande-me chamar sempre que (for) necessário*

47. Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiuj — *Ninguém ainda agradou a todos*
48. Anstataŭ helpi, li malhelpis — *Em vez de ajudar, ele atrapalhou*
49. Anstataŭ helpi, vi melhelpas — *Em vez de ajudar, você atrapalha*
50. Tio ne estas farebla por mi — *Isso não é possível fazer*

51. Angeliko estas virina nomo — *Angélica é nome de mulher*
52. Mia opinio estas, ke vi iru — *A minha opinião é que você vá*
53. Restu iom trankvila, eksidu — *Sossegue um pouco, sente-se*
54. Ju pli rapide, des pli bone — *Quanto mais rápido melhor*
55. Oni diras, ke vi estas riĉa — *Diz-se que você é rico*

56. Unu el ni estos elektata — *Um de nós será eleito*
57. Jam estas tempo iri domen — *Já é tempo de ir para casa*
58. Kompreneble, ke li venos! — *Claro está que ele virá*
59. Venu, kiam ajn vi deziros — *Venha quando o desejar*
60. Kun la tempo ĉio klariĝos — *Com o tempo se esclarecerá tudo*

61. Ŝajnas, ke li estas stulta — *Parece que ele é bobo*
62. Pluvadis tagon post tago — *Chovia dia e noite*
63. Tio estas malviva litero — *Isso é letra morta*
64. Diru al mi kie li estas — *Diga-me onde ele está*
65. Metu lin sur la piedojn — *Ponha-o de pé*

66. Eble mi venos — *Talvez eu venha*
67. En la monujo estas mono — *Há dinheiro na bolsa*
68. Tio estas farenda — *Isso deve ser feito*
69. Dio estas ĉie — *Deus está em toda parte*
70. Ts! mi aŭdas ian brueton — *Psiu! estou ouvindo um barulhinho qualquer*

Nota 3. A letra **c** tem o som de **ts** português em be**ts**amita. Observe que a letra c nunca tem o som de k.

Nota 4. A letra **ĉ** tem o som de **tch** português em a**tch**im (espirro).

Nota 5. A letra **ŝ** tem o som de **ch** português como em **ch**apéu.

LEMBRETE: **c = cs** **ĉ = tch** **ŝ = ch, x**

LEIA EM VOZ ALTA

paciento — pacienco — diferenco — ĉapitro — parenco — potenco — sincera — komerco — preciza — ŝtrumpo — ŝajni — ŝalo — ŝinko — ŝuldi — senco — cetera — ĉifono — civila — colo —kaŝita — ŝanco — ŝipo — ĉapo — ĉevalo

Continua na página 101

TEKSTO

PAROLOJ DE L' SAĜO

Ĉio estas fluanta.

Heraklitos

Praiam ĉiuj partoj de l' homa korpo estis duoblaj; ĝi havis kvar brakojn, kvar krurojn, du kapojn kaj estis vira kaj virina samtempe. Sed en tiu stato la homo estis tro forta, tro potenca kaj tro fiera, tiel ke eĉ la dioj lin timis. Tial Jupitro kredas konsilinde, malfortigi ĝin, dividi la korpon en du partojn, viran kaj virinan. Apollo sukcesis, formi ĉi tiujn duonajn korpojn tiel, ke ili ĉiu por si mem fariĝis relative perfektaj. Post la transformado ili estis dispelataj en la mondon. Por la disigitaj partoj estis neeble, reekkoni unu la alian; ili povis nur sekvi kvazaŭ instinkton, kiu igis ilin emaj, alproksimiĝi reciproke kaj kunfandiĝi. Tiun emon oni nomas amo. Sed oni trompiĝas tre ofte; ĉar nur malofte oni retrovas sian ĝustan alian duonon. Sed kiam foje tio okazas, tiam la amo estas tia, kia finiĝas nur kune kun la vivo.

Platon.

Ĝis la kvina jaro via
filo estu dorlotata;
dum la postaj dek lin punu
en afer' malpermesata;
Sed la dekkvinjara estu
bonamiko. Tiel restu!

Hinda.

Estante infano, la homo apartenas al siaj gepatroj; estante junulo, al sia amantino; estante viro, al siaj infanoj — sed neniam al si mem.

Hinda.

Homojn, kiuj ĉiam sidas antaŭ la libroj kaj senĉese plenigas siajn kapojn per fremdaj pensoj, ilia instruiteco ofte kondukas for de la natura racio.

Lukianos.

Selio diris, la mokul' malpia,
ke dioj vivas nur en nia fantazio.
Nu, tio ŝajnas vera; ĉar se vivus dio,
ĉu nun ankoraŭ spirus bubo tia?

Martialis.

Kial vi ridas, kiam Fabulla ĵuras, ke ŝi portas nur sian propran hararon? Ĉu ne estas ŝia propraĵo, kion — ŝi aĉetis?

Laŭ Martialis

Afero bona kaj certa progresas ordinare malrapide kaj nur kun grandaj malhelpoj. Ne malĝoju tial, esperantistoj!.. Ni laboru kaj esperu!
Zamenhof

ĈAPITRO VI		CAPÍTULO VI
Por esprimi malĝojon	**29.**	*Para exprimir tristeza*
Por esprimi bedaŭron	**30.**	*Para exprimir pesar*
For esprimi ĉagrenon	**31.**	*Para exprimir aflição*
Ĉiutagaj frazoj	**32.**	*Frases de uso diário*

Zorgu vian metion kaj ne miksu vin en alian.
Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.
Não metas foice em seara alheia.
Não meta o nariz onde não lhe compete

----------------------------------o0o----------------------------------

Pli bona io ol nenio — antes pouco do que nada

29. POR ESPRIMI MALĜOJON — *PARA EXPRIMIR TRISTEZA*

1. Kial vi insistas, vi bone vidas, ke mi ne povas ĝin fari — *Para que insistir, você vê bem que não posso fazê-lo*
2. Estas malbone lasi sin regi de la antipatioj — *É mau deixar-se ir pelas antipatias*
3. Mi ne povas konsenti, kion vi demandas al mi — *Não posso concordar com o que você me pergunta*
4. Estu konvinkita, ke mi tute ne estas kulpa — *Fique convencido que não tenho a menor partícula de culpa*
5. Mi ĝin bedaŭras tiel multe, kiel vi — *Sinto tanto quanto você*

6. Kiom mi sentas pro la okazintaĵo — *Quanto sinto pelo acontecido*
7. Alian fojon, ni pli bone sukcesos — *Em outra ocasião teremos êxitos*
8. Li havas tre malbonan karakteron — *Ele tem um mau caráter*
9. Liaj manieroj estas malagrablaj — *Suas maneiras são desagradáveis*
10. Ĉagrenas min, ke mi devas rifuzi — *Estou desolado que eu tenha de recusar*

11. La ĵaluzo korodis vian forton — *O ciúme consumiu suas forças*
12. Mi havas nur antipation por li — *Tenho apenas aversão a ele*
13. Tio estas neanstataŭebla perdo — *É uma perda irreparável*
14. Li rigardis min kun ia ironio — *Ele olhou-me com certa ironia*
15. Nun, mi ne povas plu (ĝin fari) — *No momento não posso mais (fazê-lo)*

16. Mi tre bedaŭras tion (je tio) — *Sinto muito por isso*
17. Ĝi estas doloriga okazintaĵo — *É um caso doloroso*
18. Lia babilado malplaĉas al mi — *A sua conversa me desagrada*
19. Malfeliĉo neniam venas sola — *Uma desgraça nunca vem só*
20. Lia vizaĝo estas forpuŝanta — *A cara dele é repelente*

21. Mankas klapo en lia kapo [52] — *Ele é "meio pancada", biruta*
22. Tio estas kompatinda afero — *É uma coisa triste*
23. Tio estas senkompata kazo — *Isso é muito duro*
24. Ĝi estas granda malfeliĉo — *É muita infelicidade*
25. Mi ne ŝatas tiun personon — *Não gosto daquela pessoa*

26. Li estas malamata de ĉiuj — *Ele é odiado de todos*
27. Tio tute ne koncernas min — *Nada tenho a ver com isso*
28. Tio ĉi ne koncernas al mi — *Isto não me toca*
29. Vere, mi ne povas akcepti — *Na verdade, não posso aceitar*
30. Mi malamas tiun personon — *Odeio aquela pessoa*

31. Kia vizaĝo forpuŝanta! — *Que cara asquerosa!*
32. Ĝi estas granda domaĝo — *É uma desgraça*
33. Ĝi estas kruela fakto — *É um caso cruel*
34. Tio estas kortuŝ(ig)a — *Isso é chocante*
35. Mi estas nekonsolebla — *Estou inconsolável*

36. Tio estas tre malĝoja — *Isso é muito triste*
37. Domaĝe! Kia domaĝo! — *Que pena! – Que lástima!*
38. Ĝi estas vera bedaŭro — *É uma verdadeira pena*
39. Kia enuiga personaĉo! — *Que sujeito cacete!*
40. Tio estas abomeninda! — *É horrível!*

41. Kia malgajiga sceno! — *Que quadro triste!*
42. Vi ĉiam enuigas min — *Você sempre me aborrece*
43. Ne kalkulu sur tion — *Não conte com isso*
44. Tio malĝojas min — *Isso faz-me entristecer*
45. Tio estas fatalaĵo — *É uma fatalidade*

46. Mi estas afliktega — *Estou desesperado*
47. Mi mortas pro enuo — *Morro de aborrecimento*
48. Li estas frenezeta — *Ele tem uma aduela de menos*
49. Estas tre malĝoje — *É muito triste*
50. Estas malagrable — *É desagradável*

51. Kia teda junulo! — *Que rapaz aborrecido!*
52. Kia fantaziulo! — *Que fantasista!*
53. Ne fidu je tio! — *Não confie nisso!*
54. Lasu min pace! — *Deixe-me em paz!*
55. Kia entrudulo! — *Que intrujão!*

[52] *Modismo*

ĉagreni sin — *aborrecer-se;* **pugnoradiko —** *munheca;* **senpripense —** *à toa, irrefletidamente;* **alimaniere —** *de modo diferente;* **ĉiumaniere —** *de todo o modo*; **fari kulpon —** *cometer uma falha*; **antaŭsupozi —** *pressupor;* **neevitebla —** *inevitável;* **rezignacii —** *resignar-se;* **pugnofrapo —** *sopapo;* **tro multe —** *demasiado, bastante;* **aliflanke —** *por outro lado;* **ĉagreniĝi —** *afligir-se;* **antaŭscii —** *pressentir, prevenir;* **konjekti —** *conjecturar, supor*; **supozebla —** *admissível;* **veaspekta —** *desconsolado;* **dissciigi —** *apregoar, divulgar;* **pripensi —** *pensar, refletir;* **lipmieni —** *fazer beiço;* **evitinda —** *digno de ser evitado;* **evitebla —** *que pode ser evitado;* **evitenda —** *que deve ser evitado;* **memoriga —** *comemorativo;* **memorilo —** *lembrete*; **malpravi —** *não ter razão, estar errado*; **klopodi —** *esforçar-se, empenhar-se;* **erarema —** *sujeito a erro;* **prijuĝi —** *opinar, julgar, ajuizar;* **malsama —** *diferente, diverso;* **ĉagreni** — *afligir, molestar, magoar;* **ĉagreno** — *aflição, pesar;* **kortuŝi** — *abalar, comover, tocar;* **kortuŝa** — *comovente;* **rezigni** — *abrir mão de, renunciar;* **ekscii** — *ficar ciente;* **memori** — *lembrar-se (de);* **sciigi** — *informar, participar;* **supozi** — *supor, conjeturar;* **tedulo** — *indivíduo cacete;* **tediĝi** — *amolar-se, entediar-se;* **ĝenulo** — *maçante, chato, amolante;* **emocii** — *abalar, comover;* **erari** — *enganar-se, errar;* **ĝuste** — *exatamente;* **tiel** — *assim, desta maneira;* **jene** — *assim, deste modo;* **peni** — *esforçar-se, dar-se ao trabalho;* **pravi** — *ter razão, estar certo;* **tedi** — *aborrecer, entediar, cacetear;* **ĝeni** — *afligir, molestar;* **ĝena** — *incômodo, molesto;* **juĝi** — *julgar, sentenciar;* **same** — *idem, igualmente;* **timi** — *ter medo, temer;* **troa** — *excessivo, exagerado*

Nota 6. A letra **ĝ** tem o som de **dj** português em **adjetivo**.

Nota 7. A letra **ĵ** tem o som de **j** português em **janela**, **jamais**.

LEMBRETE: **ĝ = dj ĵ = j**

LEIA EM VOZ ALTA

ĝardeno — fromaĝo — danĝero —anĝelo — aranĝo — ĵaluzo — vizaĝo — bonaĵo — ĵurnalo — ĝirafo — vilaĝo — oranĝo — paĝo — ĵaŭdo — ĵeti — ĵuri — kaĝo — neĝo — ĵokeo — sonĝo — ĝojo — ĝui — ĝemi — aĵoj.

Nota 8. A letra **g** nunca tem o som de **j** português, mas é sempre duro, como em **gato**, **guerra**.

PRONÚNCIA

ga, **ge**, **gi**, **go**, **gu** = ga, guê, gui, gô, gu, respectivamente

LEIA EM VOZ ALTA

digesti — legitimi — rigida — geologio — gitaro — gipso — geigi — tegilo — gesto — digno — giĉeto — gemo — legi — pagi — legio — gesto — gisi.

Continua na página 103

30. POR ESPRIMI BEDAŬRON — *PARA EXPRIMIR PESAR*

1. Mi bedaŭras, ke mi ne povas prunti al vi la petitan monon — *Lastimo não poder emprestar-lhe o dinheiro pedido*
2. Mi multe bedaŭras la laboron, kiun mi kaŭzis al vi — *Sinto muito o trabalho que lhe tenho dado*
3. Permesu min esprimi al vi miajn kondolencojn — *Permita-me exprimir-lhe meus sentidos pêsames*
4. Bedaŭrinde mi ne povas diri al vi tion — *Infelizmente não lhe posso dizer isso*
5. Mi multe bedaŭras, ke mi maltrankviligis vin — *Sinto muito tê-lo importunado*

6. Ĉiu dezirus koni la kialon de la vivo — *Cada um desejaria conhecer o porquê da vida*
7. Mi vere bedaŭras, sed mi ne konsentas — *Sinto muitíssimo, mas não estou de acordo*
8. Domaĝe, ke mi tion ne sciis antaŭe! — *É pena que eu não soubesse isso (antes) mais cedo*
9. Mi petas milfoje de vi pardonon — *Peço-lhe mil vezes perdão*
10. Mi bedaŭras, ke vi jam foriras — *Lastimo que você já se retire*

11. Mi petas de vi mil pardonojn — *Peço-lhe mil perdões*
12. Lia aspekto rigidigas min [53] — *O aspecto dele gela-me*
13. Mi ne intencis ofendi vin — *Não quis ofendê-lo*
14. Tion mi sincere bedaŭras — *Lamento-o sinceramente*
15. Tion mi bedaŭras, kiel vi — *Lamento isso como você*

16. Vi estas tro ofendema — *Você é susceptível demais*
17. Mi tre bedaŭras pro tio — *Isso me causa muito pesar*
18. Mi vere badaŭras, sed... — *Sinto realmente, mas...*
19. Estas bedaŭrinde, ke... — *É de lamentar que...*
20. Dio ne volu, ke tio okazu — *Não queira Deus que isso aconteça*

21. Estas tre bedaŭrinde — *É bastante lamentável*
22. Bonvolu trankviliĝi! — *Tenha a bondade de se acalmar!*
23. Ne ĝenu vin pri tio! — *Não se incomode com isso!*
24. Ĉiaj rimedoj fiaskis — *Todos os meios falharam*
25. Domaĝe! Badaŭrinde! — *É pena! Infelizmente!*

[53] *Idiotismo*

26. Bedaŭre, mi ne povas — *Lamentavelmente, não posso*
27. Mi bedaŭras pro tio — *Sinto por isso*
28. Estas domaĝe, ke — *É lamentável, que...*
29. Tiom pli malbone! — *Tanto pior!*
30. Fariĝu, Dio volas! [54] — *Será o que Deus quiser!*

31. Mi tre bedaŭras — *Sinto muito*
32. Mi tro bedaŭras — *Sinto com bastante pesar*
33. Ne ĝenu vin! — *Não se incomode!*
34. Bedaŭrinde! — *Infelizmente!*
35. Ne grave! — *Não faz mal!*

[54] *Modismo*

Nota 9. A letra **h** é sempre aspirada como o **h** inglês em "have" (**havi**) e nunca é muda como em português.

Nota 10. A letra **ĥ** tem o som fortemente gutural, que podemos compará-la ao **j** espanhol em o**j**os (olhos), **j**abón (sabão), ou o **ch** alemão em Lo**ch** (buraco).

OBSERVAÇÃO 2. —A letra **h** está sendo substituída por **k**, conforme a evolução do esperanto, havendo apenas cerca de 20 palavras com esta letra. Vejamos algumas palavras as quais podemos usá-las com **ĥ** ou **k**: **ĥemio** (**kemio**) química; **ĥimero** (**kimero**), quimera; **ĥirurgo** (**kirurgo**), cirurgião; **ĥolero** (**kolero**), cólera, etc.

Nota 11. A letra **r**, mesmo no início ou no fim de palavra, é **dental** e não **gutural**, i. é, tem o som parecido ao nosso **r** entre vogais, como nas palavras pa**r**a, ca**r**o.

LEMBRETE:
h = **h** aspirado **ĥ** = **j** espanhol **r** = **r** entre vogais

LEIA EM VOZ ALTA

prahistoria — malhonesta — pachoro — retoriko — karamelo — aparato — kamforo — aŭreolo — trezoro — lipharo — ĥirurgo — heliko — helico — homaro — malhela — kahelo — hamako — ĥimero — ĥolero — paroĥo — karato — rezoni — serumo — ĥoro — ĥemio — haro — homo — eĥo — havi — ravi

Continua na página 106

31. POR ESPRIMI ĈAGRENON — *PARA EXPRIMIR AFLIÇÃO*

1. Ni ofte suferas pro nura kaprico, unuj pli, aliaj malpli — *Muitas vezes sofremos por simples capricho, uns mais, outros menos*
2. Ĝi estus la plej terura afero kio povus okazi al mi — *Isto seria a coisa mais terrível que me poderia acontecer*
3. Al la malbona sorto prezentu kuraĝan vizaĝon — *Mostre uma expressão corajosa à má sorte*
4. Mi multe bedaŭras, ke mi maltrankviligis vin — *Sinto muitíssimo tê-lo inquietado*
5. Mi ne scias kiel pasigi la tempon; mi enuas — *Não sei como fazer passar o tempo; aborreço-me*

6. Mi aprobas ĉion, kion vi faris, nur ne tion — *Aprovo tudo que você fez, menos isso*
7. Vi moligis ŝian koron per viaj ĉagrenoj — *Você abrandou-a com as suas mágoas*
8. Restas al mi nenio, kio povus ĝojigi min — *Nada me resta que me possa alegrar*
9. Mi sincere bedaŭras, ke mi ĉagrenis vin — *Sinto realmente de ter-lhe contrariado*
10. Vere, vi suferas neordinaran malfeliĉon — *Na verdade, você está sofrendo de uma desgraça sem precedente*

11. Mi ne volas enuigi (ĉagreni, ĝeni) vin — *Eu não quero molestá- (afligi-, incomodá-)lo*
12. Mi sentas kompaton por tiu individuo — *Tenho compaixão por esse indivíduo*
13. Kredu, ke mi komprenas vian ĉagrenon — *Creia que eu compreendo a sua (dor) aflição*
14. Kun sincera ĉagreno mi forlasas vin — *É com muito pesar que vou deixá-lo*
15. Vere, la ŝanco ne estas al vi favora — *Realmente, a sorte não lhe é favorável*

16. Kial vi aspektas tiel maltrankvila? — *Por que você tem uma aparência tão aflita?*
17. Nenio pli malfeliĉa povis okazi! — *Nada mais infeliz podia acontecer!*
18. En ĉiu malbono estas iom da bono — *Em todo o mal há um pouco de bem*
19. Mi de teruro ne sciis, kion fari — *Eu, de terror, não sabia o que fazer*
20. Tio estas al mi tre malagrabla — *Isso é muito desagradável para mim*

21. Mi eltiros min el tiu embaraso — *Eu sairei desse embaraço*
22. Mi ricevis malagrablan sciigon — *Recebi notícia desagradável*
23. Pardonu, ke mi interrompas vin — *Perdoe-me, por interrompê-lo*
24. Tio estas netolerebla doloro! — *Isso é uma dor intolerável!*
25. Tamen, vi ne devas senkuraĝiĝi — *Todavia, você não deve perder a coragem*

26. Ŝajnas, ke li estas turmentita — *Parece que ele está agastado*
27. Kiom da afliktoj ni travivis! — *Quantas aflições atravessamos!*
28. Mi ne havas al kiu min turni — *Não tenho para quem apelar*
29. Mi ne scias, kio okazos al mi — *Não sei o que será de mim*
30. Mi havas grandegan ĉagrenon — *Tive um grandissimo desgosto*

31. Alvoku vian tutan energion! — *Faça valer toda a sua energia!*
32. Mi partoprenas vian doloron — *Estou solidário com a sua dor*
33. Mi, malĝoja, por kio, mia Dio? — *Eu, triste, por que, meu Deus?*
34. Mi sentas grandan ĉagrenon — *Sinto grande aflição*
35. Pardonu, ke mi ĉagrenas vin — *Perdoe-me se lhe estou magoando*

36. Pri tio mi ege ĉagreniĝas — *Isto me aborrece extremamente*
37. Mi povas nur plori kun vi — *Posso apenas chorar com você*
38. La fatalo persekutas vin — *A fatalidade o persegue*
39. Tio estas tre ĉagreniga — *Isso é muito irritante*
40. Unuj ridas, aliaj ploras — *Alguns riem, outros choram*

41. Pardonu, ke mi tedas vin — *Perdoe-me, se lhe aborreço*
42. Ĝi estas granda ruinaĵo — *É um grande transtorno*
43. Mi estas tre malfeliĉa — *Sou muito infeliz*
44. Ĉu mi multe ĝenas vin? — *Estou lhe importunando muito?*
45. Tute ne, bonvolu! — *Absolutamente, tenha a bondade!*

46. Mi estas maltrankvila — *Estou com cuidado*
47. Mi kompatas tutkore — *Compadeço-me de todo coração*
48. Kia enuo mia amiko! — *Que tédio, meu amigo!*

49. Mi rezignas je tio — *Conformo-me com isso*
50. Vidu kiel mi estas — *Veja como estou*

51. Vi malĝoje mienas — *Você está com ar triste*
52. Ŝi estas mirigita — *Ela está atordoada*
53. Ne ĉagrenu vin! — *Não se aflija!*
54. Ne ĝenu vin! — *Não leve a mal!*
55. Ne priokupiĝu! — *Não se preocupe!*

56. Mi malesperas — *Estou desesperado*
57. Estas domaĝe! — *É pena!*
58. Dio kompatu! — *Deus tenha compaixão!*
59. Restu ĉe ni! — *Fique conosco!*
60. Permesu min! — *Com licença!*

61. Pro kompato! — *Por piedade!*
62. Ne malĝoju! — *Não fique triste!*
63. Kia fiaĵo! — *Que ignomínia!*
64. Dio mia! — *Meu Deus!*
65. Ne moku! — *Não faça troça!*

Nota 12. As letras **m** e **n** conservam os seus sons também depois das vogais, no fim de sílabas ou de palavras, porque **não há som nasal** em esperanto, mas, para nós que estamos habituados aos sons nasais, este princípio não tem sido observado com rigor; assim: **am**, **em**, **im**, **om**, **um**, **an**, **en**, **in**, **on**, **un**, pronunciam-se como em alemão, italiano, inglês e espanhol.

LEIA EM VOZ ALTA

komforto — ilumini — indieno — koneksa — nanino — romano — neniam — nenian — nenion — neniom — prujno — donaco — banano — tempo — mumio — memoro — tenilo — emani — kian — ĉian — ĉiam — mem — pramo — ian — iam — jen — jam — tian — tiam.

Nota 13. A letra **s** (sempre sibilante) nunca tem o som de **z** ou **x**, mas sempre o som de **ss** ou **ç**, como em: mi**ss**a, o**ss**o, ca**ç**a.

LEMBRETE:
s = ss em osso

LEIA EM VOZ ALTA

desegni — unisono — pistilo — fasono — pasigi — viruso — meso — ruso

ILUSTRAÇÃO

As letras **ĉ**, **ĝ**, **ĵ**, **ŝ**, **ŭ**, podem ser substituídas por **ch**, **gh**, **jh**, **sh**, **u**, na imprensa que não possua os tipos acima e nos telegramas: **ĉarma** (charma), **ĉielo** (chielo), **ĝardeno** (ghardeno) **ĝentila** (ghentila), **ĵaluzo** (jhaluzo), **ĵurnalo** (jhurnalo), **ŝipo** (shipo), **ŝuldo** (shuldo), **kaŝita** (kashita), **ankaŭ** (ankau), **ĵaŭdo** (jhaudo).

Continua na página 112

32. ĈIUTAGAJ FRAZOJ— *FRASES DE USO DIÁRIO*

1. Saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion — *Um sábio sabe alguma coisa, mas ninguém sabe tudo*
2. Tio ne reprezentas la realan verecon — *Isso não apresenta a verdade certa*
3. Sur ŝia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton — *Vi no rosto dela um sorriso alegre*
4. En la daŭro de iaj kelke da semajnoj — *No decurso de umas poucas semanas*
5. Nenia antaŭa sperto estas necesa — *Não é preciso nenhuma experiência prévia*

6. Tio estas dirita tute sen troigo — *Isso é dito completamente sem exagero*
7. Ĉiu aĝo havas siajn devojn — *Cada idade tem o seu dever*
8. Tio venis de (el) lia unua eraro — *Isso veio do seu primeiro erro*
9. Pensu multe, parolu malmulte! — *Pense muito, fale pouco!*
10. Tio estas malfacila por kompreni — *Isso é difícil de se compreender*

11. Finu la laboron antaŭ ol ripozi — *Acabe o trabalho antes de repousar*
12. Nenia voĉo aperis nek respondo — *Nenhuma voz apareceu, nem resposta*
13. Almenaŭ li provis ĝin fari — *Pelo menos ele tentou fazer isso*
14. Aŭ vi aŭ mi devos ĝin fari — *Ou você ou eu deverei fazê-lo*
15. La sukero estas en la kafo —*O açúcar está no café*

16. Oni plenumis lian deziron — *Fizeram-lhe a vontade*
17. Se ili venus, mi atendus ilin — *Se eles viessem, eu os esperaria*
18. Laŭ mia scio, nenio okazis — *Que eu saiba, nada aconteceu*
19. Oni faras nenion sen peno — *Nada se faz sem esforço*
20. Hodiaŭ estas la dua de decembro — *Hoje são dois de dezembro*

21. Se mi ial ne venos, iru vi sola — *Se eu não vier por qualquer motivo, vá você sozinho*
22. Malgaja mieno malbeligas vin — *Esse ar tristonho faz-lhe a cara feia*
23. Tiom estas malfacile memori — *Tanto assim é difícil de se lembrar*
24. Lia riĉeco ne estis senlima — *A sua fortuna não era ilimitada*

25. Tio ne estas grava por mi — *Isso não é importante para mim*

26. Pluvos hodiaŭ posttagmeze — *Choverá hoje de tarde*
27. Nenion deziru de aliulo — *Não deseje nada de outrem*
28. Ĉie mi vidis la samon — *Vi o mesmo por toda a parte*
29. Sed tio estas io alia — *Isso, porém, é outra coisa*
30. Tia ago estas malofta — *Tal gesto é raro*

31. Venu kune kun via edzino — *Venha com sua esposa*
32. Pli bone ne povas esti — *Melhor não pode ser*
33. Tio estis post noktomezo — *Isso foi depois da meia noite*
34. Se vi min petus, mi iru — *Se você me pedisse, eu iria*
35. Iam ĉio devas ja finiĝi! — *Algum dia deve mesmo acabar tudo!*

36. Antono estas vira nomo — *Antônio é nome de homem*
37. Eble mi sukcesos ĉe ili — *Talvez terei sucesso junto a eles*
38. Ĉiu povas libere paroli — *Cada qual pode falar livremente*
39. Se la ŝanco favoras vin — *Se a oportunidade o favorece*
40. Mi nenial ĉesos ami vin — *Por motivo algum deixarei de amá-la*

41. Ial li ne eliras hodiaŭ — *Ele não saiu por algum motivo*
42. Tio ne koncernas min — *Isso não é comigo*
43. Neniu! Fine ili eliris! — *Ninguém! Afinal foram-se!*
44. Restu la tutan nokton — *Fique toda a noite*
45. Nenie mi renkontis lin — *Não o encontrei em parte alguma*

46. Alie esti neniel povas — *De outra forma não pode ser absolutamente*
47. Voku laŭte, por ke li aŭdu — *Chame em voz alta para que ele ouça*
48. Nun estas ĉio en ordo — *Agora está tudo em ordem*
49. Kaj mi kaj mia frato * — *Tanto eu como meu irmão*
50. Tio estas tro multe! — *Isso é demais!*

51. Ĉiam la sama litanio — *É sempre a mesma ladainha*
52. Nu, nu, ne ploru plu! — *Ora, ora, não chore mais!*
53. Ne malŝparu tempon! — *Não dissipe o tempo!*
54. Por ĉio estas tempo — *Há hora para tudo*
55. Ne kredu lin naiva — *Não o creia ingênuo*

56. Ĉie okazas tio sama — *Em toda a parte acontece o mesmo*

57. Ludu iom pli kviete — *Brinque um pouco mais sossegado*
58. Respondu pli plene — *Responda com mais clareza*
59. Plenumu vian devon — *Cumpra com o seu dever*
60. Levu ambaŭ manojn — *Levante as mãos*

** Traduz-se "**kaj ... kaj**" por "tanto . . como" em português*

TEKSTO

Distreco

Iun tagon la fama angla matematikisto Newton ne volis matenmanĝi kun sia familio en la komuna manĝoĉambro; ĉar li estis tute en profunda pensado pri malfacila problemo kaj ne volis esti ĝenata. Lia edzino sendis servistinon kun unu ovo kaj kaldrono plena de akvo, por ke li povu mem kuiri la ovon, kiam li havos tromalsaton. Post kelkaj horoj la sinjorino eniris en la laborĉambron kaj laŭte ekridis. Tie staris Newton, rigardis la ovon, kiun li tenis en la mano, kaj en la bolata akvo kuŝis lia poŝhorloĝo!

Efika rimedo

La angla poeto Swift foje rajdis kun sia servisto tra la kamparo kaj restis dum la nokto en gastejo. La proksiman matenon Swift postulis siajn botojn. La servisto alportis ilin, sed ili ne estis purigitaj. "Kial vi ne purigis la botojn?" Demandis Swift. La servisto respondis: "Ho, mi pensis, ke ne estas necese; ĉar ili ja baldaŭ ree malpuriĝos." Swift diris nenion, surmetis la botojn kaj kaŝe ordonis al la gastejestro, ke li ne donu al la servisto matenmanĝon.

Kiam poste ili ekvojaĝis, la servisto diris: "Via moŝto, mi ricevis ankoraŭ nenion por manĝi!" "Ho," diris Swift, "mi pensis, ke ne estas necese; ĉar vi ja baldaŭ ree malsatiĝus." — Depost tiu tempo la servisto regule purigis la botojn.

En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas
Pimenta nos olhos de outrem é refresco.

En ŝerco kaj ludo ofte sidas aludo.
Em toda brincadeira há um fundo de verdade.

Kiu multe deziras, nenion akiras.
Quem tudo quer, tudo perde.

ĈAPITRO VII		**CAPÍTULO VII**
Por esprimi surprizon	**33.**	*Para exprimir surpresa*
Por esprimi miron	**34.**	*Para exprimir espanto*
Por esprimi dubon	**35.**	*Para exprimir dúvida*
Ĉiutagaj frazoj	**36.**	*Frases de uso diário*

Unu gramo da feliĉo estas pli valora ol dek funtoj da saĝeco.
Prov. Alemão

La diablo ne estas tiel malbela, kiel oni pentras ĝin.
Prov. Português

Korva malbeno ĉevalon ne mortigas.
Maldição de urubu não mata cavalo.
Prov. Brasileiro

Tro da libero kondukas al mizero.
Abuso da liberdade conduz à necessidade.

33. POR ESPRIMI SURPRIZON — *PARA EXPRIMIR SURPRESA*

1. Tiu vidaĵo estas belega – grandioza – admirinda – mirinda — *Essa vista é sublime – grandiosa – admirável – maravilhosa*
2. La animo plilarĝiĝas ĉe l' vido de tiom da mirindaĵoj! — *A alma se enaltece à vista de tantas maravilhas!*
3. Tute ne min tuŝas, ke la tuta mondo ĝin scias — *Não me importa que todo o mundo o saiba*
4. Mi devas konfesi, ke mi estas surprizita — *Devo confessar, que estou surpreso*
5. Oni restus tutan tagon rigardante tion — *Ficar-se-ia um dia inteiro olhando isso*

6. Mi ne ĉesas admiri ĉion, kion mi vidas — *Estou admirado diante de tudo que vejo*
7. Ion pli belan, mi ne konas en la mondo — *Não conheço nada mais belo no mundo*
8. Ba, kia banalaĵo! kaj kia sofismo! — *Ora, que banalidade! E que sofisma!*
9. Kiam strangan ideon vi havas! — *Que diabo de ideia você tem!*
10. Se oni ne vidus, oni ne kredus — *Se não se visse, não se acreditaria*

11. Tio transpasas la mezuron [55] — *Isso passa da medida*
12. Estas nekredeble grandioza! — *É de uma grandeza inacreditável!*
13. Mia Dio, kia malbela mieno! — *Meu Deus, que cara feia!*
14. Kia naivulo mi (ja) estis! — *Que ingênuo que fui!*
15. Kiel neĝuste vi lin taksas! — *Como você faz mau julgamento dele!*

16. Kiajn okulojn ŝi havas! — *Que olhos os dela!*
17. Ĝi estas mirakla efekto! — *É um efeito prodigioso!*
18. Kiu estus pensinta tion! — *Quem teria pensado isso!*
19. Li eksaltis pro surprizo — *Ele pulou de surpresa*
20. Je io, kion mi ne atendis — *Eis uma coisa que eu não esperava*

21. Ŝi eksaltis de surprizo — *Ela deu um salto de surpresa*
22. Mi eksaltis de ĝojo — *Dei um pulo de alegria*
23. Tio estas neordinaraĵo — *Isso é uma coisa extraordinária*
24. Vi havas tiajn ideojn! — *Você tem cada ideia!*
25. Kiel boneta vi estas! — *Como você é boazinha!*

26. Kia naivulo vi estis! — *Que ingênuo você foi*
27. Kia kadavreca mieno! — *Que cara de defunto!*
28. Kian ideon vi havas! — *Que ideia você tem!*
29. Kiel ŝi estas bela! — *Como ela é formosa!*
30. Kia olda virino! — *Que mulher velha!*

31. Jen kio min mirigas — *Eis o que me admira*
32. Kia bela vi estas! — *Como você é bonita!*
33. Estas tre strange! — *É muito estranho!*
34. Kia bela knabino! — *Que garota bonita!*
35. Kia bela infano! — *Que linda criança!*

36. Mi miras pri tio — *Estou admirado disso*
37. Kia bela virino! — *Que bela mulher!*
38. Kia malsociulo! — *Que sujeito antissocial!*
39. Ĉu estas eble? — *Será possível?*
40. Kia angeleto! (fig.) — *Que amor de criança!*

41. Kia sciemulo! — *Que curiosol*
42. Estas eblete! — *É possível!*
43. Je mia vorto! — *Palavra de honra!*
44. Li ege miris — *Ele ficou admiradíssimo*
45. Kia virino! — *Que mulher!*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

surprizi — *surpreender*; **mirigi** — *surpreender, abismar;* **miri** — *estranhar, admirar-se*; **surprize** — *de surpresa;* **admiri** — *admirar, estranhar;* **gapi** — *ficar boquiaberto, pasmado*

[55] *Quando em conversação*

LEMBRETE:

Lembre-se de que não há letra muda em esperanto e que o acento tônico recai sempre na penúltima sílaba.

GRUPOS CONSONANTAIS

Nota 14. O grupo consonantal **gn**, tem a pronúncia do **gn** em português nas palavras: di**gn**idade, i**gn**orar, ma**gn**eto, etc.

GN=GN

rezignacio — resignação; **signalo** — sinal; **magneto** — magneto; **ignori** — ignorar; **magnolio** — magnólia; **magnezio** — magnésia; **asigni** — consignar; **digno** — dignidade

Continua na página 116

34. Por esprimi miron — *Para exprimir espanto*

1. Ju pli mi pensas pri tio, des pli mi estas mirigita — *Quanto mais penso nisso, mais fico admirado*
2. Por neniu prudenta homo tio estas kredebla — *A nenhuma pessoa de juízo isso seria crível*
3. Ĝi estas afero, kiun oni eĉ ne povas imagi — *É uma coisa que não se pode imaginar*
4. Domaĝe, ke mi tion ne sciis antaŭe — *É pena que não soubesse disso antes*
5. Estas necese vidi ĝin por kredi — *É preciso vê-lo para crer*

6. Li gapis tuj kiam li vidis min — *Ele ficou boquiaberto logo que me viu*
7. Tio estas al mi tre malagrabla — *Isso me é muito desagradável*
8. Neniu povis antaŭsupozi tion — *Ninguém podia pressupor isso*
9. Tio ŝajnas al mi tre stranga [56] — *Isso me parece muito esquisito*
10. Kion vi diras, tute mirigas min — *Estou surpreso do que você está me dizendo*

11. Permesu, ke mi dubu pri tio — *Permita-me que eu duvide disso*
12. Pardonu, se mi vin ektimigis — *Perdoem se os assustei*
13. Stultaĵo! – Ĉu estas vere? — *Tolice! – É verdade?*
14. Mi estas mirigita pri tio! — *Estou admirado disso!*
15. Vere! Ĉu vi parolas serioze? — *É mesmo! Você está falando sério?*

16. Ĝi estas vere grandioza! — *É verdadeiramente magnífico!*
17. Kiu estus ĝin supozinta? — *Quem teria admitido isso?*
18. Kiu estus pensinta tion! — *Quem estaria imaginando isso!*
19. Kia stranga okazintaĵo! — *Que coisa extraordinária!*
20. Tio ĉi estas admirinda! — *Isto é admirável!*

21. Ĝi estas nekomprenebla! — *É incompreensível!*
22. Tio estas admireginda! — *Isso é formidável!*
23. Mi estas tre mirigita! — *Estou muito admirado!*
24. Oni erare informis vin — *Você foi mal informado*
25. Ho! vi ne povas imagi! — *Ah! Não me fale!*

26. Espereble vi sukcesos! — *Tomara que você logre êxitos!*
27. Mi (miregas) gapas! — *Estou pasmado!*

28. Kiel tio povas okazi? — *Como é possível isso?*
29. Tio estas timeginda! — *Isso é formidável!*
30. Mi tre miras pri tio — *Muito me admiro disso*

31. Kia belega ĝi estas! — *Como é lindíssimo!*
32. Terure! Nekredeble! — *Horrível! Incrível!*
33. Kia idioto mi estas! — *Como sou idiota!*
34. Kiel! ne povas esti! — *Como! Não pode ser!*
35. Ha! kia bona ŝerco! — *Ah! Que boa piada!*

36. Kia malĝusta tempo! — *Que contra-tempo!*
37. Tio ne povas okazi! — *Isso não pode acontecer!*
38. Ĉu tio povas esti? — *Pode ser isso?*
39. Ĉu tio estas ebla? — *É possível isso?*
40. Ĝi estas mirinda! — *É admirável!*

41. Kiel? – Ĉu vere?! — *Como?! – Deveras?!*
42. Tio estas mirega! — *Isso é inaudito!*
43. Estas nekredeble! — *É incrível!*
44. Kia malbela viro! — *Que homem feio!*
45. Tio estas neebla! — *Isso é impossível!*

46. Ĉu vi mokas min? — *Você está zombando de mim?*
47. Fi, kiel abomene! — *Credo! Que coisa abominável!*
48. Vi mirigas min! — *Você me causa admiração!*
49. Kia sensencaĵo! — *Que tolice!*
50. Tio estas ebla! — *Isso é possível!*

51. Ĉu estos eble? — *Será possível?*
52. Kia sencerbulo! — *Que imbecil!*
53. Kia mirindaĵo! — *Que maravilha!*
54. Kia strangaĵo! — *Que esquisitice!*
55. Kiel? ĉu vere? — *Como? É verdade?*

56. Dio tion scias! — *Deus o sabe!*
57. Kiom da homoj! — *Quanta gente!*
58. Estas belege! — *É belíssimo!*
59. Kia virinaĉo! — *Que (bruxa) megera!*
60. Mi miras, ke... — *Admira-me que...*

61. Ha, frenezulo! — *Ah, que louco!*
62. Ne faru tion! — *Não faça isso!*
63. Senhontegulo! — *Descarado! Sem vergonha!*
64. Kia incendio! — *Que incêndio!*
65. Vere! Fakte! — *Verdade! Realmente!*

66. Je tiu horo! — *A essa hora!*
67. Kia fiparolo! — *Que palavrão!*
68. Kiel domaĝe! — *Que pena!*
69. Nekredeble! — *É incrível! Incrível!*
70. Bedaŭrinde! — *Infelizmente!*

[56] *Quando em conversação*

71. Kia fuŝaĵo! — *Que porcaria!*
72. Kia fihomo! — *Que indivíduo!*
73. Ne, neeble! — *Não, é impossível!*
74. Gardu vin! — *Cuidado!*
75. Kia aĉulo! — *Que ser vil!*

76. Ha! vere! — *Ah! Ora essa!*
77. Eble jes! — *Talvez sim!*
78. Kiel? Vi? — *Como? Você?*
79. Mirinde! — *Que maravilha!*
80. Vere, ne! — *Na verdade, não!*

81. Verdire! — *Na verdade!*
82. Atentu! — *Preste atenção!*
83. Terure — *É pavoroso!*
84. Domaĝe! — *Com a breca!*
85. Neeble! — *Impossível!*

35. Por esprimi dubon — *Para exprimir dúvida*

1. Jes mi komprenas, sed en dubaj okazoj — *Sim, compreendo, mas nos casos de dúvida*
2. Mi volas ankoraŭfoje pripensi tion — *Quero, uma vez mais, refletir sobre isso*
3. Momente mi ne povas rememori tion — *No momento não me lembro disso*
4. Mi ne estas el tiuj, kiuj kredas... — *Não sou dos que acreditam...*
5. Laŭ mia opinio estas (tiel) jene — *Segundo a minha opinião é assim*

6. Se li venus, mi tion dirus al li — *Se ele viesse eu lhe diria isso*
7. Mi ne scias, kion pensi pri tio — *Não sei o que pensar disso*
8. Mi estas en senelira situacio — *Estou num beco sem saída*
9. Mi komprenas tion alimaniere — *Compreendo isso de outro modo*
10. Mi supozas (konjektas), ke... — *Suponho (presumo), que...*

11. Tion mi ne povas prijuĝi — *Não posso dar parecer*
12. Mi estas en granda embaraso — *Estou em grandes apuros*
13. Ni havas malsaman opinion — *Temos opinião diferente*
14. Mi ne povas rememori tion — *Não posso recordar-me disso*
15. Eĉ ĉe tio li ne volis kredi — *Nem mesmo com isso ele quis acreditar*

16. Estus al mi agrable, se... — *Ser-me-ia agradável se...*
17. Tio dependas de tio, ĉu... — *Isso depende daquilo, se...*
18. Ni esperu la plej bonan — *Esperemos o melhor*
19. Aliflanke mi timas, ke... — *Além disso receio, que...*
20. Jen situacio sen eliro — *Eis uma situação sem saída*

21. Estas nekredeble, ke... — *É incrível que...*
22. Laŭ la cirkonstancoj! — *Conforme as circunstâncias*
23. Mi ne scias ĝin certe — *Não o sei ao certo*
24. Ŝajnas al mi, kvazaŭ... — *Parece-me, como se...*
25. Se mi rajtas tiel diri — *Se tenho o direito de assim dizer*

26. Jen la ĉiama problemo — *Eis o eterno problema*
27. Mi ne dubas, nek dubis — *Não duvido, nem duvidei*
28. Se pluvos, li ne venos — *Se chover, ele não virá*
29. Ŝi diris iom nekuraĝe — *Ela disse com certa timidez*
30. Mi penas kredi al vi — *Custo acreditar em você*

31. Se mi ĝuste memoras — *Se me recordo com precisão*
32. Sub la kondiĉo, ke... — *Sob a condição, que...*
33. Mi povas imagi, ke... — *Posso imaginar que...*
34. Ĉu vi dubas tion? — *Você duvida disso?*
35. Mi dubas pri tio — *Duvido disso*

38. Mi volas lin vidi morgaŭ — *Desejo vê-lo amanhã*
39. Li estas sendube malsaĝulo — *Ele deve ser um tolo*
40. Mi iros tien post monato — *Irei lá daqui a um mês*

41. Li vivas ĉiam rapidante — *Ele vive sempre apressado*
42. Li estas avida je gloro — *Ele está ávido de glória*
43. Mi vidis lin en ia tago — *Eu o vi num certo dia*
44. Mi ankoraŭ scias nenion — *Não sei nada ainda*
45. Mi alvenis je noktomezo — *Cheguei à meia noite*

46. Vi skribas treege bone — *Você escreve admiravelmente*
47. Li ne estis tie, nek mi — *Ele não esteve lá, nem eu*
48. Mi venos (en) dimanĉo(n) — *Virei (no) domingo*
49. Mi voĉdonis kontraŭ li — *Votei contra ele*
50. Mi amas vin plej multe — *Amo-te ao máximo*

51. Li faris tion intence — *Ele fez isso intencionalmente*
52. Mi estas okupata nune — *Estou ocupado presentemente*
53. Li agas laŭ sia opinio — *Ele age segundo sua opinião*
54. Ili faris ĝin laŭvice — *Eles fizeram-no alternadamente*
55. Vi povos veni ĉiomope — *Vocês poderão vir quantos quiserem de cada vez*

56. Mi ne estas homo tia — *Não sou homem dessa espécie*
57. Li ree demandis tion — *Ele perguntou aquilo outra vez*
58. Li ĉiam venadis laca — *Ele sempre chegava cansado*
59. Via amiko staras tie — *O seu amigo está (de pé) ali*
60. Mi amos cin ĝismorte[73] — *Amar-te-ei até à morte*

[73] ***CI**, tu te, ti, tigo; **CIA**, teu, tua; **KUN CI**, contigo; **CII IUN**, tratar alguém por tu.*

ESPERANTO-PORTUGUÊS
(CONVERSAÇÃO)

Somos verdadeiramente surdos para as línguas que não entendemos
Cícero

Esperanto estas "nenies propraĵo", nek en rilato materiala, nek en rilato morala
Zamenhof

Nao é louco quem corre atrás de uma esperança, porque a esperança é o fim de nossa própria vida
Menotti del Picchia

Sen ordo en afero, ne ekzistas prospero

ĈAPITRO X — CAPÍTULO X

Promenado per veturilo **49.** Passeio de carro
Por Lui taksion **50.** Para alugar táxi
Ĉe la Benzinstacio **51.** No Posto de gasolina
Ekskurso **52.** Excursão
Strataj akcidentoj **53.** Acidentes de rua
Ĉiutagaj frazoj **54.** Frases de uso diário

Amo al mono estas radiko de ĉia malbono

La feliĉo, ankaŭ la granda feliĉo, estas nur sumo de malgrandaj ĝojoj
Erich Lileinthal

Unugramo de praktiko egalvaloras mil kilogramojn da teorio
Prov. Inglês

49. PROMENADO PER VETURILO — *UM PASSEIO DE CARRO*

1. La veturilo estas tro ŝarĝita, estus nesaĝe transporti per la pramo — *O carro está muito carregado, seria imprudência atravessar de balsa*
2. La prezo de l' veturo estas ĉiam sama, kia ajn estus la vojiro — *O preço da viagem é sempre igual, seja qual for a rota*
3. Vi povas veni morgaŭ matene preni min je la sepa ĉe la hotelo... — *Você poderá vir amanhã de manhã me apanhar às sete no hotel...*
4. Dum mia malgranda vojaĝo, mi povis admiri belajn pejzaĝojn — *Durante minha pequena viagem, pude admirar belas paisagens*
5. Kelkaj paŝoj pli antaŭen, kaj ni ruliĝos de supre malsupren — *Alguns passos a mais e rolaremos pelo despenhadeiro*

6. Ni metu la pakaĵojn sur alian kamionon kaj ni iros piede — *Carreguemos as bagagens para outro caminhão e iremos a pé*
7. Ŝoforo, mi prenas vin tempe; montru al mi vian horloĝon — *Chofer, vou alugá-lo por hora; mostre-me seu relógio*
8. Ĉu vi ne havas pli komfortan taksion? Tiu ĉi estas malbelega — *V. não tem outro táxi mais confortável? Este é feiíssimo*
9. Motoristo atentu... kruta deklivo, danĝeraj vojkurboj! — *Motorista cuidado... descida rápida, curvas perigosas!*
10. La vojo estas tute barita per derompaĵoj de la pluvoj — *A estrada está completamente obstruída pelos destroços das chuvas*

11. Tuj kiam vi havos liberan lokon interne, avertu min — *Avise-me logo que você tiver um lugar interno desocupado*
12. Oni diris al mi, ke ekzistas du vojoj por iri al... — *Disseram-me que há dois caminhos para ir-se à...*
13. Je la deka horo mi alvenos al la celo de mia vojaĝo — *Às dez horas chegarei ao fim de minha viagem*
14. La kurboj de tiu ĉi vojo devus esti interne deklivaj — *As curvas desta estrada deviam ser inclinadas internamente*
15. Ni estos devigitaj pasigi la nokton sur la landvojo — *Seremos obrigados a passar a noite na estrada*

16. Ĉu vi povas montri al mi kia buso veturigas al... ? — *Você pode indicar-me qual o ônibus que vai (conduz) a... ?*
17. Mi deziras malfermitan veturilon kun du ĉevaloj — *Desejo uma viatura aberta com dois cavalos*
18. Permesu, ke mi eksidu – trapasu – malsupreniru — *Dê licença que me assente – passe – desça*
19. Via aŭtomobilo estas varma, lasu ĝin malvarmiĝi — *Seu carro está quente, deixe-o esfriar*
20. Tiu ĉi estas tro malgranda, ĉar ni estas kvar — *Esta é muito pequena, somos quatro*

21. Mi bezonas veturilon por fari ekskurson al... — *Preciso de um carro para fazer uma excursão a...*
22. Alfiksu tiun malgrandan valizon post la selo — *Coloque essa pequena valisa atrás da sela*
23. Ĝi trorapidas je kvin minutoj, rilate la mian — *Está adiantado de cinco minutos em relação ao meu*
24. Motoristo, ĉu estas vi, kiu kondukos nin? — *Motorista, é você que vai nos levar?*
25. Ekpluvas, fermu la kapoton de l' veturilo — *Começa a chover, abaixe a capota do carro*

26. Ĉu mi devas iri al la giĉeto por preni numeron? — *Devo ir ao guichê para apanhar o número?*
27. Kiu estas la monto, kiun ni vidas tie? — *Que montanha é aquela que vemos lá?*
28. Li ĉiam bremsas la veturilon tro krude — *Ele sempre freia o carro de modo muito brusco*
29. Ĉu vi pensas, ke gvidisto estas necesa? — *Você acha que é necessário um guia?*
30. Ekzistas multaj arbaroj en tiu lando — *Há muitas matas neste país*

31. Diversaj veturiloj estas sur la strato — *Diversos carros estão na rua*
32. Ĉu vi veturas malproksime de la banko? — *Você passa distante do banco?*
33. Kiom da tempo vi bezonas por iri tien? — *Quanto tempo você leva para ir lá?*
34. Mi deziras aŭtomobilon kaj ŝoforon por iri al... — *Desejo um carro e um chofer para ir a...*
35. Kiom oni devas doni al la gvidisto? — *Quanto se deve dar ao guia?*

36. Vi utiligas bestojn por iri tien — *Você utiliza animais para ir lá*
37. Ĉu la lando estas riĉa je ĉasaĵo? — *A terra é abundante em caças?*
38. Ĉu mi devas kunpreni provizaĵojn? — *Devo levar provisões?*
39. Ĉu mi devas maljungi la ĉevalojn? — *Posso soltar (desatrelar) os cavalos?*

40. Ĝis kioma horo ekveturas la busoj? — *Até que hora partem os ônibus?*

41. Se vi volas, ni tagmanĝos tie ĉi — *Se quiser, almoçaremos aqui*
42. La torento forportis la ponton — *A corrente arrancou a ponte*
43. Kie mi povas trovi luveturilon? — *Onde posso encontrar um carro de aluguel?*
44. Vi devas halti ĉe unua restoracio — *Você deve parar perto do primeiro restaurante*
45. Kiom vi luigas la taksion? — *Por quanto você aluga o táxi?*

46. Atentu malkovri la aŭtomobilon — *Cuidado ao abrir o carro*
47. Mi povas veturigi aŭtomobilon — *Posso guiar carro*
48. Plimallongigu la piedingojn — *Encurte os estribos*
49. Ĉiu prenis sian sidlokon — *Cada um tomou o seu lugar*
50. Forveturu kaj iru rapide — *A caminho e vá depressa*

51. Kiom restas al vi? — *Quanto lhe resta?*
52. Restas al mi dek dolaroj — *Restam-me dez dólares*
53. Mi deziras bonan ĉevalon — *Quero um bom cavalo*
54. Ĉu vi dresas ĉevalojn? — *Você amansa cavalos?*
55. Mia aŭtomobilo enkotiĝis — *Meu carro atolou-se*

56. Kiu estus la plej bona? — *Qual seria o melhor?*
57. Montru al mi luigiston — *Mostre-me um alugador*
58. La vojo estas senbara — *O caminho está livre*
59. Ne tretu mian piedon! — *Não me pise o pé!*

60. Haltado malpermesata! — *Estacionamento proibido!*
61. La rivero superfluis — *O rio transbordou-se*
62. Ni preterpasis ĉiujn — *Passamos por tudo*
63. Pli bone estas halti — *É melhor parar*
64. Ne kuru tiel rapide! — *Não corra tão depressa!*
65. Rigardu! Auskultu! — *Olhe! Escute!*

66. Netrairebla strato! — *Rua intransitável!*
67. Rigardu eksteren! — *Olhe para fora!*
68. Estas tre polve — *Faz muita poeira*
69. Rigardu antaŭen! — *Olhe para frente!*
70. Rigardu flanken! — *Olhe para os lados!*

71. Denove! Refoje! — *De novo! Outra vez!*
72. Nealirebla vojo — *Caminho inacessível*
73. Iru malrapidle! — *Vá devagar!*
74. Vidu! Rigardu! — *Veja só! Olhe só!*
75. Estas tre kota — *Faz muita lama*

76. Rekte antaŭen! — *Continue para a frente!*
77. Haltu tie ĉi! — *Pára aqui!*
78. Haltu! Haltu! — *Pára! Pára!*
79. Maldekstren! — *Para a esquerda!*
80. Kia monpuno! — *Que multa*

81. Malantaŭen! — *Recuem! Para trás!*
82. Iru rapide! — *Vá depressa!*
83. Malrapide! — *Devagar!*
84. Dekstren! — *Para a direita!*
85. Ne haltu! — *Não pare!*

86. Kia bruo! — *Que barulho!*
87. Antaŭen! — *Para a frente!*
88. Daŭrigu! — *Continue!*
89. Tien ĉi! — *Por aqui!*
90. Kiomope? — *Quantos de cada vez?*

91. Krucigo! — *Encruzilhada!*
92. Rapidu! — *Ande depressa!*
93. Rapide! — *Depressa!*
94. Haltu! — *Pare!*
95. Baro! — *Barreira!*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

enlokiĝi — *tomar assento;* **elbusiĝi —** *descer do ônibus;* **enviciĝi —** *entrar na fila;* **trablovo —** *corrente de ar;* **treti —** *apertar, pisar (com os pés);* **enbusiĝi —** *tomar o ônibus;* **aŭtoĉaro —** *ônibus (de turismo, etc.)* **enkotiĝi —** *atolar-se;* **monpuni —** *multar;* **flako —** *poça d'água*

Nota 22. No grupo **sc** a pronúncia deve ser de **sts** com clareza. Não há o som de um **e** ou **i** breve antes do **s** no grupo **sc**. Confira: **Mi ne scias** (pron. "*mi ne stsias*" e não "*mi ne istsias*"), não sei. **Li sciigos min** (pron. "li *stsiígos min*" e não "*li istsiígos min*"), ele o informará.

SC = **STS** (PRONÚNCIA)

antaŭsciigi — anunciar
malscio — ignorância
konscii — ter ciência
sciuro — esquilo
dissciigi — divulgar
sciigi — avisar, informar
nescii — ignorar

ekscii — ficar ciente
scienco — ciência
sceptro — cetro
konscienco — consciência
nesciulo — um ignorante
ne scii — não saber
troscivola — indiscreto

Continua na página 160

50. POR LUI TAKSION — *PARA ALUGAR UM TÁXI*

1. Ĉu vi povas montri al mi, kie estas la busstacio por... ? — *Você pode me indicar onde fica a rodoviária para... ?*
2. Ni interkonsentu por... kaj mi donos trinkmonon al la portisto — *Combinamos por... e eu darei uma gorjeta ao carregador*
3. Sinjoro, jen ni havas la taksion. Ni veturu al la hotelo — *Senhor, olhe aqui o nosso táxi. Vamos para o hotel*
4. Mi veturas per ĵipo, buso, tramo, ŝipo, aviadilo, biciklo, ktp — *Viajo de jipe, ônibus, bonde, navio, avião, bicicleta, etc.*
5. Ĉu vi povas loki miajn kestojn malantaŭ la taksio? — *Você pode pôr as minhas malas atrás do táxi?*

6. Diru al mi la sumon da mono, kiun mi devas pagi — *Diga-me a soma em dinheiro, que devo pagar*
7. La ŝoforo veturigas la aŭtomobilon en la urbon — *O chofer guia o automóvel para dentro da cidade*
8. Kie mi povus trovi veturilon por iri ĝis... ? — *Onde eu poderia encontrar um carro para ir até..?*
9. La taksio estas sub la dispono de la publiko — *O táxi está à disposição do público*
10. Li ekveturas per kamiono, motociklo, trajno, ktp — *Ele parte de caminhão, motocicleta, trem, etc.*

11. Kiom vi postulas por konduki min ĝis... ? — *Quanto você pede para levar-me até ao... ?*
12. Estu morgaŭ antaŭ la pordo de la hotelo — *Você amanhã esteja à porta do hotel*
13. Konduku min al la ŝipo forveturonta al... — *Leve-me ao navio que vai partir para...*
14. Bonvolu fermi la busan pordon, mi petas — *Tenha a bondade de fechar a porta do ônibus, por favor*
15. La aŭtomobiloj ne povas plu antaŭeniri — *Os automóveis não mais poderão seguir*

16. Kiom da fojoj vi busŝanĝas antaŭ la alveno al... ? — *Quantas vezes V. faz baldeação de ônibus antes de chegar a... ?*
17. Ĉu ni trovos tie helpveturilojn? — *Encontraremos lá veículos auxiliares?*
18. Rapidu iom, mi aŭdas la sonorilon — *Apresse-se um pouco, ouço a campainha*
19. Diru al mi, kiom mi ŝuldas al vi — *Diga-me quanto estou lhe devendo*
20. La motoristo donis al mi petveturon — *O motorista deu-me uma carona*

21. Ŝoforo, rapidu al la flughaveno — *Chofer, apresse-se ao aeroporto*
22. Vi povos alveni ĝustatempe — *Você poderá chegar a tempo*
23. Ĉu vi povas luigi taksion al ni? — *Você pode nos alugar um táxi*
24. Certe, sinjoro, kun plezuro — *Certamente, senhor, com prazer*
25. Post du horoj mi estos en Rio — *Daqui a duas horas estarei no Rio*

26. Mi luis taksion por la veturo — *Aluguei um táxi para a viagem*
27. La antaŭa aŭtomobilo forkuris — *O carro da frente fugiu*
28. Lasu min vidi vian taksion — *Deixe-me ver o seu táxi*
29. La aŭtomobilo estas luebla — *O automóvel é de aluguel*
30. Ni estas tri personoj — *Somos em número de três*

31. Du vicoj da veturiloj — *Duas filas de veículos*
32. Povas okazi malfeliĉo — *Pode acontecer um desastre*
33. Venigu al mi taksion — *Mande-me vir um táxi*
34. Ĉu ni luu taksion? — *Vamos alugar um táxi?*
35. Du vicoj da busoj — *Duas filas de ônibus*

36. Estas polvoplene — *Está poeirento*
37. Estas glitige — *Está escorregadio*
38. Vi povas piediri — *Você pode ir a pé*
39. Estas polve — *Faz poeira*
40. Forkuru! — *Fuja!*

doni petveturon al iu — *dar carona a alguém*; **kvarrada aŭtomobilo —** *automóvel de quatro rodas;* **vojaĝi per taksio —** *viajar de táxi;* **luebla aŭtomobilo —** *carro de aluguel;* **starigi laŭvice —** *fazer fila;* **vojaĝi per aŭtomobilo —** *viajar automóvel;* **vojaĝi per kamiono —** *viajar de caminhão;* **vojaĝi per ĉevalo —** *ir a cavalo;* **ekiri, ekveturi —** *partir;* **per motociklo —** *de motocicleta;* **lui taksion —** *alugar um táxi;* **sonorileto —** *campainha;* **petveturi —** *viajar de carona;* **taksimetro —** *taxímetro;* **forkonduki —** *fazer sair, afastar;* **traveturi —** *atravessar (em veículo);* **traveturo —** *travessia (em veículo);* **petveturo —** *carona;* **kondukejo —** *boleia;* **aŭtobuso —** *auto-ônibus;* **kvarrada —** *de quatro rodas;* **kvarsida —** *de quatro lugares;* **sesrada —** *de seis rodas;* **durada —** *de duas rodas;* **aŭtejo —** *garagem;* **trairejo —** *passagem, travessia;* **ŝarĝaŭto —** *caminhão;* **halti en —** *parar em;* **enveturi —** *entrar num carro;* **ĵinrikŝo —** *jinrixá;* **per ĵipo —** *de jipe;* **fajfilo —** *apito;* **kamiono —** *caminhão;* **promeni —** *passear;* **piediri —** *ir a pé;* **malfrui —** *atrasar, estar atrasado;* **konduki —** *conduzir, levar;* **sireno —** *sirena (navio, etc.);* **trairi —** *atravessar (a pé, etc.);* **garaĝo —** *garagem;* **ŝoforo —** *chofer;* **veturi —** *andar, viajar (em veículo);* **stacio —** *estação (de veículos);* **korno —** *buzina;* **marŝi —** *andar, caminhar;* **korni —** *buzinar;* **ekiri —** *pôr-se a caminho;* **buso —** *ônibus;* **paŝi —** *dar um passo, caminhar;* **tuj —** *logo, sem demora*

Nota 23. As palavras, em esperanto, que começam pelo grupo **sp**, são quase todas iniciadas em português por **esp**, com exceção daquelas que não têm origem latina.

SP SEM O SOM DE **E** OU **I** ANTES DO **S**

spektaklo — espetáculo
spiono — espião
spado — espada
spinaco — espinafre
specifi — especificar
spermaceto — espermacete
spino — espinha dorsal
spatelo — espátula
sprita — espirituoso
spiko — espiga
spaco — espaço
sporto — esporte
spegulo — espelho
spartano — espartano
sprono — esporão
speciala — especial
spirito — espirito
spektro — espectro
spermo — esperma
spiralo — espiral

OBSERVAÇÃO 5. O **s** do grupo **sp** deve ser pronunciado com clareza (como o francês, latim, italiano, etc.), sem admitir antes um **e** inicial, pois, há diferença de pronúncia entre: **es**primi, *exprimir*; **e**splori, *explorar*; e **s**piko, *espiga*; spiri, *espirar*; **s**pongo, *esponja*. Veja o leitor, que com exceção do português e espanhol, o restante das línguas neolatinas e mesmo o inglês e alemão têm o mesmo grupo **sp** no início como em esperanto.
Confira:

Esperanto	**Latim**	**Francês**	**Italiano**	**Inglês**	**Alemão**
speciala	specialis	spécial	speciale	special	spezial
spektro	spectrum	spectre	spettro	spectre	Spektrum
spiralo	spira	spirale	spirale	spiral	Spirale

Continua na página 160

Nota 24. Palavras que começam em esperanto por **st** são quase todas em português iniciadas por **est**, exceto aquelas que não têm origem latina. O **s** do grupo **st** deve ser pronunciado com clareza (como em latim, italiano, etc.) sem admitir antes um e inicial, devido haver diferença entre: **es**ti, *ser*; **es**tingi, *extinguir*; **es**tro, *chefe*; **st**ampi, *estampar*; **st**ano, *estanho*; **st**ango, *estaca*. (Pronúncia errada: *is*tampi, *is*tano, *is*tango). Com exceção do português e espanhol, o restante das línguas neolatinas e mesmo o inglês e alemão têm o mesmo grupo **st** no início de palavras como em esperanto. Confira:

Esperanto	Latim	Italiano	Inglês	Alemão
stomako	stomachus	stomaco	stomach	—
stadio	stadium	stadio	stadium	Stadium
stari	stare	stare	stand	stehen
stato	status	stato	state	Stand

ST

stabo — estado-maior
stagni — estagnar
statiko — estática
statuo — estátua
stearino — estearina
sterni — estender
stacio — estação

stano — estanho
sterko — esterco
stileto — estilete
stimuli — estimular
stoko — estoque

strikta — estrito
stufi — estufar
stoika —estóico
streĉi —esticar
stulta —estulto

statistiko — estatística
staturo — estatura
stalo — estábulo
stelo — estrela
stigmo — estigma (bot.)
stameno — estame
stepo — estepe

stilo — estilo
stivi — estivar
strio — estria
strofo — estrofe
studi — estudar

stuki — estucar
stranga — estranho
studanto — estudante
sturgo — esturjão
stupo — estopa

Continua na página 172

51. **ĈE LA BENZINSTACIO** — *NO POSTO DE GASOLINA*

1. La akumulatoro devas ĉiam doni sufiĉe da voltkvantoj — *O acumulador deve dar um bom número de voltagens*
2. Tio ne estas grava, sed mia motoro estas en bedaŭrinda stato — *Isso não é nada, mas o motor ficou em estado deplorável*
3. Mi multe ŝatas aŭtomobilo provizitajn je senbruigiloj — *Gosto muito de automóveis munidos de silenciadores*
4. Du el la risortoj de la malantaŭ dekstra rado rompiĝis — *Duas das molas da roda direita traseira partiram-se*
5. La risortdolĉeco de tiu ĉi aŭtomobilo estas mirinda — *A estabilidade das molas deste carro é uma maravilha*

6. La ŝmiriloj devas regule funkciadi kaj ne obstrukciĝi — *Os lubrificadores devem funcionar bem e não se entupirem*
7. La ĉeno de biciklo devas esti el tre bona kvalito — *A corrente de bicicleta deve ser também da melhor qualidade*
8. Bona aŭtomobilo devas posedi almenaŭ tri rapidojn — *Um bom automóvel deve ter pelo menos três velocidades*
9. La radoj estas malebenegitaj kaj ne plu uzeblaj — *As rodas estão emperradas e fora de uso*
10. La ekirigo de la aŭtomobilo estas malfacila — *A partida do carro está difícil*

11. Tute neeble, oni devas malstreĉi la bremsojn — *Totalmente impossível, devemos (soltar) afrouxar os freios*
12. Ĉu mi trovos mekanikiston aŭ seruriston en la ĉirkaŭaĵo? — *Encontrarei um mecânico ou um serralheiro pelas redondezas?*
13. Necese estas, ke oni reebenigu ambaŭ radojn — *É preciso endireitar (desempenar) as duas rodas*
14. Necese estus aldoni kontraŭ ŝraŭbingon — *É conveniente pôr uma contraporca*
15. Estas necese fari bremsojn per dratoj — *É preciso fazer freios de arame*

16. Unue, ni devas kojne fiksi la radojn — *Primeiramente vamos escorar (calçar) as rodas*
17. La kapo de la kupla stango liberludas — *O encaixe da biela está com folga*
18. La aŭtomobilo terure flankenglitas — *O automóvel deu uma derrapagem terrível*
19. Ĉu vi povas enirigi la veturilon? — *Você pode fazer entrar o carro?*
20. La bobeno havas mallongan cirkviton — *A bobina tem um curto-circuito*

21. Tiu ŝraŭbingo (eluziĝis) difektiĝis — *A porca está (espanada) estragada*
22. Eĉ plie, la aertubo estas pinĉita — *Para o cúmulo do azar, a câmara-de-ar está furada*
23. Ĝi estas implikita en la bremsoj — *Ele está embaraçado nos freios*
24. La klapo ne estas perfekte fermita — *A válvula não está bem fechada*
25. Okazis granda fendo en la aertubo — *Houve um grande estouro na câmara-de-ar*

26. La risortaj teniloj estas eluzitaj — *As camisas das bielas estão gastas*
27. La akso de la rado malrektiĝis — *O eixo da roda está torcido*
28. Konduku la aŭtomobilon en la garaĝon — *Ponha o automóvel na garagem*
29. La pneŭmatiko havas ŝveliĝon — *O pneu está com um "papo"*
30. La motoro bezonas trapurigon — *O motor precisa de uma limpeza geral*

31. La bobeno havas kontakton — *A bobina está dando contato*
32. La radiatoro estas krevita — *O radiador está arrebentado*
33. La aertubo estas trapikita — *A câmara-de-ar está furada*
34. La direktilo ne estas firma — *A direção está com folga*
35. Ni havis teruran motorpaneon — *Tivemos um terrível enguiço no motor*

36. La gasmiksilo tropleniĝis — *O carburador está afogado*
37. La rapidŝanĝilo rompiĝis — *O câmbio de marcha partiu-se*
38. De kio devenas tiu skuo? — *De onde vem essa trepidação?*
39. La ŝprucilo obstrukciĝis — *O injetor está entupido*
40. La motoro subite haltis — *O motor parou de repente*

41. Kio okazas ankoraŭ? — *O que está acontecendo ainda?*
42. La sparkilo estas grasŝmirita — *A vela está suja de graxa*

43. La aertubo kreviĝis — *A câmara-de-ar estourou*
44. La korno raŭkiĝis — *A buzina (não toca) está rouca*
45. Unu rado defalis — *Uma roda desprendeu-se*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

erodata aŭtomobilo — *calhambeque;* **reversi veturilon —** *tombar um veículo;* **mallonga cirkvito —** *curto-circuito;* **luksa aŭtomobilo —** *carro de luxo;* **erodi la motoron —** *carcomer o motor;* **pinĉita aertubo —** *câmara-de-ar furada;* **ellasa klapo —** *válvula de escapamento;* **benzinstacio —** *posto de gasolina;* **malobstrukci —** *desentupir;* **direktilrado —** *volante;* **ekfunkciigi —** *pôr em marcha;* **radaksingo —** *cubo de roda;* **amortizilo —** *amortecedor;* **pneŭmatiko —** *pneumático;* **sonavertilo —** *buzina;* **paneo de motoro —** *enguiço de motor;* **lanuga kusenego —** *edredão;* **soni la kornon —** *tocar a buzina;* **malobstrukciĝi —** *desentupir-se;* **lanuga kovrilo —** *edredão;* **senbruigilo —** *silenciador (de carro);* **benzinkruĉo —** *galão de gasolina;* **karburatoro —** *carburador;* **obstrukciĝi —** *entupir-se;* **artikstango —** *biela;* **ekfunkciigi —** *dar partida (no motor);* **startigilo —** *arranque (do motor);* **trapurigo —** *limpeza geral;* **gasmiksilo —** *carburador;* **taksimetro —** *taxímetro;* **trapurigi** — *fazer uma limpeza geral;* **difektiĝi** — *danificar-se, estragar-se;* **superpezo** — *sobrecarga;* **ŝraŭbingo** — *porca (tec.);* **obstrukci** — *entupir;* **eluziĝi** — *espanar (tec.), danificar-se;* **kreviĝi** — *estourar-se (pneu, etc.);* **ŝmirilo** — *lubrificador;* **ŝvelaĵo** — *"calombo" (no pneu);* **ekirigo** — *arranque, partida;* **radringo** — *aro da roda;* **tordiĝi** — *empenar-se;* **kontuŝo** — *contato (tec.);* **ŝveliĝo** — *"papo" (de ar);* **aertubo** — *câmara-de-ar;* **altiri** — *atrair, causar atração;* **kapoto** — *capô, capota (de carro);* **starti** — *dar partida (no motor);* **skuiĝi** — *trepidar, sacudir-se;* **ekskuo** — *trepidação, safanão;* **ŝmiri** — *lambuzar, lubrificar;* **kupli** — *encaixar, ligar (tec.);* **ĉarmi** — *encantar, fascinar;* **fendo** — *estouro (de pneu);* **krevi** — *arrebentar, estourar;* **aŭtejo** — *garagem;* **korni** — *tocar buzina;* **korno** — *buzina;* **ĉasio** — *chassi;* **graso** — *graxa;* **plenblovi** — *soprar (para encher);* **ŝmiroleo** — *óleo lubrificante;* **ŝraŭbilo** — *chave de parafuso;* **karburilo** — *carburador;* **gaspedalo** — *acelerador;* **sku(iĝ)o** — *trepidação, abalo;* **ŝraŭbero** — *rosca (de porca);* **sparkilo** — *vela (de motor);* **kontakto** — *contato (el.);* **ŝarĝaŭto** — *caminhão;* **aksingo** — *cubo (de roda);* **kamiono** — *caminhão;* **petrolo** — *petróleo;* **gvidilo** — *guidon;* **kandelo** — *vela;* **sparko** — *centelha (el.);* **ŝraŭbi** — *aparafusar;* **ŝraŭbo** — *parafuso;* **risorto** — *mola;* **pedalo** — *pedal;* **stiri** — *guiar (carro, etc.);* **panei** — *enguiçar (motor);* **fendi** — *estourar (pneu);* **kriko** — *macaco (mec.);* **kranko** — *manivela;* **skui** — *abalar, trepidar;* **aŭto** — *auto;* **akso** — *eixo;* **oleo** — *óleo;* **aero** — *ar*

52. **Ekskurso** — *Excursão*

1. La horo de la marbano estas ia rendevuo de ĉiuj elegantulinoj — *A hora do banho de mar é a hora de encontro de todas as elegantes*
2. Devas anaurаŭ ekzisti salonoj por ripozi kun kanapoj kaj divanoj — *Deve haver também salões de repouso com canapés e divãs*
3. Tiu estas tro granda – ĉu vi havas plastajn ĉapojn — *Esse é muito grande – você tem bonés de plástico*
4. Mi ankaŭ deziras snurŝuojn pro la ŝtonetoj — *Quero também alpercatas por causa das pedrinhas*
5. Mi preferas la plej facilan, se ĝi estos pli pentrinda — *Prefiro o mais fácil, se ele for mais pitoresco*

6. Vi estus tre ĝentila, se vi remetus min sur la bonan vojon — *Seria bondade sua, se você me reconduzisse ao caminho certo*
7. Ĉu la naĝejo estas sufiĉe granda, por ke oni povu naĝi? — *A piscina é bastante ampla que se possa nadar?*
8. La fluo estas tiel forta, ke neeble estas kontraŭnaĝi — *A corrente está tão forte que é impossível subir o curso do rio*
9. Mi ne scias naĝi, ĝis kia loko mi piedtuŝos la fundon? — *Não sei nadar, até que lugar dá pé?*
10. Ĉu oni ne povas per barko bani sin en fluanta rivero? — *Pode-se com um barco ir tomar banho em água corrente?*

11. En tiu okazo, mi petus, ke vi faru al mi tiun servon — *Nesse caso, peço-lhe que me faça esse serviço*
12. La plaĝo Kopakabano estas treege vizitata ĉiusemajne — *A praia de Copacabana é muito concorrida a semana toda*
13. Oni devas trovi tie ĉi la nomaron de ĉiuj fremduloj — *Deve existir aqui a lista de todos os estrangeiros*
14. Vi diras al mi, ke bedaŭrinde, ĝi estas tre malbona — *Você me diz que infelizmente ele é muito ruim*
15. Estu indulga por la aliaj, ĉiu ne posedas vian talion — *Seja indulgente para com os outros, nem todos têm o seu talhe*

16. Tie ĉi estas tre belajn promenejojn — *Aqui há lindos logradouros nos arredores*
17. Unue, superverŝu al mi sitelon da akvo sur la kapon — *Primeiro jogue-me um balde de água na cabeça*
18. Ĉu estas vojiro, kiun mi povas facile fari piede? — *Há um caminho que eu possa facilmente ir a pé?*
19. Ni haltiĝu tie ĉi por vidi tiun tigron manĝante — *Paremos aqui para ver aquele tigre comer*
20. Rigardu tiun simion, kiu estas rompanta kokoson — *Olhe aquele macaco que está quebrando o coco*

21. La rando de via pantalono estas malpura per koto — *A barra da sua calça está suja de lama*
22. La maro estas agitata, vi tenos min tre firme — *O mar está agitado, você vai me segurar com firmeza*
23. Estas tiel malmulte da akvo, ke neeble estas naĝi — *Há tão pouca água que é impossível nadar*
24. Mi deziras fari kun mia fianĉino boatveturado — *Quero dar um passeio de barco com minha noiva*
25. Montru al mi, mi petas, la enspirajn ĉambrojn — *Mostre-me, por favor, a sala de inalação*

26. Ĉu vi havas emon, morgaŭ partopreni ekskurson? — *Você tem vontade de participar de uma excursão amanhã?*
27. Kompreneble! Ĉu piede aŭ per biciklo? — *Naturalmente! A pé ou de bicicleta?*
28. Tion mi lasas al via decido — *Deixo isso por sua conta*
29. Kiun el la du vojoj, vi konsilas al mi preni? — *Qual dos dois caminhos você me aconselha tomar?*
30. Estas pli da virinoj ol viroj sur la strando — *Há mais mulheres do que homens na praia*

31. Ĉu estas necese deponi ilin ĉe la pordistejo? — *É preciso depositá-los na portaria?*
32. Se la maro ne ŝvelas, mi ne bezonas baniston — *Se o mar não está forte, não preciso de banhista*
33. Kiaj belaj floroj kaj kia delikata parfumo! — *Que belas flores e que delicados perfumes!*
34. Ĉu estas necese, ke oni antaŭe enskribiĝu? — *É preciso que se inscreva com antecedência?*
35. Mi tre ŝatas, ke ondo superpasas mian kapon — *Gosto muito da onda passando pela minha cabeça*

36. Ni havas ankaŭ okazon vidi la rabobirdojn — *Temos também ocasião de ver as aves de rapina*
37. Speciala karto laŭ skalo de unu al centmil — *Mapa especial com escala de um por cem mil*
38. Ĉu tie oni povas bani sin, ne sciante naĝi — *Pode-se tomar banho aí sem saber nadar?*
39. Ĉu estas apartaj kabinetoj por la duŝoj? — *Existem cabinas reservadas para duchas?*

40. Ĉu vi havas karton de la ĉirkaŭejo? — *Você tem mapa dos arredores?*
41. Mi dezirus kalsonon kaj grandan viŝtukon — *Queria uma cueca e uma toalha de banho grande*
42. Tiuj simioj faras tiel multe da grimacoj — *Aqueles macacos fazem tantas caretas*
43. Rigardu kiel ili eksaltas! — *Veja como eles pulam!*
44. Kunportu mantelon; estas sufiĉe malvarme — *Traga o casaco; está bastante frio*
45. Do, ĝis poste! Mi volas tuj pretigi ĉion — *Até depois, então! Quero aprontar logo tudo*

46. Kompreneble, oni devas havi ĉaspermeson — *É preciso, naturalmente, ter permissão para caçar*
47. Kie oni trovas la doktoron? — *Onde se acha o médico?*
48. Ni estos kvin pleje kaj ili ok malpleje — *Seremos cinco no máximo e eles oito no mínimo*
49. Mi ne ĉesas admiri ĉion, kion mi vidas —*Não me canso de admirar tudo que vejo*
50. Ĉu estas necese, ke oni estu prezentita? — *É preciso ser apresentado?*

51. La hieno kaj la struto estas aliflanke — *A hiena e o avestruz estão do outro lado*
52. Estu trankvila; iel vi povos alveni — *Esteja tranquilo; você poderá chegar de algum modo*
53. Dek kvin kilometroj ne timigas min — *Quinze quilômetros não me causam medo*
54. Diru al mi, kie troviĝas la banejo? — *Diga-me onde fica o balneário?*
55. Ĉu la duŝejo estas bone aranĝitaj? — *As duchas são bem instaladas?*

56. Tiuj ĉi amikoj ĉiam promenas triope — *Estes três amigos sempre passeiam juntos*
57. Ĉu vi estas preta por la ekskurso? — *Você está pronto para a excursão?*
58. Ĉu estas proksime de tie? —*É perto daqui?*
59. Kiom kostas la enirprezo? —*Quanto custa a entrada?*
60. Ĉu vi pensas, ke tio estas virino? — *Você pensa que isso é uma mulher?*

61. Mi ŝatas vidi la sovaĝajn bestojn — *Gosto de ver os animais selvagens*
62. Ĝis kiu loko mi povas antaŭeniri? — *Até que local posso prosseguir?*
63. Jen estas la simioj kaj bradipoj — *Olhe aqui os macacos e as preguiças*
64. Certe estas koncertoj kaj baloj — *Há certamente concertos e bailes*
65. Malkaŝe, plej volonte mi migras — *Com franqueza, corro mundo com a maior boa vontade*

66. Ĉu mi povas bani sendanĝere? — *Posso banhar-me sem perigo?*
67. Ni foriris laŭ malsamaj direktoj — *Partimos em direções opostas*
68. Kiaj arboj estas tiuj dekstre? — *Que árvores são aquelas à direita?*
69. Ili estas palmarboj kaj eŭkaliptoj — *São palmeiras e eucaliptos*
70. Ju malpli pluvos, des pli bone — *Quanto menos chover, tanto melhor*

71. Kiam ni revenos proksimume? — *Quando vamos retornar aproximadamente?*
72. Ni estos hejme antaŭ malheliĝo — *Estaremos em casa antes do escurecer*
73. Ĝi estas sabla – tre kruta — *É muito arenoso – muito íngreme*
74. Kial vi baras la vojon al mi? — *Por que V. me barra o caminho?*
75. Ni iru prefere vidi la vulpon — *Vamos antes ver a raposa*

76. Sur kiu strando vi banas vin? — *Em qual praia V. toma banho?*
77. Ĉu vi havas kajutojn liberaj? — *Você tem cabinas livres?*
78. Li alvenis, ne avertinte min — *Ele chegou sem me avisar*
79. Polvero falis en mian okulon — *Entrou poeira no meu olho*
80. Vi subakvigos min kapantaŭen — *Você vai me mergulhar com a cabeça para frente*

81. Ni foriru: mi jam estas laca — *Vamo-nos: já estou cansado*
82. Ili sekvis unu post la alia — *Eles seguiram um após o outro*
83. Ĉu oni kunprenos nutraĵojn? — *Vamos levar provisões?*
84. Jes, por la tuta tago — *Sim, para o dia todo*
85. Ial li subite forlasis nin — *Por algum motivo ele nos abandonou repentinamente*

86. Kiam komenciĝas la ĉasado? — *Qual a época de se caçar?*
87. Ni revenos tien ĉi alifoje — *Voltaremos aqui outra vez*
88. Tre volonte — *Com muito gosto*
89. Ĉu vi jam fiksis la celon? — *Você já determinou a meta?*
90. Tion ni ne povas pripensi kune — *Não podemos juntos refletir sobre isso*

91. Estas danĝere fumi tie ĉi — *É perigoso fumar aqui*

92. Ŝi demandis, kien ni iros — *Ela perguntou aonde iremos*
93. Tie ĉi estas tiel silente! — *Aqui está tão silencioso!*
94. Poste ni iros al la parko — *Depois iremos ao parque*
95. La vetero estas nuboplena — *O tempo está carregado*

96. Vi du kaj mi iros triope — *Vocês dois e eu iremos aos três*
97. Mi sentas min malvarmega — *Estou com muito frio*
98. La suno (subiras) leviĝas — *O sol se (põe) levanta*
99. Terure! Vi estas prava! — *Terrível! Você tem razão*
100. La lago estas trankvila — *O lago está sereno*

101. Vi pensas, ke mi eraris — *Você pensa que estou errado*
102. Buso por la kongresanoj — *Ônibus para os congressistas*
103. Kiom oni enuas ĉi tie! — *Como a gente se aborrece aqui!*
104. Mi dezirus bankostumon — *Queria um traje de banho*
105. Ĉu vi estas sportulo? — *Você é desportista?*
106. Mi tre ŝatas birdojn — *Gosto muito de aves*
107. Ni iru vidi la apron — *Vamos ver o javali*
108. La buso haltas en — *O ônibus pára em...*
109. Kiaj odoraj floroj! — *Que flores cheirosas!*
110. Kia terura ventego! — *Que tempestade terrível!*

111. Feliĉan veturadon! — *Seja feliz na excursão!*
112. Ĉu ekzistas fluoj? — *Há correntes?*
113. Jen ili venas tie — *Eis que eles vêm lá*
114. Ne pafu sencele! — *Não atire às cegas!*
115. Vi dronigas lin — *Você o está afogando*

116. Kiam ni ekiros? — *Quando partiremos?*
117. Kiom ĝi kostas? — *Quanto custa?*
118. Rekte antaŭen! — *Para adiante, diretamente!*
119. Estas malvarme — *Faz frio*
120. Mi frosttremas — *Estou tiritando de frio*

121. Kun plezuro! — *Com prazer!*
122. Ĝis revido! — *Até à vista!*
123. Mi misiris — *Errei o caminho*
124. Estas sune — *Faz sol*
125. Rigardu! — *Olhe! Veja*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

botanika ĝardeno — *jardim botânico;* **termika botelo —** *garrafa térmica;* **buŝharmoniko —** *gaita de boca;* **kuiraparato —** *bateria de cozinha;* **dronigi iun —** *afogar alguém;* **belega pejzaĝo —** *paisagem soberba;* **bantaŭga loko —** *local de banho;* **vojmontrilo** [74] **—** *indicador de estrada;* **surĉevaliĝi —** *montar a cavalo;* **dronigi sin** [75] **—** *afogar-se;* **dorsen paŝi —** *recuar;* **bankalsono —** *calção de banho;* **naturparko —** *parque natural;* **ĉe la maro —** *à beira-mar;* **savstacio —** *posto de salvamento;* **forveturi —** *partir (em veículo);* **ŝtatparko —** *parque do estado;* **dorsosako —** *saco de provisão;* **superakvigi —** *alagar, inundar;* **fotografi —** *fotografar;* **belvidejo —** *belvedere;* **mandolino —** *bandolim;* **landvojo —** *estrada principal (do país);* **marbordo —** *beira-mar;* **ekipaĵo —** *equipagem;* **deflankiĝi —** *afastar-se, desviar-se;* **bankostumo —** *roupa de banho;* **sensoifiĝi —** *matar a sede;* **najtingalo —** *rouxinol;* **subakvigi —** *mergulhar, submergir;* **promenejo —** *logradouro, passeio;* **poŝlampo —** *lâmpada de bolso;* **somerdomo —** *casa de campo;* **pansaketo —** *sacola de pão;* **belvedero —** *belvedere;* **akordiono —** *acordeão;* **landkarto —** *mapa;* **ŝnurŝuoj —** *alpercatas de esparto;* **muelejo —** *azenha, moinho;* **malpleje —** *no mínimo;* **sunfrapo** — *insolação;* **olivarbo** — *oliveira;* **leopardo** — *leopardo;* **garbejo** — *granja;* **paliseto** — *estaca;* **migrado** — *excursão, migração;* **strando** — *praia (de banhos);* **trabati** — *abrir (caminho);* **fontano** — *chafariz, fonte;* **kalsono** — *cuecas; calças (senhora);* **bradipo** — *preguiça;* **lanŝuoj** — *escarpim;* **erikejo** — *charneca;* **pejzaĝo** — *paisagem;* **kanario** — *canário;* **fiŝhoko** — *anzol;* **herbejo** — *prado;* **kanapo** — *canapé;* **grimpi** — *trepar;* **ravino** — *ravina;* **frosto** — *frio, geada;* **plonĝi** — *mergulhar;* **struto** — *avestruz;* **papago** — *papagaio;* **refluo** — *baixamar;* **sitelo** — *balde;* **dazipo** — *tatu;* **rivero** — *rio;* **fosto** — *poste;* **lago** — *lago;* **jako** — *paletó (de homem);* **lupo** — *lobo;* **urso** — *urso;* **duno** — *duna;* **ondo** — *onda;* **droni** — *afogar-se;* **pleje** — *no máximo;* **supro** — *cimo, cume;* **rampi** — *rastejar;* **monto** — *montanha;* **vulpo** — *raposa;* **ŝaŭmo** — *espuma;* **liuto** — *alaúde;* **sablo** — *areia;* **kufo** — *touca;* **onidiro** — *boato;* **diraĵo** — *boato;* **montaro** — *cadeia de montanhas;* **luksega** — *aparatoso, pomposo;* **mantelo** — *paletó (de senhora);* **kardelo** — *pintassilgo;* **pikniko** — *piquenique;* **dronado** — *afogamento;* **hirundo** — *andorinha;* **binoklo** — *binóculo;* **ciko-**

[74] ***Vojmontrilo***, *indicador de estrada para orientação do tráfego*
[75] ***Dronigi sin***, *afogar-se voluntariamente.*

nio — *cegonha;* **kompaso** — *bússola;* **kastoro** — *castor;* **alfluo** — *afluxo;* **kolombo** — *pombo;* **pramo** — *balsa, barca (de passagem);* **fotilo** — *máquina fotográfica;* **misiri** — *errar o caminho;* **foriri** — *ir-se embora;* **stango** — *sarrafo, pau;* **kazino** — *cassino;* **bubalo** — *búfalo;* **divano** — *divã;* **gitaro** — *violão;* **pokalo** — *caneca;* **tunelo** — *túnel;* **arbaro** — *mata;* **ponto** — *ponte;* **tendo** — *tenda;* **foko** — *foca;* **plaĝo** — *praia (de banhos);* **vojo** — *estrada, caminho;* **fonto** — *fonte, nascente;* **migri** — *correr terras;* **ĉapo** — *boina, boné;* **marŝi** — *caminhar;* **mato** — *esteira;* **marĉo** — *pântano;* **bieno** — *fazenda;* **kastelo** — *castelo;* **zebro** — *zebra;* **leono** — *leão;* **tigro** — *tigre;* **hieno** — *hiena;* **tajdo** — *maré*

53. Strataj akcidentoj — *Acidentes de rua*

1. Tuj kiam mi atakis la vojkurbon, mi falis kaj tordis al mi la piedon — *Assim que (logo que) fiz a curva, caí e torci o pé*
2. La hundo ĵetis sin sur tiun ĉi infanon kaj mordis ĝin senkompate — *O cão lançou-se sobre esta criança e mordeu-a impiedosamente*
3. Oni forŝtelis mian valizon dum mi eliris el la aerhaveno — *Roubaram-me a valise enquanto eu saía do aero orto*
4. Mi rompis mian brakon, mia piedo deartikiĝis, elartikiĝis — *Quebrei o braço, meu pé desarticulou-se, sofreu luxação*
5. En tiu okazo, kiun ĵurnalon vi konsilas, ke mi elektu? — *Nesse caso, qual o jornal você me aconselha que eu escolha?*

6. Tiu sinjoro ne estas alparolebla, kiu anstataŭas lin? — *Aquele senhor é intransponível, quem o substitui?*
7. Mi ne deziras vidi la mortintojn, sed la postvivantojn — *Não desejo ver os mortos, mas os sobreviventes*
8. Mi deziras vidi ne la postvivantojn, sed la mortintojn — *Desejo ver não os sobreviventes, mas os mortos*
9. Kiu estas la numero de la aŭtomobilo, kiu superkuris vin? — *Qual é o número do automóvel que o atropelou?*
10. Kio signifas tiu homamasiĝo en la fino de la strato? — *Que quer dizer aquele ajuntamento no fim da rua?*

11. Tiu ŝtono, kiu kuŝas laŭlarĝe de la vojo, estas kulpa — *É por causa daquela pedra que estava atravessada no caminho*
12. La ŝoforo estas ebria, certe okazos (al ni) malfeliĉo — *O chofer está bêbedo, ele vai (nos) causar um acidente*
13. Ĉu vi povas prunti naztukon por bandaĝi lian vundon? — *Você pode emprestar um lenço para vendar o ferimento dele?*
14. La kuglo trafis precize en la koron de la policano — *A bala foi diretamente ao coração do policial*
15. Ĉu vi povas diri al mi kie estas la polica oficejo? — *Quer dizer-me onde fica a delegacia de polícia?*

16. Ĉe la vido de la revolvero li resaltis de teruro — *À vista do revólver, ele deu um pulo para trás de terror*
17. Helpate de la najbaroj, li iris al la hospitalo — *Auxiliado pelos vizinhos, ele foi para o hospital*
18. Vi devas enspiri artefaritan, repurigitan aeron — *Você deve aspirar ar artificial e purificado*
19. Mi vidis fluantan sangon el la nazo de tiu homo — *Vi sangue correndo do nariz daquele homem*
20. Falante, mi frapis la kapon kontraŭ la trotuaro — *Caindo, bati com a cabeça na calçada*

21. Ŝoforo, haltu, vi tuj renversigos la veturilon — *Chofer, pare, você vai virar o carro*
22. Montru al mi, mi petas, la polican oficejon — *Indique-me, por favor, a delegacia de polícia*
23. Desaltante, mi elartikigis al mi la piedon — *Saltando fora, tive uma torção no pé*
24. Mi devas fari injekton, narkoti, operacii — *Devo aplicar uma injeção, narcotizar, operar*
25. Neprobablaj aferoj okazas preskaŭ ĉiutage — *As coisas improváveis acontecem quase todos os dias*

26. Mi havas tre gravan deklaron por fari tie — *Tenho uma declaração muito importante para fazer lá*
27. Kio okazis al vi? — *O que lhe aconteceu?*
28. Okazis kolizio al mi. Mi estas tre vundita — *Uma colisão. Estou gravemente ferido*
29. Tion atestis ne unu, sed pluraj personoj — *Testemunharam isso, não uma pessoa, senão várias*
30. Mi deziras paroli kun la polica komisaro — *Desejaria falar com o comissário de polícia*

31. Estus necese, ke oni alvenigu kuraciston — *É preciso mandar vir um médico*
32. Mi tenis lin ĉe la kolo per ambaŭ manoj — *Segurei-o pelo pescoço com ambas as mãos*
33. La vundo sangas, pusas, estas ŝvelinta — *O ferimento perde sangue, está com pus, está tumefato*
34. Mi nepre volas, ke li ricevu riproĉon — *Faço questão que ele tenha uma reprimenda*
35. Ĝi estis grava akcidento sur strato — *Foi um acidente grave na rua*

36. Li estis kondukita al la urĝa hospitalo — *Ele foi levado ao pronto-socorro*
37. Promeninte sur la strato, mi falis — *Caí quando passeava pela rua*
38. De kioma horo ĝi estas malfermita? — *A partir de que hora está aberto?*
39. Mi havas la manradikon subpremita — *Tenho o punho esmagado*
40. Enspiru tion ĉi, ĝi rebonigos vin — *Aspire isto, que você se restabelecerá*

41. Saĝa mi estis, ke mi ne iris tien — *Avisado andei eu, não indo lá*
42. Mi ne komprenas, kiel tio fariĝis — *Não compreendo como isso aconteceu*
43. Homo falinta estas inda je helpo — *Uma pessoa caída é digna de ajuda*
44. Tra kie oni iras al la policejo? — *Por onde se vai ao posto policial?*
45. Iru rekte tra ĉi tie — *Vá direto por aqui*

46. Tio ne havas la saman efikon — *Isso não tem o mesmo efeito!*
47. Mi defrotis al mi la frunton — *Esfolei-me a testa*
48. La aŭtomobiloj interfrapiĝis — *Os automóveis se chocaram*
49. Li kuris laŭ granda rapideco — *Ele correu a grande velocidade*
50. Li estas tre insultema kontraŭ mi — *Ele é muito insolente comigo*

51. Mia revolvero estas ŝargita — *O meu revólver está carregado*
52. Ĉia krimo devas esti punata — *Todo o crime deve ser punido*
53. Ni vidu kion oni povas fari — *Vejamos o que se pode fazer*
54. Li ne plu estas en danĝero — *Ele está fora de perigo*
55. Venigu policano — *Chame um policial*

56. La policano paroligis lin — *O policial fez-lhe falar*
57. Via revolvero malpafis — *O seu revólver falhou*
58. Ŝi ellasis korŝiran krion — *Ela soltou um grito aterrador*
59. Denuncu viajn komplicojn — *Denuncie seus cúmplices*
60. Verdire, vi mortbatus min — *A dizer a verdade, você me mataria de bater*

61. Penu malaperi nevidate — *Procure sair de mansinho*
62. Li havis malfeliĉaĵon — *Ele teve uma desgraça*
63. Ni preskaŭ renversiĝis — *Quase viramos de borco*
64. Doloras al mi la piedo — *Dói-me o pé*
65. Mi ne kuraĝas ekmoviĝi — *Não tenho coragem de mexer-me*

66. Kio okazas al vi? — *O que há com você?*
67. Okazis al mi akcidento — *Sofri um acidente*
68. Ĉu vi fartas bone nun? — *Sente-se melhor agora?*
69. Jes, mi fartas iomete bone — *Sim, sinto-me melhor um pouco*
70. Kaptu lin ĉe la brako — *Pegue-o pelo braço*

71. Mi timas pro lia vivo — *Receio pela vida dele*
72. Ĉu estas nenia risko? — *Não há nenhum risco?*
73. Mi suferis akcidenton — *Sofri um acidente*
74. Oni ne povas forkuri — *Não se pode fugir*
75. La ŝoforo estas vundita — *O chofer está ferido*

76. Ne tordu mian brakon — *Não torça o meu braço*
77. La buŝo estas vundita — *A boca está ferida*
78. La buso puŝpelis lin — *O ônibus atropelou-o*
79. Ni venigu policiston — *Vamos chamar um policial*
80. Li tute sensangiĝas — *Ele está se esvaindo em sangue*

81. Vi senutile parolas — *Você fala inutilmente*
82. Vi parolas sencele — *Você está falando a esmo*
83. Sidiĝu kaj parolu! — *Sente-se e fale!*
84. Mi estas nevundita — *Estou ileso*
85. Neevitebla danĝero — *Perigo inevitável*

86. Li paliĝis de timo — *Ele empalideceu de medo*
87. Vi mortvundis ŝin — *Você a feriu de morte*
88. Ne mi estas kulpa — *Eu é que não tenho culpa*
89. Venigu kuraciston — *Chame um médico*
90. Kia pala vi estas! — *Como você está pálido!*

91. La afero ne urĝas — *Não há pressa*
92. Vi estas tre pala — *Você está muito pálido*
93. Mi estas nevundita — *Não estou ferido*
94. Kie vi loĝas nun? — *Onde você mora agora?*
95. Mi logas ĉe la numero... — *Moro no número...*

96. Ni estas en danĝero — *Estamos em perigo*
97. Estas ia danĝero — *Há um certo perigo*
98. Jen, kio okazis! — *Eis o que aconteceu!*
99. Ĵetu vin teren! — *Lance-se ao chão!*
100. Silentigu lin! — *Faça-o calar-se!*

101. Paroligu ŝin! — *Faça-a falar!*
102. Helpu! Helpu! — *Socorro! Socorro!*
103. Ĝi estas urĝa — *É urgente*
104. Ni iom helpu! — *Vamos dar uma mãozinha!*
105. Elirigu lin! — *Mande-o sair!*

106. Mortigu lin! — *Mate-o!*
107. Okazis nenio — *Nada aconteceu*
108. Venigu lin! — *Mande-o entrar!*
109. Alkuru tuj! — *Acuda logo!*
110. Kio okazis? — *O que aconteceu?*

111. Batu lin! — *Bata nele!*
112. Io okazis — *Algo aconteceu*
113. Tenu min! — *Segure-me!*
114. Parolu! — *Fale!*
115. Pafu! — *Atire! Fogo!*

kunkateni la manojn — *algemar;* **ŝviti per sango —** *suar sangue;* **polica oficejo —** *delegacia de polícia;* **urĝa hospitalo —** *pronto-socorro;* **esti kondukata —** *ser levado;* **senkonsciiĝi —** *perder os sentidos;* **rekonsciiĝi —** *recuperar os sentidos;* **okulvidinto —** *testemunha ocular;* **senti naŭzon —** *sentir vômitos;* **subita morto —** *morte súbita;* **policestro —** *chefe de polícia;* **nepre voli —** *fazer empenho de;* **policisto —***polícia;* **brankardo —** *maca (padiola);* **kaprompilo —** *cassetete;* **senfeligi —** *esfolar, tirar a pele;* **mortobato —** *golpe fatal;* **amput(ad)o —** *amputação;* **ekfrapegi —** *abalroar;* **gangstero —** *gângster;* **policejo —** *posto policial;* **subpremi —** *esmagar, luxar;* **arestejo —** *prisão;* **arestito —** *preso;* **viktimo —** *vítima;* **doloro —** *dor;* **milico —** *milícia;* **ŝerifo —** *xerife;* **polico —** *polícia;* **dekroĉi —** *desenganchar, soltar;* **alkroĉi —** *enganchar, prender;* **puŝpeli —** *atropelar;* **defronti —** *esfolar;* **dolori —** *doer;* **froti —** *esfregar, friccionar;* **nepre —** *sem falta;* **sveno —** *desmaio;* **sveni —** *desmaiar*

54. **ĈIUTAGAJ FRAZOJ** — *FRASES DE USO DIÁRIO*

1. Adamo estis nomo donita al mia filo — *Adão foi o nome dado ao meu filho*
2. Kies estas ĉi tiu rondpinta plumo? — *De quem é esta caneta esferográfica?*
3. Mia amiko, same kiel mi, pensas, ke... — *Meu amigo como eu pensamos que...*
4. Akrigu la tranĉilon sur la ŝtono — *Amole a faca na pedra*
5. Mia fianĉino staras ĉe la fenestro — *A minha noiva está à janela*

6. Oni devas respekti la pliaĝulojn — *Deve-se respeitar os mais velhos*
7. Mi ankoraŭ ne havas kvardek jarojn — *Ainda não tenho quarenta anos*
8. En la daŭro de kelke da semajnoj — *No decurso de algumas semanas*
9. Ĉu hodiaŭ estas lundo aŭ ĵaŭdo? — *Hoje é segunda ou quinta?*
10. Bela pravigo por igi min atendi — *Bela razão para fazer-me esperar*

11. Mi faris tion konsultinte neniun — *Fiz isso de minha cabeça*
12. Kien ajn mi iras, ŝi sekvas min — *Aonde quer que eu vá, ela me segue*
13. Ĉu vi havas ĉe vi iom da mono? — *Você tem algum dinheiro com você?*
14. Bedaŭrinde mi havas neniom — *Infelizmente não tenho nenhum*
15. Mi vidis belan junan fraŭlinon — *Vi uma moça bela e jovem*

16. Ne sinjoro, hodiaŭ estas mardo — *Não senhor, hoje é terça-feira*
17. Mi diros al vi poste la kaŭzon — *Dir-lhe-ei depois o porquê*
18. Formetu ĝis la grekaj kalendoj — *Deixe para as calendas gregas*
19. Ĉu hodiaŭ estas dimanĉo? — *Hoje é domingo?*
20. Nepre mi devos morti iun tagon — *Com certeza terei de morrer um dia*

21. Sendube, iu kompatinda diablo! — *Sem dúvida, algum pobre diabo!*
22. La zorgato havas zorgantinon — *O tutelado tem uma tutora*
23. Estas necese, ke ni iru tien — *É necessário irmos lá*
24. Li nepre devos foriri baldaŭ — *Ele deverá ir-se cedo sem falta*
25. Estas necese, ke ĉiu aŭskultu — *É necessário que todos ouçam*
26. Ni devis labori en tiu afero — *Devia-se trabalhar nesse assunto*
27. Mi parolis al la koncernato — *Falei ao interessado*
28. Supozeble ŝi ne admiras vin — *Presumivelmente ela não o admira*
29. Ne volis servi la meson — *Eles não quiseram ajudar à missa*

30. Ju pli malbone, des pli bone — *Quanto pior, tanto melhor*

31. Estas necese diri la veron — *É necessário dizer a verdade*
32. Li estas en sia aŭtomobilo — *Ele está no seu automóvel*
33. Ĉu ne temas pri aminklino? — *Não se trata de amores?*
34. Ĝuste temas pri aminklino — *Trata-se justamente de amores*
35. La muŝo pasis tra la truo — *A mosca passou pelo buraco*

36. Mi volas helpi vin labori — *Quero ajudá-lo a trabalhar*
37. Ŝi estas svelta kaj alta — *Ela é esbelta e alta*
38. Freneza ideo venis al mi — *Veio-me uma idéia louca*
39. Mi tiom ŝin amas, kiom vi — *Eu a amo tanto quanto você*
40. Jen rapide, jen malrapide — *Ora depressa, ora devagar*

41. Li devas esti tre maljuna — *Ele deve ser muito velho*
42. Li ne estas plu la sama — *Ele não é mais o mesmo*
43. Mi vetas por mia ĉevalo — *Aposto em meu cavalo*
44. Nek mi nek li estis tie — *Nem eu nem ele estivemos lá*
45. Kion pensas vi pri tio? — *O que você pensa disso?*

46. Laŭ la volo de l' fatalo — *Ao deus-dará*
47. La jaro finiĝos morgaŭ — *O ano terminará amanhã*
48. Estas utile (veni) iri — *É útil (vir) ir*
49. Hieraŭ estis la dudeka — *Ontem foram vinte*
50. Ŝi mirege rigardas min — *Ela me olha com espanto*

51. Ŝi estas spiritistino — *Ela é espírita*
52. Alvenu antaŭ la kvina — *Venha antes das cinco*
53. Mi finis mian laboron — *Acabei o meu trabalho*
54. La por kaj la kontraŭ — *Os prós e os contras*
55. Ankoraŭ kelkaj vortoj — *Ainda algumas palavras*

56. Kiel eble plej baldaŭ — *O mais breve possível*
fuŝi ĉion — *estragar tudo*
plenblovi — *encher (soprando)*
plikarigi — *altear, aumentar (preço)*

marĉandi — *regatear, baratear*
malŝtopi — *abrir, destampar (garrafa)*
formanĝi — *devorar*
eltrinki — *esvaziar (bebendo)*
prezenti — *oferecer*

acidigi — *azedar*
digesti — *fazer a digestão*
enverŝi — *encher, despejar (líquidos)*
plivoli — *preferir*
preferi — *escolher, preferir*

intenci — *pretender*
fumaĵi — *defumar*
infuzi — *pôr de infusão*
marini — *pôr de conserva*
opinii — *achar, pensar*

elpagi — *liquidar*
drinki — *tomar, beber (em excesso)*
kirli — *bater (ovos, nata, etc.)*
brezi — *assar nas brasas*
lardi — *rechear com toucinho*

pekli — *pôr em salmoura*
manĝi — *comer*
ŝtopi — *arrolhar, tapar*
kirli — *bater (ovos)*

rajti — *ter o direito de*

farĉi — *rechear (cul.)*
fasti — *jejuar*
trufi — *rechear com tripas*
preni — *tomar, beber (água, etc.)*
lunĉi — *lanchar*

stufi — *estufar, guisar*
friti — *fritar*
trovi — *achar*
korki — *arrolhar*
servi — *prestar serviço*
fuŝi — *estragar, emporcalhar*
sati — *estar satisfeito*

soifi — *ter sede*
odori — *cheirar, exalar cheiro*
honti — *vexar-se*
flari — *cheirar, tomar o cheiro*
ŝmaci — *comer fazendo ruído*

rosti — *assar, torrar*
helpi — *ajudar, auxiliar*
boli — *ferver*
ŝimi — *mofar*
baki — *assar (no forno)*
fati — *gostar de, apreciar*
tiri — *puxar, tirar*

Obs.: **Pagi por la fremda festeno**, pagar o pato, é um idiotismo em esperanto. Para restaurante, temos ainda: **unuaranga restoracio**, restaurante de primeira classe; **duaranga restoracio**, restaurante de segunda classe; **subĉiela restoracio**, restaurante ao ar livre; **lunĉa restoracio**, restaurante de lanche. **Fraŭlino** é uma palavra mais delicada do que "**kelnerino**" para traduzir a palavra "Garçomette", Garçomete, moça que trabalha servindo os fregueses em restaurante.

66. EN LA MANĜOĈAMBRO — *NO REFEITÓRIO*

1. Kelnero, kion vi havas por manĝi hodiaŭ? Kie estas la manĝo-karto? — *Garçom, o que você tem para se comer hoje? Onde está o cardápio?*
2. Mi deziras unue supon kaj poste kokinon en sangosaŭco kun rizo — *Desejo, primeiramente, sopa e depois galinha ao molho pardo com arroz*
3. Mi bedaŭras, sinjoro, sed ni ne havas kokinon en sangosaŭco hodiaŭ — *Sinto muito, senhor, mas não temos galinha ao molho pardo hoje*
4. Sur la tablo estas iom da pano, da fromaĝo kaj kelke da fruktoj — *Na mesa há um pouco de pão, queijo e algumas frutas*
5. Se vi volas, mi venos serĉi vin por vespermanĝi — *Se você quer, virei buscá-lo para jantar*

6. Kiel vi nomas tiun trinkaĵon, kiun oni eltrinkas per pajla sorbilo? — *Como você chama essa bebida que se toma com um canudinho?*
7. Mi tre malbone vespermanĝis kaj mi tre volonte noktomanĝus — *Jantei muito mal e de bom grado comeria à noite*
8. Kiom kostas la vespermanĝo? Ĉu la vino estas enkalkulita? — *Quanto custa o jantar? O vinho está incluído?*
9. Mi hontas, sinjorino, ke mi estas devigata tiel ĝeni vin — *Estou acanhado, senhora, de ser obrigado a molestá-la assim*
10. Pecon de ŝinko – porkaĵo – mortadelo – kolbaso – fromaĝo — *Um pedaço de presunto – carne de porco – mortadela – salsicha – queijo*

11. La teo estas tro forta (nigra), donu al mi varman akvon — *O chá está demasiado forte (preto), dê-me água quente*
12. Mi forgesis demandi al vi pri la prezo de la vespermanĝo — *Esqueci-me de perguntar-lhe o preço do jantar*
13. Tiam donu al mi kafon kun lakto; alportu ankaŭ sukeron — *Então dê-me café com leite; traga-me açúcar também*
14. Ĉu vi ne havas freŝan panon anstataŭ tiuj ĉi bulketoj? — *Você não tem pão fresco em vez destes pãezinhos?*
15. Ĉu vi deziras frititajn terpomojn kaj rizon kun fiŝo? — *Você quer batatinhas fritas e arroz com peixe?*

16. Ĉu mi povas proponi al vi flugilon de tiu ĉi kokidaĵo? — *Posso oferecer-lhe uma asa deste frango?*
17. Donu al mi tranĉaĵon da... apenaŭ kuirita – tre kuirita — *Dê-me um naco de... mal passado – bem passado*
18. Mi tre facile kutimas je la nutraĵo de tiu ĉi lando — *Acostumo-me com muita facilidade com a alimentação deste país*
19. Ĉu vi havas ĉiam multajn personojn ĉe via komuna tablo? — *Você tem sempre muitas pessoas à mesa?*
20. Metu aparte tiun ĉi botelon, vi redonos ĝin al mi morgaŭ — *Separe esta garrafa, amanhã você me dará novamente*

21. Ni manĝis el la bananoj, kiujn via amiko sendis al vi — *Comemos das bananas que o seu amigo lhe mandou*
22. Dufoje la vespermanĝo estis alportita en mian ĉambron — *Duas vezes o jantar foi levado ao meu quarto*
23. Tiuj fruktoj ne estas tiel bongustaj, kiel ili ŝajnas — *Essas frutas não são tão saborosas como parecem*
24. Ĉu vi ankaŭ trinkas vinon? — *Você também toma vinho?*
25. Ne, sinjoro, mi trinkas nek vinon, nek bieron, nur lakton — *Não, senhor, não tomo vinho nem cerveja, tomo apenas leite*

26. La manĝilaro estas beleta kaj la tablo bone ornamita — *O serviço de mesa está bonito e a mesa bem ornamentada*
27. Jes, sinjoro, sed la ĉokolado ne estas ankoraŭ preta — *Sim, senhor, mas o chocolate não está pronto ainda*
28. Mi sonorigos por scii ĉu la tagmanĝo estas servita — *Tocarei a campainha para saber se o almoço está servido*
29. Metu varman kruĉon antaŭ la loko de la fraŭlino — *Ponha uma vasilha de água quente junto da senhorinha...*
30. La salato enhavas tro da vinagro, donu al mi la oleon — *A salada está cheia de vinagre, dê-me o óleo*

31. Se vi nenion alian havas, ni do kontentiĝos per tio — *Se você não tem outra coisa, nós nos contentaremos com isso*
32. Ĉu vi volas permesi (al mi), ke mi proponu al vi... ? — *Permita-me que lhe ofereça... ?*
33. Se vi ĝin permesas, ni dividos tiun sandviĉon inter ni — *Se você o permite, dividiremos esse sanduíche para nós*

34. Mi deziras noktomanĝi, kion vi povas doni al mi? — *Desejo cear, o que você tem para me oferecer?*
35. Ĉu mi demandis vin pri la prezo de la noktomanĝo? — *Perguntei-lhe o preço da ceia?*

36. Kion vi havas por doni al ni ĉe la vespermanĝo? — *O que você tem para nos dar no jantar?*
37. Kelnero, donu al mi kokidaĵon en pecoj – porkaĵon kun brasikoj — *Garção, sirva-me o fricassê de frango – carne de porco com couve*
38. Tio ĉi estas vino, tiuokaze alportu al mi bieron — *Isto é vinho, nesse caso traga-me cerveja*
39. Kelnero, alportu frititajn terpomojn kaj saŭcon — *Garção, traga batatinhas fritas e molho*
40. Kiam oni (vespermanĝas, noktomanĝas) tagmanĝas? — *Quando se (janta, ceia) almoça?*

41. Ĉu mi devos antaŭsciigi, kiam mi vespermanĝos? — *Devo avisar com antecedência quando vou jantar?*
42. Mi tre ŝatas frititan kokidon kun pizoj — *Gosto muito de frango frito com ervilhas*
43. Ĉu vi preferas tiun ĉi pecon da blanka viando? — *Você prefere este pedaço de carne branca?*
44. Tiu viando estas bongusta – estas tre malmola — *Essa carne está saborosa – está muito dura*
45. Tiu supo estas tre bongusta – tre malbongusta — *Essa sopa está excelente – detestável*

46. Necese estas, ke la kokido estu tute elartikigitaj — *É necessário que o frango esteja totalmente cortado em pedaços*
47. Kutime mi tagmanĝas je la dek unua kaj duono — *Almoço habitualmente às onze e meia*
48. Ĉu vi deziras, ke mi prezentu al vi olivojn? — *Deseja que lhe ofereça azeitonas?*
49. Kelnerino, alportu porcion da tomato kun ovoj — *Garçomete, traga uma porção de tomates com ovos*
50. Pasigu al mi la mustardon – la hispanan pipron — *Passe-me a mustarda – o pimentão*

51. Bonan tagon! Per kio mi povas servi vin? — *Bom dia! Em que lhe posso servir?*
52. Ĉu oni hieraŭ mendis ĉokoladon por mi? — *Alguém pediu chocolate para mim ontem?*
53. Tiu fiŝo estas tre bona – ne estas freŝa — *Esse peixe está muito bom – não está fresco*
54. Vi metos la manĝilaron sur tiun ĉi tablon — *Você vai pôr os talheres nesta mesa*
55. Tiu ovo ne estas freŝa, donu al mi alian — *Esse ovo não está fresco, dê-me outro*

56. Granda laceco forprenas de mi la apetiton — *Grande fadiga tirou-me o apetite*

57. Mi tute ne manĝis buteron. Dekalkulu ĝin — *Não toquei na manteiga. Não inclua na conta*
58. Vi vidas inter la almanĝoj ion, kion mi ne konas — *Vejo no "hors-d'ouevre" alguma coisa que não conheço*
59. Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo — *Sorvete é uma guloseima doce gelada*
60. Ni iru en la manĝoĉambron kaj ni sidiĝu — *Vamos para a sala de jantar e sentemo-nos*

61. Mi dezirus ion manĝi antaŭ la tagmanĝo — *Gostaria de comer algo antes do almoço*
62. Miaj gefiloj kaj edzino estas malsataj — *Meus filhos e mulher estão com fome*
63. La servado estas tre malrapide farata — *O serviço é feito com muita lentidão*
64. Vi antaŭsciigos min, tuj kiam la tagmanĝo estos preta — *Você me anunciará assim que o almoço estiver pronto*
65. Je kioma horo oni servas la tagmanĝon? — *A que horas serve-se o almoço?*

66. Pasigu al mi la saŭcon de fiŝo — *Passe-me o molho de peixe*
67. Alportu al mi bifstekon kun terpomoj — *Traga-me um bife com batatinhas*
68. Sur la unua etaĝo meze de l' koridoro — *No primeiro andar no meio do corredor*
69. Ĉu vi povas servi nin en nia ĉambro? — *Poderia nos servir em nosso quarto?*
70. Sur la tablo kuŝas diversaj sukeraĵoj — *Há diversos doces na mesa*

71. Pasigu al mi la oleon – la vinagron — *Passe-me o azeite – o vinagre*
72. Ŝi ŝatas nur vinberojn kaj oranĝojn — *Ela só gosta de uvas e laranjas*
73. La biero de Germanio estas bonega — *A cerveja da Alemanha é excelente*
74. Alportu al mi ankaŭ la manĝokarton — *Traga-me também o cardápio*
75. La servado estas tro rapide farata — *O serviço é feito com presteza*

76. Vi rezervos al mi du sidlokojn — *Você me reservará dois lugares*
77. Mi deziras iom da rizo kun kokino — *Quero um pouco de arroz com galinha*
78. Mi deziras iom da viando kaj rizo — *Quero um pouco de carne e arroz*
79. Donu al mi cepojn kun pipra saŭco — *Dê-me cebolas com molho de pimenta*
80. Metu viajn objektojn sur la tablon — *Ponha os seus objetos na mesa*

81. Mi estas malsata kaj soifa ankaŭ — *Estou com fome e sede também*
82. Mi multe ŝatas la anglan bieron — *Gosto muito de cerveja inglesa*
83. Mi ne demandis vin pri la prezo — *Não lhe perguntei o preço*
84. Ĉu vi havas porkidajn kotletojn? — *Você tem costeletas de leitão?*
85. Je kioma horo oni vespermanĝas? — *Qual é a hora do jantar?*

86. Mi petus ankoraŭ iom da rostaĵo — *Pediria ainda um pouco do assado*
87. Mi iras al la tablo kaj sidiĝas — *Vou à mesa e me assento*
88. Pasigu al mi la salon – la cepon — *Passe-me o sal – a cebola*
89. Ĝi estas la horo de la tagmanĝo — *Está na hora do almoço*
90. Mi eĉ manĝas pli apetite — *Estou mesmo comendo com mais apetite*

91. Donu al mi glaciitan oranĝaĵon — *Dê-me uma laranjada gelada*
92. Ni trinku je via sano. Saluton! — *Bebamos à sua saúde. Salve!*
93. Mi manĝis nur duone la viandon — *Comi apenas a metade da carne*
94. Kie vi sidigos min ĉe la tablo? — *Em que lado da mesa você vai me sentar?*
95. Mi manĝas varman viandon — *Eu como carne quente*

96. Ne tro multe da supo, mi petas! — *Não muita sopa, por favor!*
97. Vi ankaŭ deziras manĝi kun mi — *V. também quer comer comigo*
98. Ĉu baldaŭ alvenos via amikino? — *A sua amiga virá logo?*
99. Ĉu baldaŭ venos la deserto? — *A sobremesa virá logo?*
100. Mi nur trinkis duonan botelon — *Tomei apenas meia garrafa*

101. Ĉu vi ŝatas fiŝon aŭ kokidon? — *V. gosta de peixe ou de frango?*
102. Mi ŝatas fiŝon kaj kokidon — *Gosto de peixe e de frango*
103. Mi preferas ovaĵon kun lardo — *Prefiro omelete com toucinho*
104. Mi manĝas je la sepa vespere — *Como às sete horas da tarde*
105. Ĉu oni pagas aparte la vinon? — *Paga-se o vinho a parte?*
106. Kiom vi kalkulas la botelon? — *Por quanto V. inclui a garrafa?*
107. Ĉu estas eble trinki bieron? — *Pode-se beber cerveja?*
108. Pli grandan kuleron, mi petas! — *Uma colher maior, por favor!*
109. Ni sidas tre premita tie ĉi — *Estamos muito apertados aqui*
110. Ĉu vi ankoraŭ manĝis nenion? — *Você ainda não comeu nada?*

111. Mi manĝas apenaŭ dufoje tage — *Só como duas vezes por dia*
112. Vi estas tre malsata, ĉu ne? — *Você está com fome, não?*
113. Metu glacion en mian glason — *Ponha gelo no meu copo*
114. Mi estas malsata kaj soifa — *Estou com fome e sede*
115. La rostaĵo havas brulguston — *O assado está com gosto de chamuscado*

116. Tiuj fruktoj estas belegaj — *Essas frutas estão excelentes*
117. Oni manĝas antaŭ la tagmezo — *Come-se antes do meio-dia*
118. Kie estas la manĝoĉambro? — *Onde fica a sala de jantar?*
119. Mi havas multan apetiton — *Estou com muito apetite*
120. Jen la manĝokarto, sinjoro! — *Olhe aqui o cardápio, senhor!*

121. Kie estas la manĝosalono? — *Onde fica o salão de jantar?*
122. Tie dekstre — *Ali à direita*
123. La oranĝo estas iom acida — *A laranja está um pouco ácida*
124. Vi manĝis preskaŭ nenion — *Você não comeu quase nada*
125. Vi eraris en la sumigado — *Você errou na soma*

126. Kiajn legomojn vi havas? — *Que legumes você tem?*
127. Kelnero, la manĝokarton! — *Garçom, o cardápio!*
128. Kiu sidas ĉe la tablo? — *Quem está assentado à mesa?*
129. Mi preferas konfitaĵon — *Prefiro confeitos*
130. Mi deziras freŝan panon — *Quero pão fresco*

131. Kian deserton vi havas? — *Que sobremesa você tem?*

132. Tiu ĉi odoras tro forte — *Isto cheira demasiado forte*
133. Nur iomete por gustumi — *Apenas um pouquinho para provar*
134. Sed tio estas vere tro malmulta! — *Mas isso é realmente muito pouco!*
135. Mi trinkas per la glaso — *Bebo no copo*

136. Mi deziras iom da fiŝo — *Quero um pouco de peixe*
137. Bonvolu servi vin mem! — *Queira servir-se!*
138. Ni eniru en la ĉambron! — *Entremos na sala!*
139. Tagmanĝu kun mi hodiaŭ — *Almoce comigo hoje*
140. Ĉu vi ŝatas farunaĵon? — *Você gosta de farofa?*

141. Biero Brahma ebriigas min — *A cerveja Brahma me embriaga*
142. Iom da pano, mi petas! — *Um pouco de pão, por favor!*
143. Alportu al mi brandon — *Traga-me cachaça*
144. Ĉu vi estas malsata? — *Você está com fome?*
145. Jes, iomete! — *Sim, um pouquinho!*

146. Mi volas kokinon en sangosaŭco — *Quero galinha ao molho pardo*
147. Mi estas ankaŭ soifa — *Estou também com sede*
148. Mi deziras manĝi ion — *Quero comer alguma coisa*
149. Donu al mi tranĉilon — *Dê-me uma faca*
150. Donu al mi terpomojn — *Dê-me batatinhas*

151. Mi mortas pro malsato — *Estou morto de fome*
152. Ŝi sidas ĉe la tablo — *Ela está sentada à mesa*
153. Atendu min ekstere! — *Espere-me lá fora!*
154. Mi akceptas plezure — *Aceito com prazer*
155. Ne faligu la ovojn! — *Não deixe os ovos caírem!*

156. Pri kio vi parolas? — *Sobre o que você está falando?*
157. Pri la hieraŭa tagmanĝo — *A respeito do almoço de ontem*
158. Vi malsatas, ĉu ne? — *Você tem fome, não é?*
159. Bonan apetiton! — *Bom apetite!*
160. Dankon, same! — *Obrigado, igualmente!*

161. Ĉu vi jam finis? — *Você já terminou?*
162. Ankoraŭ ne — *Ainda não*
163. Mi ĵus manĝis — *Comi neste instante*
164. Kaj kial ne? — *E por que não?*
165. Je via sano! — *À sua saúde!*

166. Mankas neniu — *Não falta ninguém*
167. Mankas nenio — *Não falta nada*
168. Estas nenio — *Não há nada*
169. Mi dankas vin! — *Agradeço-lhe!*
170. Nedankinde! — *Não há de quê!*

67. Tagmanĝo, vespermanĝo — *Almoço Jantar*

1. Vi preferas bovan viandon, mi, kontraŭe, preferas porkan viandon [83] — *Você prefere carne de vaca, eu, pelo contrário, prefiro a de porco*
2. Mi elektas kokinon en sangosaŭco, ĉar mi manĝis kuiritan gadon hieraŭ — *Escolho galinha ao molho pardo, porque comi bacalhau cozido ontem*
3. Mi deziras freŝan panon – malfreŝan – pli bakitan – malpli bakitan — *Gostaria de pão fresco – seco – mais torrado – menos torrado*
4. Mi estus tre feliĉa se cirkonstanco donus al mi okazon vin akcepti — *Ficaria contentíssimo se houver uma chance de recebê-lo em minha casa*
5. Forportu ilin kaj alportu al ni ĉajoton kun muelita viando — *Leve-os e sirva-nos chuchu com carne moída*

6. Nu, alportu al ni panon, unu porcion da rostita porkaĵo kun ĉajoto — *Pois bem, traga-nos pão, uma porção de carne de porco assada com chuchu*
7. Vi estas tro delikata, kiam oni vojaĝas, oni devas kutimi je ĉio — *V. é muito delicado, em viagem é preciso se acostumar a tudo*
8. Tiu ĉi vino ne estas malbongusta; oni povas trinki plurajn glasojn — *Este vinho não está ruim; pode-se tomar muitos copos*
9. Mi vere hontas je via apetito, vidante vin manĝi tiel malmulte — *Envergonho-me do seu apetite, vendo-o comer tão pouco*
10. Se la kuiristo estus salinta ilin iom pli, ili estus perfektaj — *Se o cozinheiro tivesse salgado um pouco mais, estariam perfeitos*

11. Se la manĝaĵo ne estis bongusta, kompense ĝi ne estas tre kara — *Se a comida não estava boa, em compensação, não é muito cara*
12. Plie vi preparos al ni ovaĵon – kun lardo – kun ŝinko – kun fungoj — *Além disso você vai nos preparar uma omeleta com toucinho – com presunto – com cogumelo*
13. Vi promesis akcepti min senceremonie, kaj vi ĝin neniel faros — *Você prometeu receber-me com simplicidade, mas não está procedendo como tal*
14. Mi ekprofitos la belan veteran por fari piede kelkajn iradojn — *Vou aproveitar o bom tempo para dar um passeio a pé*
15. Kelnero! Jen falis forko sub la tablon. Bonvolu alporti alian — *Garçom! Caiu um garfo debaixo da mesa. Queira trazer um outro*

16. Ĝi estas nur sufiĉe miksita; rigardu ĉu ĝi estas laŭ via gusto — *Está agora bem misturado; veja se está a seu gosto*
17. Se vi ŝatas viandon, prenu, mi petas, peceton de porka viando — *Se você gosta de carne, sirva-se, por favor, de um pedaço de carne de porco*
18. Ĉu mi povas proponi al vi bifstekon kun fritiitaj terpomoj? — *Posso oferecer-lhe um bife com batatinhas fritas?*
19. La kelnero forgesis meti glasojn por la biero sur la tablon — *O Garçom se esqueceu de pôr os copos para cerveja na mesa*
20. Bonvolu akcepti ĉiujn miajn dankojn pro via afabla gastemeco — *Queira aceitar meus eternos agradecimentos pela sua graciosa hospitalidade*

21. Jen estas la listo de la manĝaĵoj, kiujn vi alportos al ni — *Olhe aqui a lista do que você vai nos servir*
22. Mi esperas, ke vi estos egale kontentigita de la deserto — *Espero que você ficará igualmente satisfeito com a sobremesa*
23. Kion vi deziras manĝi, kara kliento? — *O que você deseja comer caro freguês?*
24. Mi deziras manĝi bifstekon, frititajn terpomojn kaj rizon — *Desejo comer um bife, batatinhas fritas e arroz*
25. Ni havas bongustan fromaĝon kaj ĉiajn specojn de fruktoj — *Temos excelente queijo e toda a espécie de frutas*

26. Decidite, mi manĝos nek porkan viandon nek bovan— *Decididamente, não comerei carne de porco nem de vaca*
27. Kiel oni nomas tiun ĉi kukon? Mi neniam manĝis similan — *Que nome se dá a este bolo? Nunca comi (bolo) semelhante*
28. Vi multe zorgas pri viaj gastoj, sed neniel pri vi mem — *Você se ocupa muito de seus convivas, mas se esquece de você mesmo*
29. Kelnero, servu al ni rapide, ĉar ni mortas de malsato — *Garçom, sirva-nos depressa, por que estamos morrendo de fome*
30. En tiu okazo prenu floran brasikon aŭ alian legomon — *Nesse caso sirva-se de couve-flor ou de outro legume*

[83] *Prefiro as formas:* **bova** *viando,* **porka** *viando, kokida viando, ŝafida* **viando**, *etc., em vez de:* **bovaĵo, porkaĵo, kokidaĵo, ŝafidaĵo**, *etc.*

31. Kutime mi ne (tagmanĝas) vespermanĝas tiel (mal)frue — *Habitualmente não (almoço) janto tão (tarde) cedo*
32. Alportu al mi dentlignetujon, cindrujon kaj ĵurnalojn — *Traga-me um paliteiro, cinzeiro e jornais*
33. Alportu al mi grandan tranĉilon – malgrandan kuleron — *Traga-me uma faca grande – uma colher pequena*
34. Tiu ĉi sinjoro manĝos kun mi. Tre bone. Mi metos tuj alian manĝilaron — *Este senhor vai almoçar comigo. Muito bem. Vou por outro talher*
35. Mi iom purigos min kaj poste ni iros en la manĝejon — *Vou limpar-me um pouco e depois iremos para o refeitório*

36. Diru al mi kion ci manĝas kaj mi diros al ci kiu ci estas — *Dize-me o que comes que dir-te-ei quem és*
37. Kvankam ĝi estas bongustega, mi ne povas pli manĝi — *Embora ele esteja delicioso, não posso comer mais*
38. Kelnero, bonvolu ŝanĝi la tablotukon, ĉar tiu ĉi ne estas tre pura — *Garçom, queira trocar a toalha de mesa, porque esta não está muito limpa*
39. Fine, jen estas la bifstekoj kaj frititaj terpomoj — *Finalmente, eis os bifes e as batatinhas fritas*
40. Ili ŝajnas laŭ ĝusta grado frititaj — *Parecem que estão fritas ao ponto*

41. Tiu ĉi pano estas malmola, ĝi certe ne estas freŝa — *Este pão está duro, com certeza não é fresco*
42. Donu al mi alian, mi ne ŝatas malfreŝan panon — *Dê-me outro, não gosto de pão duro*
43. Kion vi preferas trinki? — *O que você prefere beber?*
44. Mi preferas bieron kaj mi ankaŭ deziras manĝi ion — *Prefiro cerveja e também desejo comer alguma coisa*
45. Se vi ŝatas salaton kun tomatoj, prenu, mi petas — *Se você gosta de salada com tomates, sirva-se, por favor*

46. Permesu, ke mi trinku je la sano de la fraŭlino — *Permita-me beber à saúde da senhorinha*
47. Pasigu al mi la saŭcon, mi petas. Mi ne povas pli atendi — *Passe-me o molho, por favor. Não posso mais esperar*
48. Mi proponas verdajn fazeolojn kun frititaj ovoj — *Proponho feijão verde com ovos fritos*
49. Tre bone, mi ŝatas ilin multe — *Muito bem, gosto muito deles*
50. Mi povas trinki almenaŭ dudek glasojn da biero — *Posso beber pelo menos vinte copos de cerveja*

51. Mi preferas je fiksita prezo – laŭ la karto — *Prefiro ao preço fixo – à la carte*
52. Glaseto da vino post la supo neniam faras malbonon — *Um cálice de vinho depois da sopa nunca faz mal*
53. Tiu ĉi viando estas tiel sengusta kiel eble — *Esta carne está o quanto possível insípida*
54. Permesu, ke mi enverŝu glason da biero al vi — *Permita que lhe encha o copo de cerveja*
55. Tiu fiŝo ne estas sufiĉe freŝa, reprenu ĝin — *Esse peixe não está bem fresco, leve-o de volta*

56. Ni gustumu la fromaĝon, kiel oni nomas ĝin? — *Vamos experimentar o queijo, qual é o nome dele?*
57. Oni devas manĝi por vivi kaj ne vivi por manĝi — *Deve-se comer para viver e não viver para comer*
58. Jen estas ceposaŭco kun tomatoj kaj vinagro — *Olhe aqui o molho de cebolas com tomates e vinagre*
59. Ĉu vi havas tagmanĝon je fiksita prezo? — *Você tem almoço (tabelado) ao preço fixo?*
60. Donu al mi pli bone kokidon en sangosaŭco — *Dê-me antes frango ao molho pardo*

61. Bonvolu senkulpigi min, mi iom malfruiĝis — *Queira me desculpar, estou um pouco atrasado*
62. Je kia horo mi povos tagmanĝi tie ĉi? — *Desde que hora poderei almoçar aqui?*
63. De la dekdua ĝis la tria kaj duono vespere — *Do meio-dia até às três e meia da tarde*
64. Mi pli ŝatas salaton kun oleo kaj vinagro — *Aprecio mais a salada com azeite e vinagre*
65. Per Dio! La ŝinko estas terure malfreŝa! — *Irra! o presunto está terrivelmente (rançoso) passado!*

66. La kelnero metis la manĝilaron antaŭ mi — *O Garçom pôs os talheres à minha frente*
67. Efektive mi estas jam plenŝtopita — *Realmente já estou empanturrado*
68. Tiu ĉi rostaĵo estas ĝustagrade kuirita — *Este assado está feito a propósito*
69. Se vi volas supon, vi manĝos ĝin poste — *Se você quiser sopa, poderá tomá-la depois*
70. Jen estas kokido kaj terpomoj rostitaj — *Aqui estão frango e batatinhas fritas*

71. Bonvolu doni al mi la salon kaj pipron — *Queira passar-me o sal e a pimenta*
72. Mi donis al li du dolarojn — *Dei-lhe dois dólares*
73. Ĉu vi povas doni ion al ni por manĝi? — *Você pode nos dar algo para comer?*
74. Kiom da trinkmono vi donis al la kelnero? — *Quanto você deu de gorjeta ao garção?*

75. Ŝanĝu la forkojn kaj donu al mi panon — *Mude os garfos e me dê pão*

76. Alportu al ni la deserton – la kafon — *Traga-nos a sobremesa – o café*
77. Vi posedas kelon tre bone provizitan — *Você tem uma adega bem abastecida*
78. Nu, ni legu la karton de l' manĝaĵoj — *Bem, vamos ver o cardápio*
79. Donu al mi tiom da akvo kiom da vino — *Dê-me tanta água quanto vinho*
80. Diru al mi kion oni skribis pri fiŝoj — *Diga-me o que há de peixes*

81. La forko kaj tranĉilo estas dekstre — *O garfo e a faca estão à sua direita*
82. Prenu pli bone pecon de fromaĝo — *Como antes um pedaço de queijo*
83. Mi ŝatas leviĝi de la tablo malsate — *Gosto de sair da mesa com vontade de comer*
84. Iom da salato estas necesega, ĉu ne? — *Um pouco de salada é indispensável, não acha?*
85. Tiu ĉi kokidaĵo estas tiel malmola! — *Este frango está tão duro!*

86. Ĉu vi deziras tutan manĝon, sinjoro? — *Você deseja refeição completa, senhor?*
87. Jes, kompreneble. Mi estas malsatega — *Sim, naturalmente. Estou com uma fome de rachar*
88. Ĉu vi volas glason da blanka vino? — *Você quer um copo de vinho branco?*
89. Jes, sed donu al mi tre malmulte — *Sim, mas dê-me muito pouco*
90. Je kioma horo vi kutimas tagmanĝi? — *A que horas você costuma almoçar?*

91. Bonvolu transdoni al mi la salujon — *Tenha a bondade de passar-me o saleiro*
92. Bonvolu doni al ŝi la manĝokarton — *Queira dar-lhe o (cardápio) menu*
93. Mi manĝis sufiĉe por kelkaj tagoj — *Comi o bastante para vários dias*
94. Ŝi trinkis grandan glason da biero — *Ela bebeu um copázio de cerveja*
95. Ne diru, mi ne kredas tion — *Não diga, não creio nisso*

96. Mi deziras trinki glason da biero — *Quero tomar um copo de cerveja*
97. Ni iru en la manĝoĉambron — *Vamos para a sala de jantar*
98. Jes, ni iru, mi estas tre malsata — *Sim, vamos, tenho muita fome*
99. Kiel vi juĝas la manĝaĵon? — *Que tal a comida?*

100. Ho! Tute simple abomenaj — *Oh! simplesmente detestável!*

101. Ni trinkas je via sano! Saluton! — *Bebemos à sua saúde! Salve!*
102. Bonvolu doni al mi rizan porcion — *Queira dar-me uma porção de arroz*
103. Kiel vi trovas ŝian vespermanĝon? — *Que tal você acha o jantar dela?*
104. Bonega – Malbonega — *Excelente – Detestável*
105. Rostu tiun kokidon sur trapikilo — *Asse esse frango no espeto*

106. Ĉu vi volas viŝi niajn telerojn? — *Quer limpar os nossos pratos?*
107. Mi manĝis tre bongustan dolĉaĵon — *Comi um doce muito (gostoso) saboroso*
108. Oni ne devas disputi pri gustoj — *Não devemos discutir sobre gostos*
109. Ŝi sidas tie, sidigu vin tie ĉi! — *Ela está sentada ali, sente-se aqui*
110. Kelnero! du glasetojn da konjako — *Garçom! Dois cálices de conhaque*

111. Ŝi trinkas nek bieron nek vinon — *Ela não toma cerveja nem vinho*
112. Ŝi ŝatas kafon kun lakto — *Ela aprecia café com leite*
113. Kion vi volas trinki? — *O que você quer tomar?*
114. Mi volas trinki vinon kaj bieron — *Quero tomar vinho e cerveja*
115. Kelnero, rapide (alportu) buljonon — *Garçom, (traga) caldo depressa*

116. Trinku glason da minerala akvo — *Tome um copo de água mineral*
117. Mi ne estas soifa, dankon! — *Não estou com sede, obrigado!*
118. Mi trinkis ses glasojn da biero — *Bebi seis copos de cerveja*
119. Ni iris noktomanĝi tre frue — *Fomos cear muito cedo*
120. Kiom kostas porcio da kokidaĵo? — *Quanto custa uma porção de frango?*

121. Ŝajnas, ke ne ekzistas buŝtukoj — *Parece que não há guardanapos*
122. Bone, mi prenos iom da fruktoj — *Bem, comerei um pouco de frutas*
123. Metu unu manĝilaron pli por ŝi — *Ponha mais um talher para ela*
124. Ĉu la bovida lango estas bona? — *A língua de vitela está boa?*
125. Jen ĉio kion mi povas respondi — *Eis tudo o que posso responder-lhe*

126. Ĉu vi havas bonajn cigaredojn? — *Você tem bons cigarros?*
127. Ĉu vi estis jam servita? — *Você já foi servido?*
128. Donu al mi tranĉaĵon da melono — *Dê-me uma talhada de melão*
129. La kuiristino boligas la ovojn — *A cozinheira ferve os ovos*
130. Plenigu vian glason per biero — *Encha o seu copo de cerveja*

131. Ĉu ni prenos kafon tie ĉi? —*Tomaremos café aqui?*
132. Ne, malsupre, en la kafejo — *Não, lá embaixo, no café*
133. Ĉu vi sonorigus al la kelnero? — *Você chamaria o garçom?*
134. Sonorigu al li, mi petas! — *Chame-o, por favor*
135. Donu al mi rizkukon, mi petas — *Dê-me um bolo de arroz, por favor*

136. Kiel vi trovas nian manĝaĵon? — *Que tal a nossa comida?*
137. Servu vin senĝene — *Sirva-se sem cerimônia*
138. Kiu estas via plej bona vino? — *Qual é o seu melhor vinho?*
139. Mi ne ŝatas malfreŝan ĉasaĵon — *Não gosto de caça passada*
140. Fraŭlino, mi petas la kalkulon — *Senhorita, a conta por favor*

141. Tiu ĉi supo estas delikatega — *Esta sopa está muito agradável*
142. Kelnero, mi petas la kalkulon — *Garçom, a conta por favor*
143. Ni ne ankoraŭ trinkis bieron — *Nós ainda não bebemos cerveja*
144. Bonvolu doni al mi la menuon — *Queira me passar o menu*
145. Kion vi donas por tio prezo? — *O que você dá por esse preço?*

146. Mi ŝatas nek bieron nek vinon — *Não aprecio cerveja nem vinho*
147. Je kioma horo oni tagmanĝas? — *A que horas se almoça?*
148. Je la dekdua, tute precize — *As doze horas em ponto*
149. Kial vi enkalkulas tion? — *Por que você inclui isso?*
150. Kelnero, metu la manĝilaron — *Garçom, ponha a mesa*

151. Rigardu ĉu la manĝaĵo estas bona — *Veja se a comida está boa*
152. Ĉu gi estas laŭ via gusto? — *Está a seu gosto?*
153. Akvo estas pli bone ol vino — *Água é melhor do que vinho*
154. Bonvolu tranĉi la rostaĵon — *Queira cortar o assado*
155. Mi donas kalkulan raporton pri — *Presto contas de...*

156. Ĉu vi havas cigaredojn? — *Você tem cigarros?*
157. Mi havas; kian vi deziras? — *Tenho; qual deseja?*
158. Mi ne kuraĝas trinki kafon — *Não ouso tomar café*
159. Preparu por ni tiun tablon — *Sirva-nos nessa mesa*
160. Alportu al mi la vinkarton — *Traga-me a lista de vinhos*

161. Ĉu vi volas trinki bieron? — *Quer tomar cerveja?*
162. Mi nenion deziras plu, danke! — *Não quero mais nada, obrigado!*
163. Mi havas abomenon al porkaĵo — *Tenho horror a carne de porco*
164. La vespermanĝo malvarmiĝas — *O jantar está esfriando*
165. Kial vi ne havas sukceson? — *Por que você não consegue?*

166. Ili sidas ĉirkaŭ la tablo — *Eles estão assentados à mesa*
167. Mi trinkos glason da vino — *Vou tomar um copo de vinho*
168. Ĉu vi havas bonan vinon? — *Você tem bom vinho?*
169. Kia abomena kuirmaniero! — *Que cozinha detestável!*
170. Ĉu vi ŝatas legomojn? — *Você gosta de legumes?*

171. Kiel vi trovas la vinon? — *Que tal você acha o vinho?*
172. Mi trovas ĝin tre bona — *Acho-o excelente*
173. Ne estas sufiĉe da supo — *Não há sopa suficiente*
174. Servigu la vespermanĝon! — *Mande servir o jantar!*
175. Ĉiu sin nutras por vivi — *Todos se alimentam para viver*

176. Ni trinku pro lia sano! — *Bebamos à saúde dele!*
177. Ĝi estas tro multekosta — *Custa demasiado caro*
178. Fi! Tio estas tromanĝi! — *Arre! Isso é que é comer!*
179. Servigu la noktomanĝon! — *Mande servir a ceia!*
180. Malplenigu vian glason! — *Esvazie o seu copo!*

181. Ĉu estas io por manĝi? — *Há alguma coisa para comer?*

182. Kian ĉasaĵon vi havas? — *Que espécie de caça tem?*
183. Kiom da mono vi havas? — *Quanto de dinheiro você tem?*
184. Donu trinkmonon al li — *Dê-lhe uma gorjeta*
185. Trinku glason da vino — *Beba um copo de vinho*

186. Ĉu vi ŝatas kukumojn? — *Você gosta de pepinos?*
187. Mi ne plu povas manĝi — *Não posso comer mais*
188. Tie ĉi odoras malbone — *Aqui cheira mal*
189. La butero estas ranca — *A manteiga está rançosa*
190. Mi tuj petos pri alia — *Vou pedir outra*

191. Preparigu la kalkulon! — *Mande preparar a conta!*
192. Ĝi estas tre bongusta! — *Está muito saboroso!*
193. Kion vi havas preta? — *O que você tem pronto?*
194. Tio estas tro manĝi! — *Isso que é comer!*
195. Ni trinku ĉampanon! — *Bebamos um champanha!*

196. La trinkaĵo malbonigas min — *A bebida me faz mal*
197. Kiom vi volas mendi — *Quanto você vai pedir*
198. Manĝu kiom vi volas — *Coma quanto você quiser*
199. Sidiĝu ĉe la tablo! — *Sente-se à mesa!*
200. Envolvu ĝin zorge! — *Embrulhe-o com cuidado!*

201. Ni vidu la karton! — *Vejamos a lista!*
202. Je la kalkulo de... — *Por conta de...*
203. Kion vi deziras? — *O que você deseja?*
204. Vi nenion manĝas — *Você não come nada*
205. Prenu, mi petas! — *Sirva-se, por favor!*

206. Eksterdoma tagmanĝo — *Almoço fora de casa*
207. Mi volas neniom — *Não quero nada absolutamente*
208. Bonan apetiton! — *Bom apetite!*
209. Kia senatento! — *Que distração!*
210. Je via sano! — *À sua saúde!*

68. En la kafejo — *No café*

1. Diru, kelnero, ĉu anstataŭ kafo oni povus servi al mi tason da teo? — *Diga, garçom, em vez de café não se poderia servir-me uma xícara de chá?*
2. Kelnero! kiam vi servos la kafon, vi tre zorgu, ke ĝi estu varmega — *Garçom! Quando você servir o café, tome muito cuidado para que ele esteja bem quente*
3. Kelnero, alportu, kiel eble plej rapide, tason da kafo kun lakto — *Garçom, traga, o mais depressa possível, uma xícara de café com leite*
4. Kelnero, alportu al ni du tasojn da kafo kaj kelkajn buterpanojn — *Garçom, traga-nos duas xícaras de café e alguns pães com manteiga*
5. Vere, oni devas iom aerumi, ĉar oni preskaŭ sufokas pro la fumo — *Na verdade, deve-se tomar um pouco de ar, porque quase estamos sufocados pela fumaça*

6. Kelnero, alportu, kiel eble plej rapide, ŝinkon kaj glason da teo — *Garçom, traga, o mais depressa possível, presunto e um copo de chá*
7. Devas ekzisti kafejo kien kunvenas la esperantistoj — *Deve haver um café onde se reunem os esperantistas*
8. Por nin ripozi, ni eniru en la plej proksiman kafejon — *Para repousarmos, entremos no café mais próximo*
9. La forta kafo ekscitas la nervojn kaj malhelpas dormi — *O café forte irrita os nervos e impede de dormir*
10. Enmetu sukeron en la kafon kaj pasigu la tason al ŝi — *Ponha açúcar no café e passe a xícara para ela*

11. Kelnero! enverŝu al mi multon da kafo kun lakto — *Garçom! Ponha muito café com leite*
12. Mi petas, ĉu estas bona restoracio proksime? — *Por favor, há um bom restaurante perto?*
13. Jes, estas du restoracioj en la strato, proksime — *Sim, há dois restaurante perto nesta rua*
14. Se tio estas kafo, alportu teon, mi petas! — *Se isso é café, traga-me chá, por favor!*
15. Donu al mi ankoraŭ lakton – kafon – sukeron — *Dê-me ainda leite – café – açúcar*

16. Kelnero! du tasojn da kafo kun du buterpanoj — *Garçom! Duas xícaras de café com dois pães com manteiga*
17. Donu al mi tason da kafo, panon kaj viandon — *Dê-me uma xícara de café, pão e carne*
18. La kafo forta malbonigas al mi stomakon — *O café forte me faz mal ao estômago*
19. Ĉu vi preferas fortan aŭ malfortan kafon? — *Você prefere café forte ou fraco?*
20. Jen estas sukero, prenu iom, sed ne ĉiom — *Olhe aqui o açúcar, tire um pouco, mas não tudo*

21. Ĉu vi preferas kafon kun aŭ sen lakto? — *Você prefere café com ou sem leite?*
22. Mi preferas sen lakto — *Prefiro (puro) sem leite*
23. Mi tre ŝatas ovoflavaĵon kun ĉokolado — *Gosto muito de gemada com chocolate*
24. Alportu al mi tason da kafo kun lakto — *Traga-me uma xícara de café com leite*
25. La malforta kafo estas laŭ mia gusto — *O café fraco está do meu gosto*

26. Ĉu vi bonvolas akcepti refreŝigaĵon? — *Quer ter a bondade de aceitar um refresco?*
27. Ĉu vi preferas kafon aŭ teon? — *Você prefere café ou chá?*
28. Mi preferas kafon. Mi tute ne ŝatas teon — *Prefiro café. Não gosto de modo algum de chá*
29. Tiuj glaciaĵoj estas tre bongustaj — *Aqueles sorvetes são muito gostosos*
30. Alportu al ni glacion kaj citronon — *Traga-nos gelo e limão*

31. Fine ŝi alportas kafon en kafkruĉo — *Finalmente ela traz café no bule*
32. Ĉu vi deziras fromaĝon kun butero? — *Você quer queijo com manteiga?*
33. Ne, mi trinkas nur nigran kafon — *Não, bebo café simples somente*
34. Kelnero, alportu tason da kafo — *Garçom, traga uma xícara de café*
35. Kie mi povas pagi la kalkulon? — *Onde poderei pagar a conta?*

36. Detranĉu kelkajn pecojn de pano — *Corte alguns pedaços de pão*
37. Lakto estas pli nutra ol vino — *Leite é mais nutritivo que vinho*
38. Kelnero, alportu tason da teo — *Garçom, traga chávena de chá*
39. Jen via kafo kaj buterpano — *Eis o café e pão com manteiga*
40. Ĉiom da kafo ekcitas lin — *Qualquer quantidade de café excita-o fortemente*

41. Aldonu al la kafo iom da akvo — *Junte um pouco d'água ao café*
42. Tiu ĉokolado estas tro densa — *Esse chocolate está muito forte*

43. Mi volas kafon anstataŭ teo — *Quero café em vez de chá*
44. Ĉu vi havas freŝan buteron? — *Você tem manteiga fresca?*
45. Kirlu la teon per kulereto mi petas — *Mexa o chá com uma colherzinha, por favor*

46. Mi trinkas kafon sen sukero — *Tomo café sem açúcar*
47. Transdonu al mi la sukeron — *Passe-me o açúcar*
48. Hu! Kia estas ĉi tiu kafo? — *Ah! Que café é este?*
49. Kiel vi trovas mian kafon? — *Que tal meu café?*
50. Servu vin, mi petas! — *Sirva-se, por favor!*

51. Mi preferas panon ol kukon — *Prefiro pão a bolo*
52. Ĉu vi deziras iom da teo? — *Você deseja um pouco de chá?*
53. Neniom plu, dankon! — *Absolutamente nada, obrigado!*
54. La pano estas tute malmola — *O pão está completamente duro*
55. Mi ŝatas senbuteran panon — *Gosto de pão sem manteiga*

56. La sukero estas en la teo — *O açúcar está no chá*
57. La sukero ne estas en ĝi — *O açúcar não está nele*
58. Estas sukero en la teo — *Há açúcar no chá*
59. Kion ni trinku? — *O que vamos beber?*
60. Ni trinku tasojn da kafo — *Vamos beber café*

61. Kiom da pano vi deziras? — *Quanto de pão você deseja?*
62. Mi ne jam manĝis fromaĝon — *Eu ainda não comi pão*
63. Donu al mi iom da butero — *Dê-me um pouco de manteiga*
64. Donu al mi kafkulereton — *Dê-me uma colher de café*
65. Estas akvo en la glaso — *Há água no copo*

66. Mi havas kelkan monon — *Tenho algum dinheiro*
67. Kiom ankoraŭ? — *O que mais? Quanto mais?*
68. Ne faru ceremonion! — *Não faça cerimônias!*
69. Tason da laktokafo — *Uma xícara de café com leite*
70. Buterumu la panpecon! — *Passe manteiga no pedaço de pão!*

71. Sukeron, kelnero! — *Açúcar, garçom!*
72. Nenio estas preta — *Nada está pronto*
73. Trinketu la kafon! — *Beba o café aos goles!*
74. Lakto estas nutra — *O leite é nutritivo*
75. Varmigu la kafon! — *Aqueça o café!*

76. Gustumu la kafon! — *Experimente o café!*
77. Estu trankvila! — *Esteja tranquilo!*
78. Kirlu la kafon! — *Mexa o café!*
79. Estu silentaj! — *Fiquem calados!*
80. Ĝis revido! — *Até à vista!*

69. ALIAJ DIRMANIEROJ — *OUTRAS EXPRESSÕES*

1. Inter la ĉeestantoj ni rimarkis, ke... — *Entre os presentes observamos que...*
2. El la dirita regulo sekvas, ke... — *Da regra dita, segue que...*
3. Pri tiu afero, mi devas diri, ke... — *Quanto a esse assunto, devo dizer que...*
4. La plej grava afero estas, ke... — *O importante é que...*
5. Plie, mi devas diri al vi, ke... — *Além disso, devo dizer-lhe que...*

6. Inter alie, li rakontis, ke... — *Entre outras coisas ele contou que...*
7. Mi iros sub la kondiĉo, ke... — *Irei sob a condição de que...*
8. La kaŭzo kuŝas en tio, ke... — *A questão se prende a isto que...*
9. Mi tiam diris al li, ke... — *Então disse-lhe que...*
10. El tio mi konkludas, ke... — *Disso eu tiro a conclusão que...*

11. Ni preskaŭ pensis, ke... — *Quase pensamos que...*
12. Ne estas atendate, ke... — *Não é esperado que...*
13. Mi konsilas al vi, ke... — *Eu o aconselho que...*
14. Vi tuj rimarkos, ke... — *Você notará logo, que...*

15. Estas maljuste, ke ... — *É injusto que...*
16. La certo estas, ke... — *O certo é que...*
17. Mi re(memoras), ke... — *Lembro-me que...*
18. Estas senutile, ke... — *É inútil que...*
19. Mi dankas vin, ke ... — *Agradeço-lhe que...*
20. Kun la kondiĉo, ke... — *Com a condição de que...*

21. Estas kutime, ke... — *É de costume que...*
22. Estus facile, ke... — *Seria fácil que...*
23. Sub la kondiĉo, ke... — *Sob a condição que...*
24. Mi timegas, ke... — *Receio muito que...*
25. Mi aŭdis, ke... — *Ouvi dizer que...*

26. Estas domaĝe, ke ... — *É pena que...*
27. Estas necese, ke... — *É necessário que...*
28. Mi jam diris, ke... — *Eu já disse que...*
29. Pardonu min, ke... — *Desculpe-me se...*
30. Mi ne volas, ke ... — *Eu não quero que...*

31. En la kondiĉo, ke... — *Cotanto que...*
32. Konsciante, ke... — *Cônscio de que...*
33. Tiamaniere, ke... — *De forma que...*
34. Estas plie, ke... — *Acresce que...*
35. Oni diras, ke... — *Consta que...*

36. Krom tio, ke... — *Além do que...*
37. Konsente, ke... — *Admitindo-se que*
38. Malgraŭ, ke... — *Se bem que...*
39. Pro tio, ke... — *Por isso que...*
40. Kondiĉe, ke... — *Contanto que...*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

antaŭeniri — *adiantar-se;* **antaŭflari** — *pressentir;* **antaŭnaski** — *abortar;* **antaŭsenti** — *augurar, pressagiar;* **antaŭzorgi** — *precaver-se;* **deflankiĝi** — *desviar-se;* **diskarnigi** — *dilacerar;* **disvastigi** — *divulgar, espalhar;* **ekprojekti** — *conceber um projeto;* **forinviti** — *mandar embora;* **forkolekti** — *apanhar;* **forkomerci** — *liquidar (com.);* **forkonduki** — *afastar, fazer sair;* **forkonsumi** — *consumir, esgotar;* **laŭliniigi** — *alinhar;* **plilongigi** — *alongar;* **plikleriĝi** — *instruir-se;* **pliproponi** — *cobrir o lanço;* **plivastigi** — *ampliar, aumentar;* **preterlasi** — *deixar escapar, sair;* **preterlasi** — *ultrapassar, exceder;* **pririgardi** — *examinar, inspecionar;* **rehonorigi** — *reabilitar;* **rekonstrui** — *reconstruir;* **reprodukti** — *reproduzir;* **senhaŭtigi** — *tirar a pele, pelar;* **senfortigi** — *enfraquecer;* **senhomigi** — *despovoar;* **sentronigi** — *destronar;* **senrustigi** — *desenferrujar;* **superverŝi** — *alagar;* **superŝarĝi** — *sobrecarregar;* **superstari** — *dominar;* **surkorekti** — *fazer emendas;* **surtronigi** — *entronizar;* **surtabligi** — *pôr na mesa;* **trapenetri** — *penetrar;* **trakonduki** — *levar através de;* **transsendi** — *transmitir;* **transporti** — *transportar;* **transŝanĝi** — *transmudar;* **transloki** — *deslocar;* **transpasi** — *baldear-se, exceder;* **transdoni** — *transmitir;* **trorapidi** — *afobar-se (relações);* **trokreski** — *crescer desmedidamente;* **trokaresi** — *amimar;* **trolaŭdi** — *adular;* **trokapti** — *usurpar;* **trouzi** — *abusar*

Os afixos, em esperanto, dançam tango em torno do radical, deslumbrando-nos com novas palavras, que vão ser a melodia da frase aos nossos ouvidos.

Pandiá Pându

GRAMATIKO – XXIV

PREFIKSOJ KAJ SUFIKSOJ — PREFIXOS E SUFIXOS

PREFIKSOJ — PREFIXOS

Os prefixos mais usados em esperanto são:
AER, ANTI, AŬTO, BO, ĈEF, ĈI, ĈIRKAŬ, ĈIU, DE, DIS, DUBE, DUON, EG, EK, EKS, EL, EN, ET, FI, FOR, FUŜ, GE, GRAND, INTER, KONTRAŬ, KROM, KUN, LAŬ, MAL, MEM, MIS, NE, PER, PLEN, PLI, PO, POST, PRA, PRI, RE, RETRO, SAM, SEN, SIN, SUB, SUPER, SUPRE, SUR, TELE, TRA, TRANS, TRO, VIC, VIR

Preposições, advérbios e radicais usados como prefixos:
ĈIRKAŬ, DE, EL, EN, FOR, INTER, KONTRAŬ, KROM, KUN, LAŬ, NE, PER, PLI, PO, POST, PRETER, PRI, RETRO, SEN, SUB, SUPER, SUPRE, SUR, TRA, TRANS, TRO

Radicais usados como prefixos:
AER, ĈI, ĈIU, DUBE, FUŜ, GRAND, MEM, PLEN, SAM, TELE, VIC, VIR

Prefixos oficiais:
BO, DIS, EK, EKS, FI, GE, MAL, MIS, PRA, RE

1. **AER**. Elemento que entra em composição de muitas palavras em esperanto. Corresponde ao nosso prefixo **AR** (do grego **AER**), como: **AERUMI** (arejar)

aerveturanto — *aeronauta;* **aerveturilo** — *aeronave;* **aerveziketo** — *bolha de ar;* **aerblovo** — *corrente de ar;* **aerhejtado** — *aquecimento a ar;* **aermalsano** — *enjoo aéreo;* **aerdefendo** — *defesa aérea;* **aerdisiĝi** — *dissipar-se no ar*

Continua na página 261

ESPERANTO-PORTUGUÊS
(CONVERSAÇÃO)

Ne laŭdu la tagon antaŭ la vespero
Prov. Inglês

Silenti ne signifas konsenti
Prov. Alemão

Kiu silentas, ties lango ne doloras
Lango de virino estas ŝia glavo
Kiu flatas al ĉiu, plaĉas al neniu

ĈAPITRO XIV / CAPÍTULO XIV

Vivo sen fido, sen espero kaj sen amo!
Kun kiu vi festas, tia vi estas
En la bona malnova tempo!

70. **AĈETOJ KAJ VENDOJ** — *COMPRAS E VENDAS*

1. Montru al mi, mi petas, tiun ĉapelon, ne tiun ĉi, sed tiun apude — *Mostre-me, por favor, aquele chapéu, não este, mas aquele que está ao lado*
2. Ni rapide iru en la butikon, ĉar ni havas multe por fari tie — *Vamos depressa à loja, porque temos muito que fazer*
3. Mi volas aĉeti kelke da muzikdiskojn kaj du sonbendilojn — *Quero comprar alguns discos e dois gravadores*
4. La formato de la sonbendilo estas tro granda, donu al mi alian — *O formato do gravador é muito grande, dê-me outro*
5. Tiu ĉi vestkesto estas maloportuna, mi deziras ion pli bonan — *Esta mala é incômoda, desejo coisa melhor*

6. Dankon sinjoro. Bonvolu pagi tridek dolarojn al la kaso — *Obrigado senhor. Queira pagar trinta dólares à caixa*
7. Io kare pagita, ankoraŭ pli profitas ol io malkare pagita — *O mais caro é ainda o que nos sai mais barato*
8. Ĉu vi pensas, ke tiu ĉi koloro konvenas al mia vizaĝo? — *Você acha que esta cor assenta para o meu rosto?*
9. Mi ne kutimas marĉandi: ĉe ni, la prezo estas fiksita — *Não costumamos regatear: na nossa casa o preço é fixo*
10. Kioma estas la plej malalta prezo de tio ĉi? — *Qual é o último preço disto?*

11. Mi bezonas renovigi mian provizon da muzikdiskoj — *Preciso renovar a minha provisão de discos*
12. Kia belega skatolo da leterpapero kun kovertoj! — *Que linda caixa de papel de cartas com envelopes!*
13. Mi pagis al li pli multe ol kiom mi efektive ŝuldis — *Paguei-lhe mais do que realmente devia*
14. Kun kiu vi volas iri al butikoj por diversaj aĉetoj? — *Com quem você quer ir às lojas fazer diversas compras?*
15. Ĉu vi volas permesi, ke mi akompanu vin? — *Permita-me que eu o acompanhe?*

16. Nun montru al mi tekruĉon kaj tetasojn meze grandajn — *Mostre-me agora um bule e chávena de tamanho regular*
17. Estas grandegaj provizoj de sapetoj kaj parfumoj — *Há enormes estoques de sabonetes e perfumes*
18. Mi bedaŭras, sed mi ne povas pli malaltigi la prezon — *Sinto muito, mas não posso fazer mais abatimento no preço*
19. Mi ankaŭ bezonas ŝtrumpojn, pantalonojn kaj zonon — *Preciso também de meias, calças e cinto*
20. Tiuj ĉi objektoj estas sur la dua etaĝo — *Estes objetos estão no segundo andar*

21. Mi preferas veluran garnituron kun silkaj rubandoj — *Prefiro enfeite de veludo com fita de seda*
22. Mi deziras ĉapelon, kiu ŝirmas min kontraŭ la suno — *Quero um chapéu que me proteja do sol*
23. Laŭ kia adreso mi devas sendi tiun ĉi komercaĵojn? — *A qual endereço devo mandar todos estes artigos?*
24. Bonvolu montri al mi diversajn blokojn da ŝtofoj — *Queira mostrar-me diversas peças de fazendas*
25. Aĉetantoj montras intereson por diversaj superaj kvalitoj — *Compradores mostram interesse por diversas qualidades superiores*

26. Mi ne povas atendi ĝis kiam vi estos farinta unu — *Não posso esperar até que você me faça um*
27. La komerco multe suferas tie ĉi pro la ĝenerala krizo — *O comércio aqui está sofrendo muito a crise geral*
28. Bone, post unu momento mi ĉion ĉi montros al vi — *Bem, daqui a pouco mostrarei tudo isto a você*
29. Tiu ĉi ĉapelo estas granda (tro alta) por mi — *Este chapéu é grande (muito alto) para mim*
30. La petado pri lanaĵoj daŭras la tutan vintron — *Os pedidos dos artigos de lã duram todo o inverno*

31. Tio estas multekosta; alie, ĝi ne estas laŭmode — *É muito caro; além disso já não está na moda*
32. La provizaĵoj estas tute difektitaj per pluvego — *Os sortimentos estão totalmente estragados pelo aguaceiro*
33. Mi aĉetis por mia amiko arĝentan cigaredujon — *Comprei para meu amigo uma cigarreira de prata*
34. Mi deziras internan subŝtofon de alia koloro — *Quero o forro interno de outra cor*
35. La vendistoj malaltigis siajn prezojn ĝis... — *Os vendedores baixaram os preços até...*

36. Mia provizaĵo estas tiel kompleta kiel eble — *O meu sortimento é o mais completo possível*
37. Ĉu vi volas manĝovazojn el porcelano? — *Quer louça de porcelana?*
38. Montru al mi kion vi havas, sed unue... — *Mostre-me o que tem, mas primeiro...*
39. Ĉu tio plaĉas al vi? — *Isso lhe agrada?*

40. Jes, tiom pli ke la ĉemizo estas pli beleta — *Sim, tanto mais que a camisa é mais bonita*

41. Mi volas aĉeti kelkajn ŝtrumpojn el nilono — *Quero comprar algumas meias de "náilon"*
42. Mi volas aĉeti kelkajn silkajn ŝtrumpetojn — *Quero comprar algumas meias de seda*
43. Mi volas ilin sufiĉe belaj — *Quero-as bastante bonitas*
44. Mi volas aĉeti kotonan fadenon por kudri — *Quero comprar linha para costurar*
45. Mi volas ion ne tro multekosta — *Quero algo não muito caro*

46. Permesu min montri al vi kelkajn buŝtukojn — *Permita-me mostrar-lhe alguns guardanapos*
47. Ĉu vi jam havas la meblojn por la kuirejo? — *Você já tem os móveis para a cozinha?*
48. Bonvolu montri al mi desertajn tranĉilojn — *Queira mostrar-me as facas de sobremesa*
49. Nu, sendu ĉiujn aĉetojn al mia domo — *Bem, mande-me todas as compras a minha residência*
50. Viaj ordoj estos plenumitaj — *Suas ordens serão cumpridas*

51. Mi aĉetis por mia filo oran cigaredujon — *Comprei para meu filho uma cigarreira de ouro*
52. La prezo estas kvindek kruzeroj pometre — *O preço é de cinqeenta cruzeiros o metro*
53. Ĉu vi havas kaŭĉukan fadenon por vendi? — *Você tem elástico para vender?*
54. Tiu drapo ŝajnas al mi tre multekosta — *Esse pano parece-me caríssimo*
55. Tio plaĉas al mi. Kioma estas la prezo? — *Isso me agrada. Quanto custa?*

56. Tiu ĉi speco estas tro malforta por mi — *Esta qualidade é muito fraca para mim*
57. Mi bezonas dekduon da tablaj tranĉiloj — *Preciso de uma dúzia de facas de mesa*
58. Permesu, ke mi proponu al vi novaĵojn — *Permita-me que lhe ofereça novidades*
59. Mi estas certa, ke ili kontentigos vin — *Estou certo de que eles vão lhe agradar*
60. Sed mi ne bezonas ilin — *Mas não preciso deles*

61. Por vi mi lasos ĝin por sesdek dolaroj — *Para você vou deixá-lo por sessenta dólares*
62. Mi ne ŝatas la formon de tiu ĉapelo — *Não gosto da forma desse chapéu*
63. Vi ĝin trovos ĉe la fino de la strato — *Você o encontrará no fim da rua*
64. Jen estas aliaj. Kiel vi trovas ilin? — *Aqui estão outras. Que lhe parecem?*

65. Mi demandis vin pri tio por alia fojo — *Perguntava-lhe isso para outra vez*

66. Mi havas ĝin, sed ĝi estas multekosta — *Tenho-o, mas é muito caro*
67. Tiu ĉi artiklo estas multe disvendata — *Este artigo tem grande saída*
68. Ĉu vi havas cigaredojn kaj alumetojn? — *Você tem cigarros e fósforos?*
69. Jes, oni vendas ilin. Oni ne vendas ilin — *Sim, vendem-se. Não vendemos*
70. Sendu al mi ĉiujn tiujn ĉi artiklojn — *Mande-me todos estes artigos*

71. Mi kredas, ke vi ĝin trovos delikata — *Creio que você há de achá-la fina*
9. Kvankam ĝi estas malkara, ĝi tro kostas, ĉar ĝi neniel taŭgas — *Embora seja barato, custa muito caro, porque não vale nada*
10. Mi havas fotografaĵojn de diversaj monumentoj de la urbo — *Tenho fotografias dos diversos monumentos da cidade*

11. Bonvolu enpaki centon da kovertojn kaj ducent poŝtkartojn — *Queira embrulhar cem envelopes e duzentos cartões-postais*
12. Mi konas tiun, kiun vi proponas al mi, ĝi estas tro dika — *Conheço esse que você me oferece, é muito volumoso*
13. Mi dezirus kelkajn kajerojn da ĝi je pli granda formato — *Desejaria alguns cadernos dele de um formato maior*
14. Mi deziras libron kun bildoj por donaci al infano — *Desejo um livro com figuras para presentear uma criança*
15. Aliaj vendistoj proponas pli malkarajn prezojn — *Outros vendedores oferecem melhores preços*

16. Ĉu vi havas fotografaĵon de muzeaj pentraĵoj? — *Você tem fotografia dos quadros do museu?*
17. Legu ĉi tiun libron; ĝi meritas esti legata — *Leia este livro; ele merece ser lido*
18. Mi venigis al mi multajn librojn el Usono — *Mandei buscar muitos livros dos Estados Unidos*
19. Sen abono, kiom vi luigas ĉiun volumon — *Sem assinatura, por quanto você aluga cada volume?*
20. Kioni vi vendas (dekduon da ili) po dekduo? — *Quanto você vende a dúzia?*

21. Ĉu oni povas preni ĉiuspecajn verkojn? — *Pode-se levar qualquer espécie de obras?*
22. Kiom da tagoj oni povas konservi ĝin? — *Por quantos dias podemos ficar com ele?*
23. Ĉu vi povas vendi al mi tiun numeron? — *Você pode vender-me esse número?*
24. Ĉu vi havas la stratkarton de l' urbo? — *Você tem o plano da cidade?*
25. Estas la plej bonaj, kiujn mi konas — *São os melhores que conheço*

26. Mi deziras ĝin bindita – broŝurita — *Desejo-o encadernado – em brochura*
27. Ĉu vi havas fontoplumon? [87]— *Você tem caneta-tinteiro?*
28. Ĉu vi pruntedonas librojn monate? — *Vocês não emprestam livros por mês?*
29. Ĉu vi ricevas la ĵurnalojn de... ? — *Vocês recebem jornais de... ?*
30. Ĉu vi havas katalogon de l' muzeo? — *Você tem o catálogo do museu?*

31. Ĉu vi havas globpintan plumon? — *Você tem esferográfica?*
32. Deprenu la libron de la breto — *Tire o livro da prateleira*
33. Kiajn librojn vi preferas? — *Que livros vocês preferem?*
34. Ni preferas sciencajn librojn — *Preferimos livros científicos*
35. Sur kioma paĝo vi vidis tion? — *Em que página você viu isso?*

36. Ĉia libro havas sian meriton — *Cada livro tem seu mérito*

---

[87] *Temos cerca de três palavras, em esperanto, para a nossa "caneta-tinteiro", isto é,* ***"inkuja plumo"***, ***"fontan-plumo"*** *e* ***"fonto-plumo"***, *porém, a de uso mais corrente é* ***"fonto-plumo"***. *É interessante observar que têm aparecido também em revistas, jornais, etc., diversos modos para traduzir a nossa conhecida e popular "esferográfica", como* ***"globpinta plumo"***, *"****rondpinta plumo"***, ***sferpinta plumo"*** *e* ***"sferformplumo"***, *contudo, está mais se vulgarizando a forma* ***"globpinta plumo"***.

37. Mi deziras botelon da inko — *Desejo um vidro de tinta*
38. Ili kostas nur mil kruzerojn — *Custam somente mil cruzeiros*
39. La libroj estas elvenditaj — *Os livros estão esgotados*
40. Mi presigos la libron baldaŭ — *Vou mandar imprimir o livro brevemente*

41. La libroj estas elĉerpitaj — *Os livros estão esgotados*
42. Aĉetu viajn librojn ĉe... — *Compre os seus livros na...*
43. La sonbendilo estas elvendita — *O gravador está esgotado*
44. Nenia libro plaĉas al mi — *Não gosto de nenhum livro*
45. Aĉetu al mi ian libron — *Compre-me um livro qualquer*

46. Mi estas leginta ĉion — *Tenho lido tudo*
47. Kiom kostas la abono — *Quanto custa a assinatura?*
48. Vi devas havi fontoplumojn — *Você deve ter canetas*
49. Kioma paĝo estas? — *Quantas páginas são?*
50. Kiom ili kostas? — *Quanto custam?*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

esti elĉerpita — *estar esgotado*[88]; **esti presata —** *estar no prelo;* **presigi —** *mandar imprimir;* **liniilo —** *régua;* **esti elvendita —** *estar esgotado*[89] ; **ĉefartikolo —** *artigo de fundo;* **krajono —** *lápis;* **koverto —** *envelope*

[88] ***Esti elĉerpita***, *estar esgotado, i.é, nesse ou naquele estabelecimento.*
[89] ***Esti elvendita***, *estar esgotado, i.é, sem mais um exemplar.*

4. AŬTO. Prefixo muito usado (veja os prefixos **MEM-** e **SIN-**) com o sentido de PRÓPRIO DE SI MESMO, como: **AŬTOBIOGRAFIO** (autobiografia), **AŬTOGRAFIO** (autografia)

aŭtoheterodino — autoheteródino
aŭtodigesto — autodigestão
aŭtokratio — autocracia
aŭtokuri — rolar na pista (av.)
aŭtorino — autora
aŭtonomio — autonomia
aŭtodafeo — auto-de-fé
aŭtokrato — autocrata
aŭtobuso — auto-ônibus
aŭtovojo — auto-estrada

5. BO (do francês **BEAU**). Prefixo que indica parentesco adquirido pelo CASAMENTO, como: **PATRO** (pai), **BOPATRO** (sogro), **PATRINO** (mãe), **BOPATRINO** (sogra).

bogepatroj — sogros
bofratino — cunhada
boedziĝi — casar-se[90]
boedzeco — levirato[91]
bokuzino — prima afim
boparenco — parente afim
bonevino — sobrinha afim
bonevo — sobrinho afim
bokuzo — primo afim
bofrato — cunhado

Continua na página 27Ɣ

[90] ***Boedziĝi kun*** *(casar-se com a sua cunhada).*

[91] ***Boedzeco*** *(levirato, i.é., matrimônio entre cunhado e cunhada, geralmente, entre judeus. B**oparenciĝi** (ligar por parentesco).*

75. ĈE LA TAJLORO — *NO ALFAIATE*

1. Ni vidu la jakon – ĝi estas tro malfermita – tro alta – tro larĝa malsupre — *Vamos ver o paletó – ele está muito aberto – muito "afogado" – muito frouxo em baixo*
2. Vi faros tiun pantalonon iom larĝa, mi ne povas toleri esti malvaste — *Você vai fazer essa calça um pouco larga, não tolero ficar apertado*
3. Prenu la mezurojn sur min, mi ne ŝatas esti premata en miaj vestoj — *Tome-me as medidas, não gosto que as roupas me apertem*
4. La pantalono estas mallarĝa ĉe la kruroj kaj larĝa ĉe la zono — *A calça está muito apertada nas pernas e larga na cintura*
5. Cent kruzeroj ne estas sufiĉe por aĉeti tiun ĉi kompleton — *Cem cruzeiros não são suficientes para comprar este terno*

6. La manikoj estas tro mallongaj – tro longaj – tro larĝaj — *As mangas estão muito curtas – muito compridas – muito largas*
7. Mi deziras pli varman ŝtofon, pli maldikan, pli flekseblan — *Desejo um tecido mais quente, mais leve, mais macio*
8. Vi alfaros poŝon por la okulvitroj maldekstre — *Você vai adaptar um bolso para os óculos, à esquerda*
9. Silko tro rapide eluziĝas, metu al mi alian sabŝtofon — *Seda acaba logo, ponha-me um outro forro*
10. Ni tuj provu la ĉemizon. Mi volas sportan kolumon — *Vamos provar a camisa. Quero gola esporte*

11. Montru al mi, mi petas, ŝtofon por somera pantalono — *Por favor, mostre-me um tecido para calça de verão*
12. Alkudru aliajn butonojn, tiuj ĉi malplaĉas al mi — *Pregue outros botões, estes não ficam bem*
13. Dum vi tenas ĝin, alkudru al ĝi freŝan subŝtofon — *Já que você está segurando-o, ponha um forro novo*
14. Mi estas tre frostema, metu al mi ion tre varman — *Sou muito friorento, ponha-me qualquer coisa mais quente*
15. Tiu ĉi ne estas mia mezuro. Ĝi ne taŭgas al mi — *Esta não é a minha medida. Não me serve*

16. Ĉu vi volas montri al mi kelkajn specimenojn? — *Quer mostrar-me algumas amostras?*
17. Mi faris al vi la plej eble malkaran prezon — *Fiz-lhe o preço mais barato possível*
18. Ĝi estas koloro, kiu nuntempe estas laŭmode — *É uma cor que está muito em moda*
19. Tiu ĉi ŝtofo estas tro hela – tro malhela — *Este tecido é muito claro – muito escuro*
20. Via vesto estos eleganta kaj bone farita — *O seu terno ficará elegante e bem acabado*

21. Mi deziras farigi submezuritan kompleton — *Desejo mandar fazer um terno sob medida*
22. Mi volas mendi por mi novan kompleton — *Quero encomendar um novo terno*
23. Lasu min vidi, ĉu ĝi sidas bone je mi * — *Deixe-me ver se assenta bem em mim*
24. La jako ne estas subŝtofita per silko — *O paletó não está forrado de seda*
25. Faru al mi veŝton kun kolo malfermitan — *Faça-me um colete aberto*

26. Ĝi bone vestas min, mi estas kontenta — *Está bem assim, estou contente*
27. Mi esperas, ke ĝi estu laŭ via plaĉo — *Espero que ele esteja a seu gosto*
28. Mi tre ŝatas tiun ĉi diafanan bluan — *Gosto muito deste azul (fino) transparente*
29. Ĉu vi preferas koloron pli helan? — *Você prefere uma cor mais clara?*
30. Ne, mi estas tre kontenta pri tiu ĉi — *Não, estou muito bem com esta*

31. Kiamaniere vi volas, ke mi faru ĝin? — *Como (de que modo) você quer que o faça?*
32. Laŭ oni uzas nun — *Como se usa agora*
33. Ili estos pretaj morgaŭ posttagmeze — *Estarão prontos amanhã de tarde*
34. Mi ŝatas neniun el tiuj ĉi teksaĵoj — *Não gosto de nenhum destes tecidos*
35. Ŝajnas al mi, ke ĝi estas tre longa — *Parece-me que está comprido demais*

36. Kudru la butonojn pli malproksimen — *Pregue os botões mais distantes*
37. Mi bezonas jaketon el maldika ŝtofo — *Preciso de um fraque de tecido fino*
38. Montru al mi ŝtofon por drapa veŝto — *Mostre-me um tecido para colete de pano*
39. Mi bezonas jakon el drapo iom dika — *Preciso de um paletó de fazenda um pouco encorpada*
40. La palto faras sulkojn sur la dorso — *O paletó faz rugas nas costas*

41. Ĝi estas iomete multekosta — *Está um pouco caro*
42. La blua kompleto bone sidas je vi * — *O terno azul fica-lhe (cai-lhe) bem*

43. Ĉu vi uzas pantalonon tre supre? — *Você usa a calça muito em cima?*
44. Montru al mi ŝtofon el nilono — *Mostre-me tecido de náilon*
45. La manikoj estas tre (mal)longaj — *As mangas estão muito (curtas) compridas*

46. Kiam mi povas havi la surtuton? — *Quando devo receber o sobretudo?*
47. Post unu semajno — *Daqui há uma semana*
48. La pantalono estas tro streta — *A calça está muito estreita*
49. La pantalono estas tro loza — *A calça está muito folgada*
50. Montru al mi multkoloran ŝtofon — *Mostre-me um tecido de fantasia*

51. Mi volas mendi novajn ĉemizojn el nilono — *Quero encomendar novas camisas de náilon*
52. Montru al mi diversajn ŝtofojn — *Mostre-me os diversos tecidos*
53. Tiuj ĉi butonoj estas malbelaj — *Estes botões são feios*
54. Montru al mi ŝtofon el dreliko — *Mostre-me um tecido de brim*
55. Kiun tagon mi devos veni provi? — *Que dia devo vir provar?*

56. Kiam mi povos provi la (palton) jakon? — *Quando poderei provar o paletó?*
57. Ĝi stretigas sub miaj brakoj — *Aperta-me debaixo dos braços*
58. La kompleto ne estas bonfarita — *O terno não está bem feito*
59. La maniko estas tre larĝa — *A manga está muito larga*
60. Ĉu vi volas ĉirkaŭmezuri min? — *Quer tirar-me as medidas?*

61. La submajstro ne venis hodiaŭ — *O contramestre não veio hoje*
62. Montru al mi ŝtofon el veluro — *Mostre-me um tecido de veludo*
63. Montru al mi ŝtofojn por minijupoj — *Mostre-me tecidos para minissaias*
64. Tiu ĉi jako estas ne laŭmode — *Este paletó está fora de moda*
65. Rigardu vin antaŭ la spegulo — *Olhe-se no espelho*

66. Ĉu vi povas fari rabaton? — *Você pode fazer um abatimento?*
67. La pantalono estas tro larĝa — *A calça está muito larga*
68. Montru al mi ŝtofojn por jako laŭmode — *Mostre-me tecidos para um paletó na moda*
69. Montru al mi ŝtofon el silko — *Mostre-me tecido de seda*
70. La pantalono estas tro longa — *A calça está muito comprida*

71. Vi estas homo de bona gusto — *V. é uma pessoa de bom gosto*
72. Montru al mi ŝtofon el lano — *Mostre-me tecido de lã*
73. Ĝi premas min sub la brakoj — *Ele me aperta debaixo dos braços*
74. Ŝi estas beltalia kaj altira fraŭlino — *Ela é uma garota de porte elegante e atraente*
75. Kiom kostas tiu ĉi ĉemizo? — *Quanto custa esta camisa?*

76. La jako ne estas sufiĉe larĝa por vi — *O paletó não está bastante largo para você*
77. Kiom kostas tiu ĉi jako? — *Quanto custa este paletó?*
78. Tiu ĉi koloro tuj paligos — *Esta cor vai desbotar logo*
79. Lasu min prove vesti ĝin — *Deixe-me prová-lo*
80. Kiajn butonojn vi volas? — *Que tipo de botões você quer?*

81. Faru tuj tiujn korektojn! — *Faça logo os retoques*
82. Oni uzas nun tiamaniere — *Estão usando assim agora*
83. Mi havas grandan stokon — *Tenho um grande sortimento*
84. Ĉu mi devas mezuri vin? — *Quer que lhe tome as medidas?*
85. La jupo estas tro longa — *A saia está muito comprida*

86. Tiu ĉi jako sidas bone * — *Este paletó fica (assenta) bem*
87. Mi bezonas alian jakon — *Preciso de outro paletó*
88. Lasu min provi ĉi tiun — *Deixe-me provar este*
89. Butonumu vian jakon! — *Abotoe o seu paletó!*
90. Kiam mi devas reveni? — *Quando devo voltar?*

91. Kiel vi deziras ĝin? — *Como você o quer?*
92. Faru ĝin laŭ la modo — *Faça-o de acordo com a moda*
93. Ĝi sidas sufiĉe bone — Assenta-lhe muito bem
94. Mi bezonas kompleton—Preciso de um terno

95. Mi tuj rimedos ĉion — *Vou dar um jeito em tudo*

96. Ĉu ĝi ne mallarĝiĝos? — *Ele não se encolherá?*
97. Alfaru poŝon tie ĉi — *Ponha o bolso aqui*
98. Jen la kalkulo! — *Olhe aqui a conta!*
99. Tio estas tro kara! — *É muito caro!*
100. Ĝi estas iom longa — *Está um pouco comprido*

101. Lasu min vidi ĝin! — *Deixe-me vê-lo!*
102. Mi ĵus finis ĝin — *Acabei-o agora*
103. Mi estos akurata — *Serei pontual*
104. Laŭ lastmode — *A última moda*
105. Ĝis baldaŭ! — *Até breve!*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

tolteksaĵa kompleto — *terno de brim;* **linŝtofa kompleto —** *terno de linho;* **fleksebla ŝtofo —** *tecido macio;* **laŭ modera prezo —** *a preço moderado;* **lanŝtofa kompleto —** *terno de casimira;* **pantalonfendo —** *braguilha;* **frostsentema —** *muito sensível ao frio;* **multkolora —** *colorido;* **trikfliki —** *cerzir;* **provĉambro —** *sala de provas, seção de provas;* **alĝustigi —** *adaptar;* **minijupo —** *minissaia;* **gabardino —** *gabardina;* **pantalono —** *calça;* **fleksebla —** *flexível, macio;* **frostema —** *friorento;* **kruringo —** *perna (de calça);* **mallarĝa —** *curto, estreito;* **subŝtofo —** *forro (de vestuário);* **vestiĝi —** *vestir-se;* **elprovi —** *provar;* **kvalito —** *qualidade;* **kalsono —** *calça (de senhora);* **dreliko —** *brim grosso;* **surtuto —** *sobretudo;* **el lano —** *de lã;* **teksaĵo —** *tecido;* **faldaĵo —** *rugas (em tecidos);* **maldika —** *fino (tecido);* **stebaĵo —** *pespontado (tecido);* **malhela** — *escuro (tecido);* **eluziĝi** — *puir, desgastar-se;* **mezuro** — *medida;* **rabato** — *abatimento;* **kotono** — *algodão;* **veŝto** — *colete;* **larĝa** — *largo;* **ŝtofo** — *tecido;* **stebi** — *pespontar;* **tipo** — *padrão;* **fasono** — *feitio;* **poŝo** — *bolso;* **alfari** — *adaptar, acomodar;* **jako** — *paletó;* **ĵaketo** — *casaco (de mulher), fraque;* **lano** — *lã;* **katuno** — *tecido de algodão;* **hela** — *claro (tecido);* **pelto** — *peliça;* **ĵako** — *sobrecasaca*

* O verbo **"sidi bone"** (ficar bem, cair bem, assentar bem, etc., tecido, roupa) é **idiotismo** em esperanto, pois, não deixa de ser a aplicação figurada do verbo **assentar,** o qual tem o mesmo uso em várias línguas, como a inglesa, francesa, portuguesa, etc.

6. ĈEF. Prefixo que indica posição EMINENTE, CAPITAL, PRINCIPAL como: **ĈEFKOMANDO DE LA TERARMEO** (Estado-Maior do Exército), **ĈEFA KVARTIRO** (Quartel-General "QG").

ĉefredaktoro — *redator-chefe*
ĉefartikolo — *editorial*
ĉefĝeneralo — *general em chefe*
ĉefministro — *primeiro ministro*
ĉefkuiristo — *mestre-cuca*

ĉefplaco — *praça principal*
ĉefverko — *obra-prima*
ĉeftrabo — *viga-mestra*
ĉefurbo — *capital*
ĉeftemo — *tema em pauta*

ĉeflitero — *letra maiúscula*
ĉefaltaro — *altar-mor*
ĉefrolulo — *ator principal (tea.)*
ĉefjuĝejo — *corte suprema*
ĉefagento — *agente-geral*

ĉefafero — *o essencial*
ĉefpruvo — *corpo delito*
ĉeflibro — *livro-razão*
ĉefrolo — *papel principal (tea.)*
ĉefduko — *arquiduque*

Continua na página 273

76. Ĉe La Apoteko — *Na Farmácia*

1. Mia fingro ĵus estis premegita en la veturila pordeto, mi dezirus jodon por bani ĝin — *Meu dedo foi esmagado nesse instante na porta do veículo, gostaria de passar iodo nele*
2. Mi multe suferas pri kapdoloroj – duonsvenoj – tio ne similas ordinaran kapdoloron — *Sofro muito de dores de cabeça — perturbações — isso não me parece uma enxaqueca comum*
3. Falante, mi vundis al mi la genuon, kion vi povas konsili al mi por meti sur ĝin? — *Caindo, feri-me o joelho, o que você me aconselha pôr nele?*
4. Mia piedo glitis sur la trotuaro kaj falante, mi elartikigis al mi la piedon — *O meu pé escorregou na calçada e caindo tive uma torcedura*
5. Ĉu vi havas ŝmiraĵon, per kiu mi povus frotadi min por iom kvietigi la doloron? — *Você tem unguento que eu pudesse fazer fricções para aliviar um pouco a dor?*

6. Mi suferas pri la fingro. Kiu de kelkaj tagoj tre doloras min, bonvolu ekzameni ĝin — *Sinto uma dor no dedo, que de alguns dias dói-me muito, tenha a bondade de examiná-lo*
7. Ĉu vi pensas, ke mi devas iri al kuracisto por enfendigi ĝin? — *Você acha que devo ir ao médico para fazer uma incisão?*
8. Prenu trifoje ĉiutage plenkuleron de ĉi tiu medikamento — *Tome três vezes por dia uma colherada deste medicamento*
9. Ĝi estas tro granda, ĝi estas dika pakaĵo por kunporti — *É muito grande, é um "monumento" para se carregar*
10. Mi havas spliton, t.e., peceton de dorno, kiu penetris en mian fingron, mi ne povas eltiri ĝin, vi estus tre afabla provi, se vi povus tion fari — *Tenho uma farpa, i.é, um pedacinho de espinho que entrou no meu dedo e não posso retirá-lo, você seria muito gentil de ver se lhe é possível fazer isso*

11. Mi rapide venis por scii, kion li preskribis al vi — *Vim correndo saber o que ele lhe receitou*
12. Mi sendube bezonas medikamenton – laksigan manaon — *Sem dúvida preciso de medicamento – purgante de maná*
13. Penu trovi ion, kiu ne estos tro malbongusta — *Trate de conseguir algo que não seja ruim de tomar*
14. Mi ekdezirus scii, kion li preskribis al vi — *Tinha vontade de saber o que ele lhe receitou*
15. Mi ankaŭ volas lavendon kaj kolojan akvon — *Quero também água de lavanda e de colônia*

16. Mi tre dankas, pli lerta oni ne povas esti — *Muito obrigado, mais hábil que você não pode ser*
17. Mi deziras aĉeti kuracilon kontraŭ febro — *Desejo comprar remédio para febre*
18. Ĉu vi kredas, ke mi perdos la ungon? — *Você acha que vou perder a unha?*
19. Ĉu vi havas bonan stokon da parfumo? — *Você tem um bom sortimento de perfumes?*
20. Ĉiuhore dek gutojn en glaso da akvo — *Dez gotas de hora em hora num copo de água*

21. Mi jam metis malgrandan kataplasmon — *Já pus uma pequena cataplasma*
22. Mi bezonas flakonon da kolonja akvo — *Preciso de um vidro de água-de-colônia*
23. Mi havos ĉion, kion vi eble deziros — *Tenho tudo que você possa desejar*
24. Se vi pensas, ke tio estas necese... — *Se você acha que isso é necessário...*
25. La kinino ĉiam ĝenas mian stomakon — *O quinino sempre me desarranja o estômago*

26. La parfumodoro ne estas tiel forta — *O perfume (cheiro) não é muito forte*
27. Mi bezonas kapilaran fortigilon — *Preciso de tônico capilar*
28. Pluvis, tial mi malvarmumis — *Choveu, por isso resfriei-me*
29. Mi volas aĉeti ungobroseton — *Quero comprar escova de unhas*
30. Ĉu vi havas klisterilojn — *Você tem irrigador?*

31. Tiu ĉi estas superkvalita — *Este é de superior qualidade*
32. Mi volas aĉeti razklingon — *Quero comprar lâmina gilete*
33. Mi bezonas barbokremon — *Preciso de creme de barbear*
34. Tiu ĉi estas tre kara — *Esse é muito caro*
35. Mi bezonas vizaĝkremon — *Quero creme facial*

36. Ni havas esencoleojn — *Temos essência de óleo*
37. Dankon, ĝis revido! — *Obrigado, até logo!*
38. Mi estas nevundita — *Saí ileso*
39. Donu al mi sapeton — *Dê-me um sabonete*
40. Kiom ĝi kostas? — *Quanto custa?*

kaŭĉukaj gantoj — *luvas de borracha;* **preni kuracilon —** *tomar remédio;* **kamfora pomado —** *pomada canforada;* **ellasi sangon —** *sair sangue;* **merkurokromo —** *mercúrio cromo;* **supozitorio —** *supositório;* **medikamento —** *medicamento;* **ungobroseto —** *escova de unhas;* **malmultkosta —** *barato;* **multekosta —** *muito caro;* **gutkalkulilo —** *conta-gotas;* **malinfektilo —** *desinfetante;* **antibiotiko —** *antibiótico;* **razklingo —** *lâmina de barbear;* **laksigilo —** *purgante;* **penicilino —** *penicilina;* **preventivo —** *preventivo;* **medicinaĵo —** *medicamento;* **enfendigi —** *fazer uma incisão;* **dormigilo —** *sonífero;* **linimento** — *linimento;* **tablojdoj** — *tabletes;* **vomigilo** — *vomitório;* **ruĝigilo** — *rouge;* **aspirino** — *aspirina;* **inhalaĵo** — *inalação;* **ŝmiraĵo** — *unguento;* **kotono** — *algodão;* **premegi** — *esmagar, pisar;* **toksiĝi** — *entoxicar-se;* **mentolo** — *mentol;* **bandaĝo** — *adesivo;* **morfino** — *morfina;* **pulvoro** — *pó;* **bandaĝi** — *vendar, pensar;* **narkotaĵo** — *narcótico;* **kompreso** — *compressa;* **sedativo** — *sedativo;* **insulino** — *insulina;* **mallakso** — *prisão de ventre;* **plastaĵo** — *plástico;* **parfumo** — *cheiro, perfume;* **bandaĝo** — *bandagem, atadura;* **provizo** — *sortimento;* **lozanĝo** — *comprimido;* **splito** — *lasca, fragmento;* **arniko** — *arnica;* **vomiga** — *vômico;* **tizano** — *xaropada;* **vundi** — *ferir*

Kontraŭtusa lozanĝo, comprimido contra tosse; **haltigi la sangon**, estancar o sangue; **preventivo**, preventivo (contra doenças venéreas, gravidez); **odori**, cheirar; **odoro**, cheiro, odor; **tokso**, tóxico; **lakso**, diarreia; **gazo**, gaze; **vomi**, vomitar; **vundito**, ferido; **vato**, algodão (em rama); **katuno**, tecido de algodão.

7. ĈI. (PARTÍCULA **APROXIMATIVA**). Esta partícula tem sido usada como prefixo (forma abreviada de **ĈI TIU** (este, esta) em algumas formas ADVERBIAIS de TEMPO, como: **ĈI-MATENE = HODIAŬ MATENE** (hoje pela manhã, esta manhã). Não é ACONSELHÁVEL o seu uso junto a SUBSTANTIVOS, como **ĈI-LIBRO (ĈI TIU LIBRO)**, este livro. **LA ĈISUBA SUBSKRIBINTO** (o abaixo-assinado).

ĉi-semajne — esta semana
ĉi-vespere — esta tarde
ĉi-monate — este mês
ĉi-flanke — deste lado

ĉi-okaze — no caso presente
ĉi-nokte — esta noite
ĉi-poste — aqui atrás
ĉi-tiea — deste lugar
ĉi-foje — desta vez

ĉi-entene — incluso, aqui junto
ĉi-aldone — em anexo, junto
ĉi-landa — desta terra
ĉi-supre — aqui em cima

ĉi-kune — incluso, junto
ĉi-sube — infra, abaixo
ĉi-mete — dentro, em anexo
ĉi-jare — este ano
ĉi-ene — aqui dentro

Continua na página 276

1. Tiu ĉi munto estas tro peza, mi dezirus kelkajn el tre maldika ŝtalo — *Esta montagem é muito pesada, desejava algumas de um aço muito fino*
2. Tiu sistemo ne estas oportuna, ĝi ne restas fiksita sur la nazo — *Esse método é incômodo, não permanece fixo no nariz*
3. Mi ne scias, ĉu vi klasifikas kiel ni la numerojn de la vitroj — *Não sei se você tem o mesmo modo de classificar os vidros*
4. Mi plene konfidas al vi, kaj mi estas tute rekuraĝigita — *Tenho plena confiança em você, e estou completamente sossegado*
5. Donu al mi kelkajn por provi antaŭ ol alfiksi ilin — *Dê-me alguns para experimentar antes de fixá-los*
6. Mi deziras lornetujon kaj rimenon por pendigi ĝin — *Desejo um estojo de luneta e uma correia para pendurá-lo*
7. Mi rompis mian okulvitrojn, mi deziras anstataŭi ilin — *Quebrei os óculos, desejo substituí-los*
8. Mi havis la numeron... mi estas (miopa) malmiopa — *Eu tinha o número... sou (míope) presbita*
9. Jen belaj mikroskopoj, kiom vi vendas ilin? — *Olhe que bonitos microscópios, por quanto você os vende?*
10. Ekzemple... Kio estas tio? Kiom ĝi kostas? — *Por exemplo... O que é isso? Quanto custa?*
11. Tio estas nova, moderna fotografilo — *Isso é uma nova e moderna máquina fotográfica*
12. Ĝi kostas ducent dolarojn — *Custa duzentos dólares*
13. Montru al mi dulornetojn por la teatro — *Mostre-me binóculos de teatro*
14. Montru al mi binoklojn por la kamparo — *Mostre-me binóculos de campo*
15. Mi deziras aĉeti kelkajn el arĝento — *Desejo comprar alguns de prata*
16. Mi deziras kelkajn okulvitrojn el testuda ŝelo — *Quero alguns óculos de tartaruga*
17. Lasu min vidi kelkajn el oro — *Deixe-me ver alguns de ouro*
18. Ĉu vi vendas aliajn objektojn? — *Você tem outros objetos?*
19. Mi deziras bluajn okulvitrojn — *Desejo óculos azuis*
20. Ĉu vi fabrikas precizecajn ilojn? — *Você fabrica instrumentos de precisão?*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

pliampleksigi — *ampliar;* **incida angulo** — *ângulo de incidência;* **turpa fotografaĵo** — *fotografia imoral;* **reflektiga ebeno** — *plano reflexivo;* **konverĝia lenso** — *lente convergente;* **dukonveksa lenso** — *lente biconvexa;* **precizecaj iloj** — *instrumentos de precisão;* **dekliva ebeno** — *plano inclinado;* **fokusa dikeco** — *profundidade focal;* **tuta reflekto** — *reflexo total;* **difuza cirklo** — *círculo de difusão;* **diverĝa fasko** — *feixe divergente;* **randaj radioj** — raios marginais; **teleobjektivo** — *teleobjetiva;* **fokusa volumeno** — *volume focal;* **reflekta angulo** — *ângulo de reflexão;* **diverĝiga lenso** — *lente divergente;* **simetriaj ebenoj** — *planos simétricos;* **dukonkava lenso** — *lente bicôncava;* **devia angulo** — *ângulo de desvio;* **reala punkto** — *ponto real;* **fokusa ebeno** — *plano focal;* **kampa angulo** — *ângulo de campo;* **kemia fokuso** — *foco químico;* **kovrita surfaco** — *superfície coberta;* **obskura ĉambro** — *câmara escura;* **rekte antaŭ vi** — *à sua frente;* **rifrakta radio** — *raio de refração;* **reflekta radio** — *raio de reflexão;* **mezurrubando** — *fita métrica;* **alproksimiĝi** — *aproximar-se;* **incida radio** — *raio de incidência;* **astigmateco** — *astigmatismo;* **fotografilo** — *máquina fotográfica;* **reflekta ebeno** — *plano de reflexão;* **konveksa lenso** — *lente convexa;* **konverĝa fasko** — *feixe convergente;* **centraj radioj** — *raios centrais;* **utila malfermo** — *abertura útil;* **fotografaĵo** — *fotografia;* **fotogravuro** — *fotogravura;* **kurbe linio** — linha curva; **ĉefa fokuso** — *foco principal;* **disiga povo** — *poder de dispersão;* **akromata lenso** — *lente acromática;* **kineta energio** — *energia cinética;* **nuklea energio** —*energia nuclear;* **suna energio** — *energia solar;* **mikroskopo** — *microscópio;* **amplifikilo** — *amplificador;* **portretisto** — *retratista;* **lima angulo** — *ângulo limite;* **kartoĉfilmo** — *rolo de filmes;* **mikrofilmi** — *microfilmar;* **mikrofilmo** — *microfilme;* **luma fonto** — *fonte de luz;* **malebenaĵo** — *acidente (de terreno);* **travidebla** — *transparente;* **fotografio** — *fotografia (arte);* **luma radio** — *raio de luz;* **rifraktigi** — *fazer refratar;* **ultraviola** — *ultravioleta;* **senpolvigi** — *tirar o pó (terreno);* **travidebla** — *transparente;* **enfokusigi** — *focalizar;* **reflektilo** — *refletor;* **reflektigi** — *refletir;* **dulorneto** — *binóculos;* **mikrofono** — *microfone;* **okulglobo** — *globo ocular ;* **teleskopo** — *telescópio;* **klasifiki** — *classificar;* **reĝustigi** — *retificar;* **kunfokusoj** — *focos conjugados;*

sinkronigi — *sincronizar;* **filmoteko —** *filmoteca;* **infraruĝa —** *infravermelho;* **ĉefa akso —** *eixo principal;* **amplifiki —** *amplificar;* **ŝraŭbingo —** *porca (de parafuso);* **diafragmo —** *diafragma;* **optikisto —** *ótico;* **objektivo —** *objetiva;* **kamuflado —** *camuflagem;* **reportero —** *repórter*; **kamuflaĵo —** *camuflagem;* **fotometro —** *fotômetro;* **unuokula —** *cego de um olho;* **malmunti —** *desmontar;* **portreto —** *retrato*; **fragmento —** *fragmento;* **nenormala —** *anormal;* **okulisto —** *oculista*; **malmiopa —** *présbita;* **rifrakto —** *refração;* **portreti —** *retratar;* **spektro —** *espectro;* **difuzigi —** *difundir;* **senkurba —** *direito;* **tangento —** *tangente;* **reflekto —** *reflexão;* **reflekti —** *refletir;* **trafpovo —** *alcance;* **konverĝi —** *convergir;* **filtrilo —** *filtro;* **aberacio —** *aberração;* **distordo —** *distorsão;* **kaŭstika —** *cáustico;* **celofano —** *celofane;* **plastiko —** *plástico*; **lantmova —** *lento;* **telefoto —** *telefoto;* **ŝnureto —** *barbante;* **sonfilmo —** *filme sonoro;* **proksima —** *próximo;* **distanco —** *distância;* **binoklo —** *binóculo;* **miopeco —** *miopia;* **miopulo —** *míope;* **fiksilo —** *fixador;* **ebenigi —** *nivelar;* **diafana —** *transparente;* **deklivo —** *declive;* **ombrumi —** *sombrear;* **pozicio —** *posição;* **pozisto —** *modelo (pessoa);* **kurbiĝi —** *curvar;* **fotisto —** *fotógrafo;* **polvero —** *cisco;* **filmado —** *filmagem;* **menisko —** *menisco;* **diverĝi —** *divergir;* **oblikva —** *oblíquo;* **korekto —** *correção;* **mallumo —** *escuridão;* **kamufli —** *camuflar;* **skatolo —** *caixa;* **propagi —** *propagar;* **disocii —** *dissociar;* **normala —** *normal;* **rimeno —** *correia, tira;* **figuri —** *figurar;* **figuro —** *figura, vulto;* **incido —** *incidência;* **incida —** *incidente;* **incidi —** *incidir;* **difuzi —** *difundir-se;* **difuza —** *difuso;* **fokusa —** *focal;* **fokuso —** *foco;* **optiko —** *ótica;* **kamero —** *câmera;* **riveli —** *revelar;* **ekrano —** *tela, anteparo;* **fotilo —** *máquina fotográfica;* **poluso —** *polo*; **prisma —** *prismático;* **disigi —** *dispersar;* **nilono —** *náilon;* **koloro —** *cor*; **poluri —** *polir;* **prismo —** *prisma;* **lumeco —** *claridade;* **angulo —** *ângulo;* **kodaki —** *bater instantâneo;* **limigi —** *limitar, demarcar;* **munti —** *montar;* **munto —** *montagem;* **lupeo —** *lupo;* **lorno —** *luneta, óculos (de alcance);* **ekfoto —** *instantâneo, "close-up";* **bildo —** *gravura, estampa;* **lenso —** *lente, vidro (de óculos);* **fiksi —** *fixar;* **eliri —** *sair;* **ebena —** *liso, plano (superfície);* **bilde —** *em efígie;* **devii —** *desviar (-se);* **ombro —** *sombra;* **tanĝi —** *tocar, atingir;* **foto —** *fotografia;* **suno —** *sol;* **pozo —** *pose, atitude;* **pozi —** *posar;* **filmo —** *filme;* **stelo —** *estrela;* **plako —** *chapa;* **paŭzo —** *pausa;* **lanta —** *lento;* **luma —** *luminoso;* **nubo —** *nuvem;* **foti —** *fotografar;* **limi —** *limitar, confinar;* **ujo —** *estojo;* **lumi —** *alumiar;* **neĝo —** *neve;* **disa —** *disperso;* **limo —** *limite;* **ejo —** *local, ambiente;* **kurba —** *curvo, sinuoso;* **foldo —** *ranhura*; **vitro —** *vidro;* **polvo —** *pó, poeira;* **filmi —** *filmar*

Paŭsi, reproduzir desenho, etc., sobre material transparente: **paŭzi**, fazer uma pausa; **reala bildo**, imagem real; **kurbeca centro,** centro de curvatura; **lantmova filmo,** câmara lenta; **luma fasko,** feixe de luz; **portebla fotoaparato,** máquina fotográfica portátil; **konservaj okulvitroj,** óculos de conservar a vista — **Eben-konveksa lenso** (lente plana-convexa); **reflektiga surfaco** (superfície reflexiva); **eben-konkava lenso** (lente plana-convexa); **simetria objektivo** (objetiva simétrica); **simetriaj punktoj** (pontos simétricos); **optika centro** (centro ótico).

FOTOGRAFILO = FOTOAPARATO = KAMERO = FOTILO

EKFOTO = MOMENTA FOTOGRAFAĴO

FOTI = FOTOGRAFI = KODAKI / FOTO = FOTOGRAFAĴO

8. ĈIRKAŬ. Esta preposição é regularmente usada como prefixo com o sentido de: EM TORNO DE, EM VOLTA DE, AO REDOR DE, como: **ĈIRKAŬPOLA** (circumpolar), **ĈIRKAŬDIRO** (perífrase).

ĉirkaŭveturo — circunavegação
ĉirkaŭskribi — circunscrever
ĉirkaŭbrako — abraço
ĉirkaupreni — abraçar
ĉirkaŭfrazi — parafrasear
ĉirkaŭmano — bracelete
ĉirkaŭkolo — colar
ĉirkaŭurbo — arrabalde
ĉirkaŭloka — circunstante
ĉirkaŭmovi — circunvagar

Continua na página 283

78. ĈIUTAGAJ FRAZOJ — *FRASES DE USO DIÁRIO*

1. Fininte sian laboron, li iris hejmen — *Terminando o seu trabalho, ele foi para casa*
2. Ŝi estas perfidulino kiel serpento — *Ela é pérfida como uma serpente*
3. Mensoganto bezonas duoblan memoron — *Mentiroso precisa de boa memória*
4. Vere, pli aminda oni ne povas esti — *Deveras, não poderia ser melhor*
5. Mi venis de Rio kaj iras al Londono — *Cheguei do Rio e vou a Londres*

6. Oni ne ricevas la perditan tempon — *Não se recupera o tempo perdido*
7. Mi multe bedaŭris, ke mi forestis — *Senti muito que eu estivesse ausente*
8. Mi renkontis lin irante al la urbo — *Encontrei-o ao ir (eu) para cidade*
9. Mi diris tion, timante ke li venos — *Disse-lhe isso com receio de que ele viesse*
10. Eble mi iros, eble mi restos tie ĉi — *Talvez irei, talvez ficarei aqui*

11. Tre afabla vi estas, kaj mi dankas — *Muito gentil você é, e eu agradeço*
12. Tiu ĉi informo bezonas konfirmon — *Esta notícia precisa de confirmação*
13. Li restis ĉe mi dum tri semajnoj — *Ele ficou comigo durante três semanas*
14. Mi tion nur scias laŭ la onidiro — *Sei disso só por ouvir dizer*
15. Horon post horo mi atendis por ŝi — *Eu a esperei horas após horas*

16. Via salono estas malriĉe meblita — *O seu salão está mal mobilado*
17. Ni povus kune pasigi la vesperon — *Poderíamos passar a tarde juntos*
18. Mi vere ne scias, kiel danki vin — *Na verdade, não sei como agradecer-lhe*
19. Atendu min je la sesa ptm[92] — *Espere-me às seis da tarde*
20. Mi loĝas en la strato... numero — *Moro na rua... número...*

21. Tio ĉi ŝajnas al mi iom stranga —*Isso me parece um pouco estranho*
22. Tiu informo ne estis konfirmita —*Essa notícia não foi confirmada*
23. Ŝi estas malamema kiel leopardo — *Ela é odienta como leopardo*

24. La monto estas mil futojn alta — *A montanha tem mil pés de altura*
25. Kvinoble sep estas tridek kvin — *Cinco vezes sete são trinta e cinco*

26. La infano elblovis la kandelon — *A criança apagou a vela*
27. Tiu ĉi novaĵo estas ne fidinda — *Esta notícia é ruim*
28. Mi ne speciale rimarkigas tion — *Eu não ponho isso em evidência*
29. Inter amikoj tio estas ridinda — *Entre amigos isso seria ridículo*
30. Ĉar ĉio estas en ordo, foriru! — *Como tudo está em ordem, vá embora!*

31. Mi insistis ĉe li, ke li restu — *Insisti com ele para que ficasse*
32. Mi ricevis malagrablan sciigon — *Recebi um aviso desagradável*
33. Estas konsilinde eviti erarojn — *É aconselhável evitar erros*
34. La informoj estas tre malbonaj — *As notícias são muito más*
35. Ni povos ĝui intiman babiladon — *Podemos ter um bate-papo íntimo*

36. Bedaŭrinde mi devas malakcepti — *Infelizmente devo recusar*
37. Li estas kvardekkelkjara homo — *Ele tem uns quarenta anos*
38. Mi povus fari tion morgaŭ, se... — *Poderia fazer isso amanhã, se...*
39. Hodiaŭ estas la unua de marto — *Hoje é primeiro de março*
40. Mi parolas pri interesa afero — *Falo sobre um assunto interessante*

41. Mi venos kun ŝi morgaŭ matene — *Virei com ela amanhã de manhã*
42. Tiu estis nia unua renkonto — *Esse foi o nosso primeiro encontro*
43. Li ne havas ĝroŝon en la poŝo — *Ele não tem eira nem beira*
44. Ŝi estas maliculino kiel kato — *Ela é maliciosa como gato*
45. Jen, vidu, vi mem konfesas tion — *Ora, veja, você mesmo confessa isso*

46. Ŝi estas venĝema kiel pantero — *Ela é vingativa como pantera*
47. Vi estas preskaŭ dek ses jara — *Você tem quase dezesseis anos*

---

[92] ***Posttagmeze***

48. Oni ĵus diris al mi la malon — *Neste momento disseram-me o contrário*
49. Pardonu amiko, ke mi malfruas — *Perdão amigo, estou atrasado*
50. Mi intencas iri rekte hejmen — *Pretendo ir diretamente para casa*

51. Ŝi estas vantulino kiel pavo — *Ela é vaidosa como pavão*
52. Li estas mia plej bona amiko — *Ele é o meu melhor amigo*
53. Ĉiuj ĉeestas, neniu forestas — *Todos presentes, ninguém ausente*
54. Tio tre maltrankviligis min — *Isso inquietou-me muito*
55. Ni ne konas iun kiu povus... — *Não conheço ninguém que pudesse...*

56. Tiu ĉi novaĵo estas fidinda — *Esta notícia é fidedigna*
57. Nun, mi ne plu forlasas vin — *Agora, não vou mais deixá-lo*
58. Ĉu vi estas surda aŭ muta? — *Você é surda ou muda?*
59. Mi ne estas surda nek muta — *Não sou surda nem muda*
60. En tiu sama momento kiam — *No momento em que...*

61. Ŝi estas mia ĉefa asistanto — *Ela é meu braço direito*
62. Oni jam ne parolas pri tio — *Já não se fala nisso*
63. Mi dankas pro via afableco — *Agradeço pela sua afabilidade*
64. Pli bone malfrue ol neniam — *Melhor tarde do que nunca*
65. Prefere iom (mal)frue — *É preferível um pouco mais (cedo) tarde*

66. Sepoble du estas dek-kvar — *Sete vezes dois são quatorze*
67. Estis ĉirkaŭ la deka horo — *Era por volta das dez horas*
68. Mi estas iomete kortuŝita — *Estou um pouco comovido*
69. Estas multe antaŭ la horo — *Está longe da hora*
70. Dum tiuj kelke da monatoj — *Durante esses poucos meses*

71. Tio estas tre stranga (fig.) — *É muito forte (fig.)*
72. Sesoble tri estas dek-ok — *Seis vezes três são dezoito*
73. Mi ne ŝatas oldan virinon — *Não gosto de mulher velha*

74. Dek plus dek estas dudek — *Dez mais dez são vinte*
75. Ne hastu fari vian taskon — *Não se apresse em fazer seu trabalho*

76. Unu minus unu estas nulo — *Um menos um é zero*
77. Dekoble tri estas tridek — *Dez vezes três são trinta*
78. Ne estas probable, ke... — *Não é provável que...*
79. Ili loĝas ekster la urbo — *Eles moram fora da cidade*
80. Li pasis preter mia domo — *Ele passou ao lado de minha casa*

81. Ŝi estas kisenda fraulino — *Ela é uma garota que deve ser beijada*
82. Mi preĝas dum la diservo — *Rezo durante o culto*
83. Jen seĝo; sidiĝu, mi petas! — *Eis uma cadeira; sente-se, por favor!*
84. Dudek per dek estas du — *Vinte dividido dor dez são dois*
85. Mi ĝojas konatiĝi kun vi — *Alegro-me por travar relações com você*

86. Kvin minus du estas tri — *Cinco menos dois são três*
87. Dek-ses per ok estas du — *Dezesseis dividido por oito são dois*
88. Ses estas duoblo de tri — *Seis é o dobro de três*
89. Tio estas nur elpensaĵo — *Isso é pura invenção*
90. Mi sincere gratulas vin — *Os meus sinceros agradecimentos*

91. Ŝi ja estas tre malsana — *De fato ela está muito enferma*
92. Ĉu ne estus pli bone... ? — *Não seria melhor..?*
93. Vi volis plaĉe ridegigi [93] — *Você quis desopilar o fígado*
94. Kvar plus du estas ses — *Quatro mais dois são seis*
95. Kvin per unu estas kvin — *Cinco dividido por um são cinco*

96. Nenia malhelpo pri tio — *Não há nenhum embaraço*
97. Mi prenos tion sur min — *Tomarei a meu cargo*
98. Estas malbonaj novaĵoj — *Há más notícias*
99. Mi nur pasas vojaĝante — *Estou apenas de passagem*
100. De pli ol dudek jaroj — *Há mais de vinte anos*

[93] *Familiar*

101. Ni iros renkonte al ili — *Iremos ao encontro deles*
102. Ili faras interkisadon — *Eles fazem troca de beijos*
103. Du plus unu estas tri — *Dois mais um são três*
104. Unu plus unu estas du — *Um mais um são dois*
105. Unu per unu estas unu — *Um dividido por um é igual a um*

106. Mi estas scivola, ĉu... — *Estou curioso, se...*
107. Mi loĝas ĉe mia onklo — *Moro em casa de meu tio*
108. Mi neniel ĝin eksciis — *Não soube de nada absolutamente*
109. Mi atendos vin ĉe mia... — *Esperarei por você em casa de meu...*
110. Alia afero estus se... — *Outra coisa seria se...*

111. Tiu cifero estas oko — *Essa figura é um oito*
112. Ne klakadu la pordon — *Não bata a porta*
113. Ne min persone, sed... — *Não a mim pessoalmente, mas...*
114. La afero estas pri... — *Trata-se de...*
115. Okazo faras ŝteliston — *A ocasião faz o ladrão*

Kiu salutas per bastono, iun oni resalutas per bastonego
Prov. húngaro

ĈAPITRO XV — CAPÍTULO XV

Oni jetas ŝtonojn nur al arbo, kiu portas fruktojn
Prov. árabe

Kiu frapas vin, tiu amas vin
Idem

Kiu ridas, eltiras najlon el sia ĉerko
Prov. italiano

Unu malnova amiko estas pli bona ol du novaj
Prov. russo

Kiu senkulpigas sin, kulpigas sin
Prov. francês

1. Ĉu vi povas doni al mi traton pagotan ĉe vido sur vian korespondanton en tiu ĉi urbo? — *Você pode fazer-me um saque à vista sobre o seu correspondente nesta cidade?*

2. Mi volas diri, ke vi povos enkasigi la monon rekte ĉe nia pagejo aŭ sendigi ĝin poŝte — *Quero dizer que você poderá recolher o dinheiro diretamente à nossa pagadoria ou enviá-lo pelo correio*

3. Jen estas, sinjoro, letero de sinjoro X... , via korespondanto, bonvolu tralegi ĝin — *Olhe aqui senhor, uma carta do senhor X... , seu correspondente, queira tomar conhecimento dela*

4. Vi devas havi tarifon montranta la prezojn por enkasigoj ĉe la diversaj lokoj — *Você deve ter uma tarifa indicando os preços das arrecadações para as diversas praças*

5. Bonvolu sidiĝi momenton, mi tuj revizos ilin. Tre bone, sinjoro, ĉio en ordo — *Queira sentar-se um momento, vou revisá-los logo. Muito bem, senhor, tudo em ordem*

6. Mi povas kontraŭ tiu monsumo, doni al vi ĉekojn pagotajn ĉe... en dolaroj — *Posso dar-lhe em troca dessa importância cheques pagáveis em... dólares*

7. Traktu kun mi kiel kun kliento ĉar niaj interrilatoj povos fariĝi gravaj — *Trate-me como cliente porque as nossas relações poderão se tornar importantes*

8. Se vi preferas doni al mi anglan moneron, tio tute estas indiferenta — *É-me indiferente se você prefere dar-me moeda inglesa*

9. Bonvolu doni al mi informojn pri sinjoro... negocisto en tiu ĉi urbo — *Queira dar-me informações sobre o senhor... negociante nesta cidade*

10. Mi konsentas pri viaj kondiĉoj. Ĉu mi devas pagi konstante? — *Estou de acordo com as suas condições. Devo pagar constantemente?*

11. Mi deziras ŝanĝi tiujn bankbiletojn kontraŭ germana mono — *Quero trocar essas cédulas por dinheiro alemão*

12. Ĉu vi povas ŝanĝi al mi ĉi tiun bileton de cent markoj? — *Você pode trocar para mim esta cédula de cem marcos?*

13. Por kiom da mono vi ŝanĝas la anglan sterlingan funton? — *Por quanto você troca a libra esterlina?*

14. Kia estas la plej uzata monero en Sovetunio? — *Por favor, qual é a moeda mais corrente na União Soviética?*

15. Ni debetos vian konton kaj deprenos poste la sumon — *Debitaremos em sua conta e descontaremos depois da soma*

16. Mi povas proponi al vi honestan kaj ageman agenton — *Posso indicar-lhe um corretor honesto e ativo*

17. Mi preferas kunpreni iom da ĝi antaŭ forveturi — *Prefiro levar um pouco dele antes de partir*

18. Donu al mi la plej uzatan moneron de tiu ĉi lando — *Dê-me moeda mais corrente do país*

19. Ĉu estas necese, ke mi ĝiru al vi tiun ĉekon? — *É preciso que eu lhe endosse o cheque?*

20. Ĉu vi havas specialajn formularojn por tio? — *Você tem formulários especiais para isso?*

21. Ĝis kioma horo via oficejo estas malfermita? — *Até que hora o seu escritório está aberto?*

22. Ĝis la unua posttagmeze — *Até a uma depois do meio-dia*

23. Ĉu vi povas tuj diskonti la kambion al mi? — *Você pode me descontar logo uma letra de câmbio?*

24. Mi estas rekomendita al vi de sinjoro... — *Sou recomendado a você pelo senhor...*

25. Donu al mi almenaŭ la duonon de tiu mono — *Dê-me pelo menos a metade desse dinheiro*

26. Permesu al mi ankoraŭ kelkajn demandojn — *Permita-me ainda algumas perguntas*

27. Unu dolaro plie aŭ malplie ne signifas — *Não importa um dólar a mais ou a menos*

28. Mi deziras sendi sumon da... al Berlino — *Desejaria enviar uma soma de... para Berlim*

29. Je kia procento estas nun la diskonto? — *Qual é a taxa de desconto no momento?*

30. Kioma estas la nuna valoro de l' oro? — *Qual é o valor do ouro no momento?*

31. Kiu valuto? Kiun specoj de moneroj? — *Qual a cotação? Que tipos de moedas?*

32. Mi povas preni sur min tiun enpagon — *Posso me encarregar dessa cobrança*

33. Vi povas konfidi pri mia diskreteco — *Você pode contar com a minha discreção*

34. Kiom vi kalkulas pro la maklero? — *Quanto você avalia para a corretagem?*

35. Tre bone, tio estas tre konvena — *Muito bem, isso é muito conveniente*

36. Ĉu vi povas pagi tiun ĉi kambion? — *Você pode pagar esta letra de câmbio?*

37. Bonvolu vizi tiun ĉekon al mi — *Queira visar-me esse cheque*

38. Kiom da diskonto vi kalkulas? — *Quanto você avalia o desconto?*
39. Mi faras hodiaŭ bonan profiton — *Faço hoje um bom lucro*
40. Jen kambio tratita de sinjoro X... — *Eis aqui uma letra de câmbio sacada pelo senhor X...*
41. La marko havas kurzon de... — *O marco tem o câmbio de...*
42. Ĉu vi havas sufiĉe da mono? — *Você tem dinheiro suficiente?*
43. Mi revenos iom pli malfrue — *Voltarei um pouco mais tarde*
44. Mi faris la kaŭcian monon — *Fiz o depósito em dinheiro*
45. Donu al mi la kalkulon — *Dê-me a (nota) conta*
46. Subskribu la kvitancon — *Assine o recibo*
47. Mi ne havas moneretojn — *Não tenho dinheiro miúdo*
48. Duona sterlinga funto — *Meia libra esterlina*
49. Kiom estas la kurzo? — *Quanto está o câmbio?*
50. Tio ne estas necesa — *Isso não é necessário*

ALDONA VORTARETO — *VOCABULÁRIO ADICIONAL*

enpoŝigi monon — *meter dinheiro no bolso;* **monero el nikelo —** *moeda de níquel;* **sterlinga funto —** *libra esterlina;* **malsama monero —** *moeda diferente;* **monero el aluminio —** *moeda de alumínio;* **elpoŝigi monon —** *tirar dinheiro do bolso;* **monero el kupro —** *moeda de cobre;* **en la kvanto de —** *na soma de;* **pagota ĉe vido —** *pagável à vista;* **monero el arĝento —** *moeda de prata;* **monero el oro —** *moeda de ouro;* **bankoficisto —** *bancário;* **kaŭcia mono —** *depósito em dinheiro;* **ŝanĝi monon —** *trocar dinheiro;* **kurzaltiĝo —** *alta do câmbio;* **kurza bulteno —** *boletim da bolsa;* **kambia kurzo —** *cotação cambial;* **banktenanto —** *banqueiro (fin.);* **duona krono —** *meia coroa;* **taga kurzo —** *câmbio do dia;* **bankbileto —** *cédula, nota;* **egalvaloro —** *de valor igual;* **tratita de —** *sacado por;* **moneretoj —** *miúdo (dinheiro);* **kurzofalo —** *queda de câmbio;* **elkalkuli —** *deduzir, descontar;* **ŝparkesto —** *caixa econômica;* **prunti al —** *emprestar a;* **prunti de —** *tomar emprestado;* **de monbileto —** *papel-moeda;* **bankestro —** *banqueiro;* **procento —** *taxa, juro;* **diskonti —** *descontar (com.);* **monerunuo —** *unidade monetária;* **interezo —** *interesse, juros;* **enkasigo —** *recolhimento (fin.);* **enkasigi —** *recolher (fin.);* **senkurza —** *sem cotação (câmbio);* **bankisto —** *banqueiro (fin.);* **bankiero —** *banqueiro (fin.);* **subaĉeti —** *subornar;* **tratanto —** *sacador (fin.);* **kaŭciulo —** *fiador;* **monŝanĝo —** *troco;* **monereto —** *troco;* **elaĉeti —** *remir, resgatar;* **kunpreni —** *levar;* **rimeso —** *nota promissória;* **kruzero —** *cruzeiro (fin.);* **akcepto —** *recebimento;* **kuprero —** *moeda de cobre;* **ĉe vido —** *à vista (com.);* **centavo —** *centavo (Brasil, etc.);* **ĝiranto —** *endossante;* **punmono —** *multa;* **floreno —** *florim;* **ŝilingo —** *xelim;* **arĝento —** *prata;* **valuto —** *cotação (câmbio);* **eskudo —** *escudo (fin.);* **franko** — *franco (fin.);* **kambio** — *letra de câmbio;* **konto** — *conta (fin.);* **enpago** — *cobrança;* **aganto** — *agente;* **ĝirato** — *endossatário;* **agento** — *agente, corretor;* **kopeko** — *copeque;* **peseto** — *peseta;* **monero** — *moeda;* **dolaro** — *dólar;* **cendo** — *centavo (EE. UU.);* **marko** — *marco (fin.);* **krono** — *coroa (fin.);* **gineo** — *guinéu;* **rupio** — *rúpia;* **ĝiri** — *endossar;* **funto** — *libra (peso);* **kurzo** — *câmbio (cotação);* **trato** — *saque (fin.);* **trati** — *sacar (fin.);* **rublo** — *rublo;* **agema** — *ativo;* **ĝiro** — *endosso*

9. ĈIU. Usado como prefixo com o mesmo sentido de: CADA, TODOS, etc.

ĉiumomente — a cada momento
ĉiumaniere — de todos os modos
ĉiuvespere — todas as tardes
ĉiuflanke — de todos os lados
ĉiusabate — todos os sábados
ĉiusemajne — todas as semanas
ĉiuminute — a todo momento
ĉiunokte — todas as noites
ĉiupaŝe — a cada passo
ĉiujara — anual, de todos os anos

10. DE. Esta preposição é muito usada com radicais VERBAIS para indicar CAUSA ou PONTO DE PARTIDA, como: **DEĈEFURBA TRAKO** (rota ou tráfego para o interior), **DEVENI** (vir de), **DEVOJIĜI** (extraviar-se).

deveturi — descer (de veículo)
demamigi — desmamar
detranĉi — decepar
derajdi — apear (de cavalo)
deteni — reter, deter
desalti — saltar de
detumi — desviar
delasi — deixar cair
delogi — seduzir
deŝovi — afastar levemente

Continua na pág. 287

80. ĈE LA VOJAĜOFICEJO — *NA AGÊNCIA DE VIAGEM*

1. Ĉu estas necese mendi mian lokon por ricevi kajuton sur la ferdeko? — *É necessário reservar o meu lugar para ter um camarote no convés?*
2. Mi deziras enirpermeson por Brazilo. Jen mia pasporto, kiu valoras por Usono — *Desejo visto de entrada para o Brasil. Olhe aqui o meu passaporte, que tem validade para os Estados Unidos*
3. Kiom mi ŝuldas pro la enirpermeso kaj kiam mia pasporto estos preta? — *Quanto devo pelo visto de entrada e quando o meu passaporte ficará pronto?*
4. Vi ŝuldas nur dek mil kruzerojn. Atendu minuton, la konsulo devos tuj subskribi ĝin — *Você deve somente dez mil cruzeiros. Espere um minuto, o cônsul deverá assiná-lo já*
5. Kiom da pakaĵo rajtigas mian bileton por ke mi kunportu ĝin senpage? — *Quanta bagagem posso levar livre de pagamento com esta passagem?*

6. Estas dumotora aviadilo, kiu forflugos al Italujo je la naŭa matene — *Há um bimotor que parte às nove horas da manhã para a Itália*
7. Estas ĝuste tio, kio taŭgas al mi — *É justamente isso que me convém*
8. Ĉu vi deziras resti longan tempon en Brazilo aŭ nur kelkajn tagojn? — *Você deseja permanecer muito tempo no Brasil ou somente alguns dias?*
9. Mi restos du-tri semajnojn en Brazilo por ripozi — *Ficarei umas duas ou três semanas no Brasil para repousar*
10. Morgaŭ ni flugos al Usono por partopreni Esperantan Kongreson — *Amanhã partiremos para participar de um Congresso de Esperanto nos Estados Unidos*

11. Ĉu mi devas dungi barkiston, kiu kondukos min al la ŝipo? — *Devo alugar um barqueiro para conduzir-me a bordo?*
12. Ĉu mi povas akiri rezervitan sidlokon antaŭe el Parizo? — *Pode ser reservado um lugar com antecedência de Paris?*
13. Ĉiuj sidlokoj en la ĵipo (trajno, ŝipo) estas okupitaj — *Todos os lugares no jipe (trem, navio) acham-se ocupados*
14. Veturu per (aviadilo, buso, aŭtogiro, motorciklo) taksio — *Viaje de (avião, ônibus, helicóptero, motorcicleta) táxi*
15. Tiu ĉi bileto estis aĉetita de mi ĵus kiam vi alvenis — *Esta passagem foi comprada por mim justamente quando você chegou*
